LA INSTRUOJ

DE

BUDHO

DARMA RADO

Darma Rado estas la traduko de la sanskrita vorto “Dharmacakra.” Simila al la rado de ĉaro, kiu daŭre turnadas sin, ĝi simbolas la instruon de Budho, ĉar ĝi disvastiĝadas larĝe kaj senfine. La ok radioj de la rado esprimas la Noblan Okeran Vojon de Budhismo, la plej gravan Vojon de Praktiko. La Nobla Okera Vojo aludas ĝustan vidon, ĝustan penson, ĝustan vorton, ĝustan faron, ĝustan vivon, ĝustan penon, ĝustan zorgon, kaj ĝustan meditadon. En malnova tempo, antaŭ ol statuoj kaj aliaj imagoj de la Budho estis faritaj, tiu ĉi Darma Rado servis kiel la objekto de adorado. En la nuna tempo, la Darma Rado estas uzata internacie kiel la komuna simbolo de Budhismo.

Kopirajto© 1966, 2020, 2021 de BUKKYO DENDO KYOKAI

Oni povas citi iun ajn parton de ĉi tiu libro sen antaŭ-aranĝo, kondiĉe ke la nomo de Bukkyô Dendô Kyôkai estu menciita, kaj ke la kopio de publikaĵo estu sendita al ni.

BUKKYÔ DENDÔ KYÔKAI
(Budhisma Misia Asocio)
3-14, 4-tyôme Siba
Minato-ku, Tokyô, Japan, 108-0014

Telefono: (03) 3455-5851

Fax: (03) 3798-2578

E-mail: bdk@bdk.or.jp http://www.bdk.or.jp

tria eldono, 2021

Presita de

Kosaido Printing Co., Ltd.

Tokio, Japanio

La Saĝo de la Budho estas granda kiel vasta oceano, kaj lia Spirito estas plena de superega Kompato.

La Budho ne havas formon, sed manifestas sin per superba figuro, kaj gvidas nin per sia senlima Kompatemo.

Tiu ĉi libro estas valora, ĉar ĝi enhavas la esencon de la instruoj de la Budho, registritaj en pli ol kvin mil volumoj, konservataj kaj transdonitaj de generacio al generacio dum pli ol du mil kvincent jaroj, trans la limoj de landoj kaj la baroj de rasoj.

La vortoj de la Budho entenataj en tiu ĉi libro temas pri ĉiuj aspektoj de la homa vivo kaj alportas al ĝi signifon.

DARMO-PADO

(DHAMMAPADA)

Ja ne per venĝemo venĝemoj iam ĉesas ĉi tie.
Per malvenĝemo ili ja ĉesas. (5)

Stultulo konanta sin stulta ĝuste tial saĝas.
Stultulo pro saĝo fiera vere nomindas stultulo (63)

Se iu milon da miloj da homoj en batalo venkus,
kaj alia venkus sin mem, tiu batalanton superus. (103)

Pli bone ol vivi cent jarojn sen vidi la plej bonan darmon
estas unutaga vivo, vidante la plej bonan darmon. (115)

Malfacilas iĝi homo. Malfacilas de mortontoj vivo.
Malfacilas veran darmon aŭdi.
Malfacilas de Budhoj apero. (182)

Ĉiun malbonon ne fari, sanige ekagi, propran menson
purigi — jen de la Budhoj la mesaĝo. (183)

Ne povas filoj protekti, ne patro, ne parencaro.
Por kiu atingis la finon, parenco ne estas protekto. (288)

ENHAVO

BUDHO

Ĉapitro la Unua Budho Ŝakjamunio 2
I. La Vivo de la Budho 2
II. La Lasta Instruo de la Budho 10
Ĉapitro la Dua La Budho Eterna kaj Glora 15
I. Liaj Kompato kaj Votoj 15
II. Savado kaj ĝia Rimedo 19
III. La Eterna Budho 22
Ĉapitro la Tria La Formo de Budho kaj Liaj Virtoj 25
I. Tri Aspektoj de Budha Korpo 25
II. La Apero de Budho 29
III. Virtoj de Budho 32

DARMO

Ĉapitro la Unua Kaŭzoj kaj Kondiĉoj 38
I. Kvaropa Nobla Vero 38
II. Kaŭzoj kaj Kondiĉoj 41
III. Dependa Ekesto 43
Ĉapitro la Dua La Teorio de Menso Sola kaj Reala Stato de Aferoj 46
I. Malkonstanteco kaj Sen-Egoo 46
II. La Teorio de Menso Sola 49
III. Reala Stato de Aferoj 52

IV. La Meza Vojo 57
Ĉapitro la Tria La Naturo de Budho 65
I. La Menso de Pureco 65
II. La Naturo de Budho 71
III. Sen-Egoeco 75
Ĉapitro la Kvara Vulgaraj Pasioj 81
I. Malpureco de Menso 81
II. Homa Naturo 88
III. Homa Vivo 90
IV. Realeco de Homa Vivo 95
Ĉapitro la Kvina La Savo fare de Budho 102
I. La Votoj de Budho Amitabo.....102
II. La Pura Lando 110

LA VOJO DE PRAKTIKO

Ĉapitro la Unua La Vojo de Purigado 116
I. Purigi la Menson 116
II. Bonaj Kondutoj 123
III. Instruoj en Malnovaj Fabeloj 135
Ĉapitro la Dua La Vojo de Praktiko 150
I. Serĉado de la Vero 150
II. Diversaj Vojoj 163
III. La Vojo de Fido 177
IV. Sanktaj Aforismoj 184

LA KOMUNUMO

Ĉapitro la Unua Disciplino de la Komunumo 194
I. Senhejma Monaĥo 194
II. La Vojo de Laikoj 200
III. Praktika Gvido por Vojo de Vivo 212
Ĉapitro la Dua Konstrui Landon de Budho 225
I. La Harmonio de la Komunumo 225
II. La Lando de Budho 234
III. Subtenantoj de Lando de Budho 238

Referencitaj Originoj 245

Apendicoj

I. Konciza Historio de Budhismo 258
II. Transigo de Budhisma Kanono 268
III. Historio de “La Instruoj de Budho” 271
IV. Indekso de Ĉiutaga Vivo 273
V. Sanskrita Glosaro 281

Pri “Budhisma Misia Asocio” 292

BUDHO

BUDHO ŜAKJAMUNIO

I

LA VIVO DE LA BUDHO

1. La anoj de la Ŝakja-klano loĝis laŭlonge de la rivero Rohinio, kiu fluas inter la sudaj montetoj ĉe la piedo de Himalajoj. Ilia reĝo, Sudodano Gotamo, starigis ĉefurbon ĉe Kapilavasto, kaj tie konstruis sian grandan kastelon; li saĝe regis la landon kaj ĝuis respekton de sia popolo.

La reĝino, Majo, estis filino de onklo de la reĝo; li ankaŭ estis la reĝo de najbara regiono de la sama Ŝakja-klano.

Dum dudek jaroj mankis al ili infano. Sed unu nokton la reĝino Majo havis strangan sonĝon, en kiu ŝi vidis blankan elefanton eniri en sian uteron tra sia dekstra flanko; tuj poste ŝi gravediĝis. La reĝo kaj la popolo anticipis la plezuron de la naskiĝo de reĝa infano. Laŭ ilia kutimo la reĝino reiris al la hejmo de siaj gepatroj por akuŝo, kaj survoje, en la bela printempa sunlumo, ŝi ripozis en Lumbinio-Ĝardeno.

Ĉirkaŭ ŝi aromis aŝokaj floroj, kaj ravite, ŝi etendis sian dekstran brakon por pluki branĉon; en tiu ĉi momento princeto naskiĝis. Ĉiuj ŝiaj akompanantoj jubilis

la gloron de la reĝino kaj ŝia princa infano; ankaŭ la ĉielo kaj la tero ĝojis. Tiu memorinda tago estis la oka de aprilo.

La reĝo treege ĝojis, kaj li nomis la infanon Sidarto, kiu signifas "Ĉia deziro plenumita".

2. Tamen en la reĝa palaco la ĝojegon tuj sekvis malĝojo, ĉar post kelkaj tagoj la amata reĝino Majo subite mortis. Ŝia pli juna fratino, Mahapraĵapatio, fariĝis nutro-patrino por la infano kaj tre zorge kaj ame edukis lin.

Iu ermito nomata Asito, kiu loĝis en proksima montaro, rimarkis brilan lumon ĉirkaŭ la kastelo kaj interpretis ĝin kiel bonan aŭguron. Li do malsupreniris al la palaco, kaj tie li ricevis permeson vidi la infanon. Li antaŭdiris: "Tiu ĉi princo, se li restos en la palaco ĝis la maturiĝo, fariĝos granda reĝo kaj subigos la tutan mondon. Sed se li forlasos la kortegan vivon por sekvi religian vivon, li fariĝos Budho, la Savanto de la mondo."

En la komenco la profetaĵo tre plaĉis al la reĝo, sed baldaŭ li maltrankviliĝis pro la ebleco, ke lia solfilo forlasos la palacon por fariĝi senhejma ermito.

Kiam la princo aĝis sep jarojn, li eklernis lecionojn pri civilaj kaj militaj artoj, sed lia penso inkliniĝis al aliaj

aferoj. En iu printempa tago li eliris el la kastelo kun sia patro. Ili kune rigardadis farmiston, kiu plugas. Tiam li atentis unu birdon, kiu malsupren flugis kaj kaptis vermeton elplugitajn de la farmisto. Li sidiĝis en la ombro de arbo kaj enpensiĝis murmurante al si:

"Ho ve, ĉu ĉiuj vivaĵoj mortigas unuj la aliajn?"

Li, kiu perdis sian patrinon preskaŭ tuj post sia naskiĝo, estis tiom pli profunde impresita de la tragedio de tiuj bestetoj.

Tiu ĉi spirita vundo estis tiel profunda, ke ĝi ne resaniĝis dum li maturiĝadis. Aflikto pro la homa vivo — kvazaŭ eta cikatro sur juna arbo — poste pli kaj pli kreskis en lia menso.

La reĝo pli kaj pli maltrankviliĝis pro la profetaĵo de la ermito kaj klopodis ĉiel gajigi la princon kaj forturni liajn pensojn al aliaj aferoj. Kiam la princo estis 19-jara, la reĝo aranĝis, ke li edziĝu al la princino Jaŝodaro, kiu estas filino de Suprabudho, la sinjoro de Devadaho-kastelo kaj frato de la mortinta reĝino Majo.

3. Dum la sekvantaj dek jaroj, la princo loĝis alterne en tri sezonaj pavilonoj: printempa, aŭtuna kaj pluvsezona, kie oni amuzis lin per muzikado, dancado kaj kantado.

Sed intertempe liaj pensoj ĉiam revenis al la demando de homa suferado; li kontempladis por atingi la veran signifon de la homa vivo.

"Tiuj ĉi luksaĵoj de la palaco, tiu ĉi sana korpo, tiu ĉi ĝojo de la juneco! Kion tiuj aferoj entute signifas por mi?" — li demandis al si. "Iam estonte ni nepre malsaniĝos, maljuniĝos; morto ne estas evitebla. Fiero pri juneco, fiero pri sano, fiero pri ekzisto — tiujn ĉi fierojn prudentaj homoj devas meti flanken."

"Kiam iu luktas por sia vivo, tiu nature serĉas ion valoran por si. Sed estas la du manieroj de serĉado: ĝusta maniero kaj malĝusta maniero. Se iu enfalas en malĝustan manieron, tiu, kiu mem neeviteble malsaniĝos, maljuniĝos kaj mortos, serĉas ne-malsaniĝon, ne-maljuniĝon kaj ne-morton."

"Se iu trovas la ĝustan manieron, tiu rekonas la veran econ de malsaniĝo, maljuniĝo kaj morto, kaj tiu serĉas signifon en tio, kio transcendas ĉiujn homajn suferojn. Sed mia nuna vivo plena de plezuro ŝajnas esti staranta sur malĝusta maniero."

4. Tiel daŭris la mensa konflikto en la menso de la princo ĝis lia 29-a jaro, kiam naskiĝis lia solinfano

Rahulo. Tio ĉi verŝajne alportis al li ian penson, ĉar tiam li decidis forlasi la palacon por komenci la vivon senhejman kaj peralmozan kiel spirita vojserĉanto. Unu nokton li efektivigis tiun planon; li forlasis la kastelon akompanate de la ĉaristo Ĉandako kaj sia amata neĝblanka ĉevalo Kantako.

Apenaŭ ili ekiris, multaj diabloj venis al la princo por tenti, dirante: "Estas pli bone, ke vi reiru al la kastelo kaj serĉu alian solvon; tiuokaze la tuta mondo fariĝos via!" Sed li diris al ili, "For la diabloj! Mi ne deziras la tutan mondon!" Li do razis sian kapon kaj turnis sian paŝon al la sudo, portante almozbovlon en la mano.

Unue la princo vizitis la ermiton Bagavo kaj observis lian asketisman praktikon. Poste li iris al Arado Kalamo kaj al Udrako Ramaputro lerni iliajn metodojn por atingi spiritan altecon pere de meditado. Sed praktikinte ilin kelkan tempon, li konvinkiĝis, ke ili ne kondukos lin al Vervekiĝo. Fine li iris al la lando Magado kaj praktikis asketismon en Uruvilvo-arbaro ĉe la bordo de la rivero Najranĵano, kiu fluas preter la vilaĝo Gajo.

5. La metodo de lia praktikado estis nekredeble severa kaj tiel intensa, ke li mem diris pri ĝi poste: "Neniu asketo estinta, estanta aŭ estonta, iam praktikis aŭ praktikos pli severe ol mi."

Tamen la princo ankoraŭ ne povis atingi sian celon. Post ses jaroj en la arbaro, li rezignis la asketisman praktikon. Li sin banis en la rivero, kaj akceptis bovlon da rizo kun laktosuko el la mano de Suĵato, junulino, kiu loĝis en najbara vilaĝo. La kvin kolegoj, kiuj vivis kun la princo dum la ses jaroj de lia asketisma praktikado, estis mirigitaj, vidinte la scenon, ke li akceptis manĝaĵon-trinkaĵon el la mano de junulino. Ili kredis, ke li degeneris, kaj forlasis lin.

Do la princo estis forlasita sola. Ankoraŭ li estis malforta, sed riskante perdi la vivon, li donis sin al la lasta meditado sub arbo, dirante al si, "Eĉ se mia sango sekiĝus, mia karno putrus, miaj ostoj dispeciĝus, mi neniam forlasu tiun ĉi lokon antaŭ ol mi trovos la vojon al Vervekiĝo."

Lia interna baraktado de tiu tago estis intensiva kaj nekomparebla. Ofte li estis senespera kaj plena de konfuzaj pensoj, nigraj ombroj kovris lian menson, kaj ĉiaj logaĵoj de la diabloj sieĝis lin. Atente kaj pacience li ekzamenis ilin unu post la alian kaj forĵetis ilin ĉiujn. Ja estis tiel malfacila batalo, ke lia sango maldensiĝs, lia karno defalis, kaj liaj ostoj knaris.

Kiam la matena stelo aperis en la orienta ĉielo, la

batalo estis finiĝinta, kaj la spirito de la princo estis tiel klara kaj hela kiel serena tagiĝo, ĉar li finfine trovis la vojon al Vervekiĝo. Estis la oka tago de decembro, kiam la princo fariĝis Budho en sia 35-a jaro.

6. Ekde tiu tempo la princo estis konata per diversaj alinomoj: la Budho, la Perfekta Vervekiĝinto, Tatagato, Ŝakjamunio aŭ la Saĝulo de la Ŝakja-klano, kaj la Monda Honorato, k.a.

Unue li iris al Mrigadavo en Varanaso, kie loĝis la kvin almozuloj, kiuj antaŭe vivis kun li dum la ses jaroj de lia asketa vivo. En la komenco ili evitis lin, sed aŭskultinte lian instruon, ili fidis lin kaj fariĝis liaj unuaj sekvantoj. Poste li iris al Raĵagriho-Kastelo kaj akiris konfidon de Reĝo Bimbisaro, kiu jam de antaŭe estis lia malnova konato. De tie li rondiris tra la lando, vivtenante per almozo kaj disvastigante sian instruon.

Homoj kolektiĝis ĉirkaŭ li kiel la soifantaj al akvo kaj la malsatantaj al nutraĵo. Du grandaj disĉiploj, Ŝariputro kaj Maŭdgaljajano, kun siaj du mil disĉiploj venis al li.

La patro de la Budho, Reĝo Sudodano, kiu en la komenco multe suferadis pro sia filo forlasinta la palacon,

fariĝis lia fervora disĉiplo. Mahapraĵapatio, lia nutropatrino, kaj Princino Jaŝodaro, lia edzino, kaj ĉiuj anoj de la Ŝakja-klano komencis sekvi lian instruon. Multaj aliaj ankaŭ fariĝis sindonaj kaj fidelaj sekvantoj.

7. Kvardek kvin jarojn la Budho rondvojaĝis en la lando, predikante kaj persvadante homojn ke ili sekvu la ĝustan vivmanieron laŭ lia instruo, ĝis li atingis la aĝon de 80 jaroj. Unu tagon, kiam li estis ĉe Vaiŝalo, survoje de Raĵagriho al Ŝravastio, li malsaniĝis. Tiam li diris, ke post tri monatoj li eniros en Nirvanon. Li ankoraŭ daŭrigis sian vojaĝon, ĝis li venis al Pavo, kie li fariĝis serioze malsana pro manĝaĵo oferita al li de Ĉundo, forĝisto. Malgraŭ la malsano kaj doloro li venis en la arbaron apud Kuŝinagaro.

Tie kuŝante inter du grandaj sala-arboj, li daŭrigis instruadon al siaj disĉiploj ĝis la lasta momento. Tiel li eniris en perfektan trankvilon — Nirvanon — , kompletiginte sian laboron kiel la granda spirita gvidanto de la mondo.

8. En Kuŝinagaro ĉiuj lamentis pro la forpaso de la Budho; sub la gvido de Anando, amata disĉiplo de la Budho, oni kremaciis lian korpon laŭkutime.

La reĝo de Magado, Aĵataŝatro, kaj ankaŭ reĝoj de sep najbaraj regnoj postulis dividi inter si la ostojn de la Budho. Sed la anoj de Kuŝinagaro unue rifuzis tion, tiel ke granda disputo kaj malpaco, eĉ kun la risko de milito, okazis inter ili. Fine intervenis la saĝulo Drono, kaj laŭ lia konsilo, la ostoj estis dividitaj inter la ok grandaj regnoj. La cindro el la funebra brulstako kaj la urno, kiu entenis restaĵon, estis donitaj al du aliaj regnoj. Kaj en iliaj landoj estis konstruitaj entute dek grandaj pagodoj memorfestantaj la Budhon por sanktigi la ostojn kaj cindrojn.

II
LA LASTA INSTRUO DE LA BUDHO

1. Sub la sala-arboj en la arbaro de Kuŝinagaro, la Budho faris sian lastan predikon al Siaj disĉiploj:

"Vi mem estu via lumo. Bazu vin sur vi mem; ne dependu de iu alia. Mia instruo estu via lumo. Bazu vin sur mia instruo; ne dependu de alia instruo.

Konsideru vian korpon; pripensu ĝian malpuran econ. Sciu, ke kaj ĝia doloro kaj ĝia plezuro ambaŭ estas kaŭzoj de suferado. Kiel vi povus indulgi ĝiajn dezirojn? Konsideru vian 'memon'; pripensu ĝian pasemecon. Kiel

vi povus enfali en iluzion pri ĝi kaj dorloti fierecon kaj egoismon, se vi scias, ke ili ĉiuj devas finiĝi neeviteble per suferoj? Konsideru ĉiujn substancojn. Ĉu vi povas trovi inter ili ian daŭran 'memon'? Ĉu ili ne estas agregaĵoj, kiuj pli aŭ malpli frue apartiĝas kaj dispeciĝas? Ne estu konfuzita de la universala suferado. Sekvu mian instruon eĉ post mia morto, kaj tiam vi estos liberigitaj de suferoj. Se vi tiel faras, vi estas miaj disĉiploj."

2. "Miaj disĉiploj! La instruojn, kiujn mi donis al vi ĝis hodiaŭ, vi ne forgesu nek forlasu, sed ĉiam aŭskultu, ĉiam pripensu kaj ĉiam praktiku! Se vi fidele sekvas ilin en la ĉiutaga vivo, via vivo ĉiam estas feliĉa.

La kerno de la instruoj estas regi vian propran menson. Tenu vian menson for de avareco, tiam via korpo povas esti ĝusta, via menso pura, kaj via parolo sincera. Ĉiam memorigu vin pri la nedaŭreco de via vivo, tiam vi povas liberigi vin for de avareco kaj koleremo, kaj vi povas eviti ĉian malbonon.

Se via menso forlogiĝas al io pro avideco, vi subigu ĉi tiun kaj rezistu al la tento. Anstataŭ sklavo, estu la mastro de via propra menso!

Depende de sia mensostato homo povas fariĝi Budho aŭ besto. Vojerarinte, oni fariĝas demono;

vervekiĝinte, oni fariĝas Budho. Tial, regu vian menson kaj ne permesu, ke ĝi deflankiĝu de la ĝusta vojo.”

3. “Laŭ miaj instruoj, vi devas respekti unu la alian, kaj deteni vin de ĉia disputo; vi ne kontraŭstaru unu la alian, kiel oleo akvon, sed intermiksiĝu kiel akvo kun lakto.

Kune studu, kune lernu, kune praktiku la instruojn. Ne perdu tempon por vantaj aferoj kaj kverelado. Ĝuu la florojn de la iluminiĝo kaj rikoltu la fruktojn de la ĝusta vojo.

La instruojn, kiujn mi donis al vi, mi gajnis per mia sekvado de la ĝusta vojo. Vi devas ĉiam sekvi ilin kaj konformi ilin en ĉiu okazo.

Se vi malatentas ilin, tio signifas, ke vi neniam vere renkontis min, kaj ke vi estas malproksima de mi, eĉ se vi aktuale estas kun mi; sed se vi akceptas kaj praktikas miajn instruojn, vi estas tre proksima al mi, eĉ se vi estas fore de mi.”

4. “Miaj disĉiploj, mia surtera vivo baldaŭ finiĝos kaj ni disiĝos, sed ne lamentu. La vivo en ĉi tiu mondo ne estas daŭra; neniu povas eviti la morton de la korpo. Tiun

veron de la nedaŭreco mi baldaŭ montros per mia morto; mia korpo kolapsos, kiel kadukiĝinta ĉaro.

Ne lamentu vane, sed konstatu, ke nenio estas eterna, kaj lernu de tio ĉi la relativecon de homa vivo. Tial ne tenu la senvaloran deziron, ke ŝanĝantaĵoj fariĝu neŝangeblaj.

La demono de mondaj deziroj ĉiam serĉas ŝancojn erarigi vian menson. Se vipuro troviĝas en via ĉambro, vi ne havos tie pacan dormon tiel longe, ĝis vi forpelos ĝin.

Vi devas rompi la katenojn de mondaj pasioj kaj forpeli ilin el via menso, kiel vipuron el via ĉambro. Bone gardu vian propran menson!”

5. “Miaj disĉiploj! Venis mia lasta momento, sed ne forgesu, ke la morto estas nur malapero de la fizika korpo. La korpo naskiĝis el gepatroj kaj tenis sian vivon per nutraĵo; neeviteblaj al ĝi estas la malsaniĝo kaj morto.

Sed la vera Budho ne estas homa korpo; ĝi estas Vervekiĝo. Homa korpo devas perei, sed la Saĝo de Vervekiĝo ekzistos eterne kiel en la vero de la Darmo, tiel ankaŭ en la praktikado de la Darmo. Tiu, kiu vidas nur

mian korpon, ne vere vidas min. Nur tiu, kiu akceptas miajn instruojn, vere vidas min.

Post mia morto, la Darmo estu via gvidanto. Sekvu ĝin, kaj tiele vi estas fidelaj al mi.

Dum la lastaj kvardek kvin jaroj de mia vivo, mi nenion kaŝe tenis ĉe mi. Estas neniu sekreta instruo, neniu kaŝita signifo; ĉio estas instruita malkaŝe kaj klare. Miaj karaj disĉiploj, jen la fino. Post momento mi atingos la Nirvanon. Jen mia instrukcio.“

LA BUDHO ETERNA KAJ GLORA

I

LIAJ KOMPATO KAJ VOTOJ

1. La spirito de Budho estas tiu de granda kompato kaj bonvolo plena de amo. La granda bonvolo estas la volo savi ĉiujn homojn uzante ĉiajn eblajn rimedojn. La granda kompato estas la menso, kiu volas esti malsana kune kun malsanaj homoj kaj suferadi kune kun suferantaj homoj.

"Via sufero estas mia sufero, kaj via feliĉo estas mia feliĉo," diris la Budho. Ĝuste kiel patrino ĉiam amas sian infanon, la Budho ne forgesas tiun spiriton eĉ unu momenton, ĉar kompatemo mem estas la esenco de Budheco.

La spirito de la Budho, granda kompato, estiĝas laŭ bezonoj de popolo; pro kontakto kun ĝi estiĝas konfido de popolo, per kiu oni akiras Vervekiĝon. Tio estas simila al la fakto, ke patrino kompletigas sian patrinecon per la amo al sia infano; kaj samtempe la menso de ŝia infano trankviliĝas pro kontaktado kun sia patrino.

Tamen popolo ne komprenas tiun ĉi spiriton de Budho, kaj daŭre suferadas pro siaj iluzioj kaj deziroj, kiuj devenas de ilia malsaĝo; ili suferadas pro siaj agadoj

akumulitaj per vulgaraj pasioj. Portante sur siaj dorsoj pezan ŝarĝon de pekoj ili vagadas spiregante de loko al loko inter la montegoj de iluzio.

2. Ne pensu, ke la kompato de la Budho funkcias nur por la nuna vivo; ĝi estas manifestiĝo de la eterna kompato de la eterna Budho kaj daŭras funkcii senĉese, ekde kiam homoj komence vojeraris pro sia malsaĝeco.

La eterna Budho ĉiam aperas antaŭ popolo en sia plej intima figuro kaj alportas al ili ĉiujn eblajn rimedojn por savi ilin.

La Budho Ŝakjamunio naskiĝis kiel princo de Ŝakja-klano kaj forlasis sian hejmon por vivi kiel asketo. Pere de la praktikado de silenta meditado Li akiris Vervekiĝon aŭ Iluminiĝon. Li predikis la Darmon (la instruon) al siaj disĉiploj kaj fine manifestis ĝin per sia surtera morto.

Ĉar iluzioj de homoj estas senfinaj, la funkciado de Budho ankaŭ estas senfina; ĉar la profundeco de homaj pekoj estas senfunda, la kompato de Budho ankaŭ estas senfunda.

Kiam la Budho decidis liberigi sin de la vulgara vivo, Li starigis la kvar grandajn votojn: 1) savi ĉiujn vivestaĵojn; 2) fortranĉi ĉiujn vulgarajn dezirojn; 3) lerni ĉiujn instruojn; 4) atingi perfektan Vervekiĝon. Tiuj ĉi votoj estas manifestiĝoj de la amo kaj kompato, kiuj faras la fundamenton de la esenco de Budho.

3. La Budho unue ekzercis sin por liberiĝi de la peko mortigi ĉiun ajn vivaĵon, kaj Li deziris, ke homoj eksciu la feliĉon de longa vivo.

La Budho ekzercis sin por liberiĝi de la peko ŝteli, kaj Li deziris, ke ĉiuj homoj enmanigu al si ĉion, kion ili bezonas.

La Budho ekzercis sin por liberiĝi de la peko adulti, kaj Li deziris, ke ĉiuj homoj eksciu la feliĉon de pura menso kaj ne suferu pro nesatigeblaj deziroj.

La Budho, celante al sia idealo, ekzercis sin por resti libera de trompo, kaj Li deziris, ke ĉiuj homoj eksciu la trankvilecon de menso, kiu sekvas de parolado de la vero.

Li ekzercis sin por liberiĝi de falsemo; Li votis, ke ĉiuj homoj eksciu la ĝojon pri harmonia interrilato.

Li ekzercis sin por ne insulti aliajn personojn, kaj Li deziris, ke ĉiuj homoj havu serenan menson, kiu sekvas de paca vivo kune kun aliaj personoj.

Li tenis sin libera de senutila babilaĉo kaj deziris, ke ĉiuj eksciu la benon de simpatia kompreno.

La Budho, celante al sia idealo, ekzercis sin por liberiĝi de avideco, kaj per tiu ĉi virtaj agoj Li deziris, ke ĉiuj homoj eksciu la pacemon, kiu estas kunigita kun forĵeto de avideco.

Li ekzercis sin por liberiĝi de kolero kaj deziris, ke ĉiuj homoj amu unu la aliajn.

Li ekzercis sin por liberiĝi de malsaĝeco kaj deziris, ke ĉiuj homoj komprenu la leĝon de kaŭzo-rezulto kaj ne ignori ĝin.

Tiamaniere la kompato de Budho ĉirkaŭprenas ĉiujn homojn kaj Lia konstanta intereso estas por ilia feliĉo. Li tiel amas homojn, kiel gepatroj siajn infanojn, kaj deziras la plej altan benon al ili, nome ili povu transiri la maron de naskiĝo-kaj-morto.

II
SAVADO KAJ ĜIA RIMEDO

1. Estas tre malfacile, ke la vortoj elparolitaj de Budho el la malproksima bordo de Vervekiĝo atingas la homojn, kiuj ankoraŭ baraktas en la mondo de iluzio; tial Budho revenas al tiu ĉi mondo kaj aranĝas Siajn rimedojn por savado.

"Nu, mi rakontu unu parabolon," la Budho diris. "Iam loĝis unu riĉulo, kies domo neatendite ekbrulis. Tiam li ne estis hejme; kiam li revenis hejmen, li eksciis, ke liaj infanoj estas absorbitaj en ludo, ne atentas la fajron kaj ankoraŭ restas en la domo. La patro kriegis, 'Elvenu, miaj infanoj! Elvenu el la domo! Tuj!' Sed la infanoj ne aŭdis lin.

La timanta patro kriis denove. 'Hej, infanoj! Jen mi havas kelkajn bonegajn ludilojn ĉi tie. Venu ĉi tien kaj prenu ilin!' Nun aŭdinte lian krion, la infanoj kure elvenis el la brulanta domo."

Tiu ĉi mondo estas brulanta domo. Homoj ne rimarkantaj, ke ilia domo estas brulanta, estas en danĝero esti bruligotaj kaj mortigotaj. Tial la Budho kompate elpensis rimedojn por savi ilin.

2. La Budho diris, “Mi rakontu alian parabolon. Iam solfilo de iu riĉulo forlasis sian hejmon kaj enfalis en la ekstremon de mizera vivo.

La patro vojaĝis fore de sia hejmo kaj serĉis sian filon perdiĝintan; tamen li neniel povis konstati la lokon de sia filo malgraŭ ĉiaj penoj.

Kelkdek jarojn poste lia filo enfalinta en mizeran situacion hazarde venis proksimen al la loko, kie la patro loĝis.

La patro tuj rekonis sian filon kaj sendis siajn servistojn por revenigi la filon al si. La filo tamen estis ŝokita de la majesta domego. Li timis, ke ili trompas lin, kaj ne volis iri kun ili. Li ne povis rekoni sia patron.

La patro denove sendis siajn servistojn kaj, donante al li kelke da mono, proponis, ke li fariĝu servisto de la domo. Li akceptis tiun ĉi proponon kaj iris kun ili al la domo kaj fariĝis servisto.

La patro avancigis lin iom post iom, ĝis li respondecis pri ĉiuj posedaĵoj kaj trezoroj, sed li ankoraŭ ne rekonis sian patron.

La patro estis ĝoja pro lia fideleco. Kiam la fino de la vivo proksimiĝis, li kunvokis ĉiujn siajn parencojn kaj amikojn kaj diris al ili: ‘Miaj amikoj, tiu ĉi estas mia solfilo, la filo, kiun mi serĉadis multajn jarojn. Ekde nun ĉiuj miaj posedaĵoj kaj trezoroj apartenas al li.’

Lia filo surpriziĝis pro la konfeso de sia patro kaj diris, ‘Ne nur mi trovis mian patron, sed ankaŭ la tuto de ĉi tiuj trezoroj apartenas al mi!’”

La riĉegulo en la parabolo indikas Budhon, kaj la vaganta filo ĉiujn homojn. La kompato de Budho prenas ĉiujn homojn, same kiel la amo de gepatroj prenas ilian solfilon. En tia amo Li elpensas la plej taŭgajn rimedojn por gvidi homojn kaj doni al ili la trezoron de Ilumimiĝo.

3. Kiel pluvo falas egale sur ĉiujn vegetalojn, tiel same granda kompato de Budho etendiĝas egale al ĉiuj homoj. Kiel ĉiu planto ricevas al si specialan favoron de la sama pluvo, tiel same homoj de diversaj karakteroj kaj cirkonstancoj estas favorataj per diversaj manieroj.

4. Gepatroj amas ĉiujn siajn infanojn, sed ilia amo direktas sin kun speciala tenereco al malsana infano.

Kvankam la granda kompato de la Budho ampleksas ĉiujn homojn, ĝi superŝutiĝas kun speciala zorgo sur tiujn, kiuj havas pezajn ŝarĝojn de pekoj kaj suferoj kaŭze de sia malsaĝeco.

La suno leviĝas sur la orienta ĉielo kaj neniigas la mallumon de sur la tero, ne distingante iun aŭ alian regionon. Tiel same Budha kompato ampleksas ĉiujn homojn, instigante ilin fari ĝustan faron kaj gvidante ilin kontraŭ peko. Tiamaniere Li neniigas la mallumon de malsaĝeco kaj kondukas ilin al Vervekiĝo.

Budho estas patro en sia compato kaj patrino en amfavoro. Pro siaj nescio kaj sklaveco al vulgara deziro, homoj ofte agas kun troa fervorego. Budho estas ankaŭ fervorega, sed pro la kompato por ĉiuj homoj. Ili restas senhelpaj sen Budha kompato kaj devas akcepti la rimedojn de savado fare de la Budho kiel Liaj infanoj.

III
LA ETERNA BUDHO

1. Ordinare homoj kredas, ke la Budho naskiĝis kiel princo kaj lernis la vojon al Vervekiĝo kiel almozulo; sed efektive, Budho ĉiam ekzistadis en tiu ĉi mondo, kiu ne havas komencon nek finon.

Kiel la Eterna Budho Li konas ĉiujn homojn kaj aplikadas ĉiajn rimedojn por savi ilin.

En Eterna Darmo, pri kiu Budho predikis, troviĝas nenia falsaĵo, ĉar li konas ĉiujn aferojn en la mondo tiel, kiel ili ekzistas, kaj instruas tion al ĉiuj.

Efektive, estas tre malfacile bone koni la mondon en ĝia realo, ĉar tio, kio ŝajnas vera, ofte ne estas vera, kaj kio ŝajnas falsa, ofte ne estas falsa. Malsaĝaj homoj ne povas koni la veran aspekton de la mondo.

Budho sola vere kaj plene konas la mondon tiel, kiel ĝi estas, kaj Li neniam diras, ke ĝi estas vera aŭ falsa, bona aŭ malbona. Li simple montras la mondon tiel kiel ĝi estas.

Tio, kion Budho instruas, estas jena: "Ĉiuj homoj kultivu radikojn de virto laŭ siaj naturoj, siaj agoj, kaj siaj kredoj." Tiu ĉi instruo transcendas ĉian konfirmon kaj negadon de tiu ĉi mondo.

2. Budho instruas ne nur per vortoj, sed ankaŭ per Sia vivo. Kvankam Lia vivo estas senfina, sed por veki homojn avarajn, Li montras sian morton kiel lertan rimedon.

Dum iu kuracisto estis for de sia hejmo, liaj infanoj hazarde prenis venenon. Kiam li revenis hejmen, li

rimarkis ilian malbonan staton kaj preparis sentoksigan medikamenton. Kelkaj el la infanoj, kiuj ne tiel multe venenitaj, prenis la medikamenton kaj resaniĝis. Sed aliaj estis tiel serioze venenitaj, ke ili perdis normalan mensostaton kaj ne prenis la medikamenton.

La kuracisto, instigite de sia patreca amo al siaj infanoj, decidis uzi urĝan metodon por kuraci ilin. Li diris al la infanoj, "Mi nun devas ekiri por longa vojaĝo. Mi jam maljuniĝis kaj sekve antaŭvidas proksiman finon de mia vivo. Se mi estus kun vi, mi povus zorgi pri vi. Sed post mia forpaso vi certe pli malsaniĝos. Kiam vi aŭdos mian morton, prenu tiun ĉi medikamenton kaj resaniĝu de tiu ĉi subtila veneno." Kaj li ekiris por longa vojaĝo kaj iom poste sendis sian mesaĝiston al ili por informi ilin pri sia morto.

La infanoj, ricevinte tiun ĉi informon, profunde malĝojis. Ili pensis, ke ili ne plu povas havi amplenan zorgon de la patro. Rememorinte la testamenton postlasitan de sia patro, en la sento de lamento kaj despero ili prenis la medikamenton kaj resaniĝis.

Oni ne povas riproĉi la mensogon de la patro-kuracisto. Budho similas al tiu patro. Li tiel same uzas la fikcion de vivo kaj morto por savi homojn, kiuj implikiĝas en la sklaveco de deziroj.

LA FORMO DE BUDHO KAJ LIAJ VIRTOJ

I

TRI ASPEKTOJ DE BUDHA KORPO

1. Ne serĉu por ekkoni Budhon per Lia formo nek per Liaj atributoj. Formo kaj atributoj ne estas vera Budho. La vera Budho estas Vervekiĝo. La efektiva maniero por koni Budhon estas realvidi Vervekiĝon.

Se iu, vidante kelkajn belegajn trajtojn de Budho, pensas, ke li vere konas Budhon, tio estas eraro de liaj malkleraj okuloj, ĉar la vera Budho ne povas esti esprimata en formo nek vidata de homaj okuloj. Oni ne povas koni Budhon eĉ per plena priskribo pri Liaj atributoj. Ne eblas plene priskribi Liajn trajtojn per homaj vortoj.

Kvankam ni parolas pri Lia formo, la Eterna Budho ne havas difinitan formon. Sed Li povas manifesti Sin en ia ajn formo. Kvankam ni priskribas Liajn atributojn, la Eterna Budho ne havas difinitajn atributojn. Sed Li povas manifesti Sin en ĉiaj ajn bonegaj atributoj.

Se iu vidas Lian formon distinge aŭ perceptas Liajn

atributojn klare, kaj tamen ne alteniĝas al la formo nek al la atributoj, tiu havas kapablon vidi kaj ekkoni Budhon.

2. La korpo de Budho estas Vervekiĝo mem. Estante senforma kaj sensubstanca, ĝi ĉiam estadis kaj estados. Ĝi ne estas fizika korpo, kiu devas esti nutrata de manĝaĵoj. Ĝi estas eterna korpo, kies esenco estas saĝeco. Pro tio Budho havas nek timon nek malsanon; Li estas eterne senŝanĝa.

Tial Budho neniam malaperas, dum Vervekiĝo ekzistas. Vervekiĝo aperas kiel la lumo de la saĝeco, kiu vervekas homojn al nova vivo kaj igas ilin naskiĝi en la lando de Budho.

Tiuj, kiuj plene komprenas tiun ĉi rezonon, fariĝas infanoj de Budho; ili tenas Lian Darmon, respektas Liajn instruojn, kaj transdonas ilin al la venonta generacio. Nenio estas pli mirinda ol la forto de Budho.

3. Budho havas triopan korpon: unue, aspekto de Esenco aŭ ‘Dharma-kāya’; due, aspekto de Spirita Perfektiĝo aŭ ‘Saṁbhoga-kāya’; trie, aspekto de Manifestiĝo aŭ ‘Nirmāṇa-kāya’.

Dharma-kāya estas la substanco de la Darmo; t.e. ĝi estas la substanco de Vero mem. En la aspekto de Esenco, Budho ne havas figuron nek koloron, kaj ĉar Budho ne havas figuron nek koloron, Li venas de nenie kaj iras nenien. Same kiel la blua ĉielo, li kovras ĉion. Kaj ĉar Li estas ĉio, al Li mankas nenio.

Li ekzistas, ne ĉar oni pensas, ke Li ekzistas; Li ne malaperas, ne ĉar oni forgesas Lin. Li estas submetita al neniu aparta devigo por sia apero, kiam homoj estas feliĉaj kaj komfortaj. Ne estas necese por lia malapero, ke homoj estu senatentaj kaj pigraj. Budho transcendas ĉiujn imageblajn direktojn de homa menso.

Budha korpo en tiu ĉi aspekto plenigas ĉiujn angulojn de la universo; ĝi atingas ĉiun ajn lokon kaj ekzistadas ĉiam ajn, senrilate al tio, ĉu oni kredas aŭ dubas Lian ekziston.

4. Saṁbhoga-kāya signifas, ke la naturo de Budho, kiu estas unuiĝo de la kompato kaj la saĝeco, kaj kiu estas superimaga spirito, manifestas sin pere de la simboloj de naskiĝo kaj morto, de prezentado de grandaj votoj, de ekzercoj, kaj de montro de Sia Nomo, por konduki ĉiujn estaĵojn al savo.

Granda kompato estas la esenco de tiu ĉi korpo, kaj en sia spirito Budho utiligas ĉiujn rimedojn por emancipi ĉiujn, kiuj estas pretaj al emancipiĝo. Same kiel fajro estiĝinta unu fojon daŭre brulas ĝis elĉerpiĝo de brulaĵo, tiel Kompato de Budho neniam ŝanceliĝas, ĝis ĉiaj vulgaraj pasioj elĉerpiĝos. Same kiel vento forblovas polverojn, tiel Kompato de Budho forblovas polverojn de homaj suferoj.

Nirmāṇa-kāya signifas, ke por kompletigi la savon fare de Saṁbhoga-kāya Budho aperis en tiu ĉi mondo per korpa formo kaj montris al homoj, konforme al iliaj karakteroj kaj kapabloj, la aspektojn de naskiĝo, forlaso de hejmo, kaj akiro de Vervekiĝo. Por gvidi homojn Budho en tiu ĉi korpo uzas diversajn rimedojn kiel ekzemple malsaniĝo aŭ morton.

La formo de Budho originas el unu Dharma-kāya, sed, ĉar karakteroj de homoj estas tre diversaj, Ĝi aperas en diversaj formoj antaŭ ilin. Kvankam la formo de Budho varias konforme al diversaj deziroj, agoj kaj kapabloj de homoj, intereso de Budho estas nur montro de vero de Darmo.

Kvankam Budho havas triopan korpon, Lia spirito kaj celo estas unu — helpi kaj savi homojn.

En ĉiaj cirkonstancoj Budho manifestas Sin kun Sia pureco, tiu ĉi manifestiĝo mem ne estas Budho, ĉar Budho ne estas formo. Budheco penetras en ĉion ajn; ĝia korpo estas Vervekiĝo, kaj kiel Vervekiĝo ĝi aperas antaŭ tiujn, kiuj estas kapablaj vidi la veron.

II
LA APERO DE BUDHO

1. Estas tre malofte, ke Budho aperas en tiu ĉi mondo. Li aperas, atingas Vervekiĝon, enkondukas la Darmon, tranĉas retojn de duboj, elradikigas ampasiojn kaj ŝtopfermas la fonton de malbonaj agoj. Li paŝadas tute libere tra la mondo sen malhelpo. Ne estas pli alta bono ol respekti Budhon.

Budho aperas en la mondo suferplena, ĉar Li ne povas forlasi homojn suferantajn. Lia sola celo estas disvastigi la Darmon kaj favori ĉiujn homojn per ĝia Vero.

Estas tre malfacile enkonduki la Darmon en la mondon, kiu estas plena de maljusteco kaj falsaj opinioj, kaj kiu vane baraktas kun nesatigeblaj deziroj kaj malkomfortoj. Budho frontas kontraŭ tiujn ĉi mal-

facilaĵojn pro Lia granda amo kaj kompato.

2. Budho estas bona amiko al ĉiuj homoj. Se Budho trovas iun suferantan pro peza ŝarĝo de brulantaj pasioj, Li sentas kompaton kaj dividas la ŝarĝon kun tiu. Li volas forpeli la mallumon per la pura lumo de Sia saĝo.

Simile al bovido, kiu ĝuas sian vivon kun sia patrino, tiuj, kiuj aŭdis la instruojn de Budho, poste ne volas forlasi Lin, ĉar Liaj instruoj alportas al ili feliĉon.

3. Kiam la luno estiĝis nevidebla, oni diras, ke la luno malaperis; kiam la luno leviĝis, oni diras, ke la luno aperis. Sed efektive la luno ne iras nek venas, sed ĉiam ekzistadas en la universo. Tiel same Budho ankaŭ estas konstanta. Li ne aperas nek malaperas. Li nur ŝajnigas tia pro sia amo al ĉiuj homoj, por ke Li povu gvidi ilin.

Oni nomas iun fazon de la luno "plenluno" kaj nomas alian fazon "lunduono". Efektive la luno estas ĉiam globa, neniam kreskante nek malkreskante. Budho estas ĝuste tiel kiel la luno. De la okuloj de homoj ŝajnas, ke Budho ŝanĝas sian figuron, sed la vero estas, ke Budho ne ŝanĝiĝas.

La luno aperas ĉie ajn, super svarma urbo, dormanta

vilaĝo, monto, rivero; ĝi estas videbla sur profunda lageto, poto de akvo, kaj eĉ ĉe roseroj sur foliopintoj. Kiam iu vojiradas malproksimen centojn da mejloj, la luno akompanas tiun. Al ni ŝajnas, ke la luno ŝanĝiĝas, sed efektive ĝi ne ŝanĝiĝas. Same kiel la luno, kiu sekvas homojn de tiu ĉi mondo, Budho montras diversajn aspektojn laŭ iliaj ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj; sed en Sia esenco Li ne ŝanĝas Sin.

4. La fakto, ke Budho aperas kaj malaperas, povas esti klarigita per kaŭzeco; nome, kiam la kaŭzo kaj kondiĉoj maturiĝas, Budho aperas; kiam la kaŭzo kaj kondiĉoj elĉerpiĝas, Budho ŝajne malaperas el tiu ĉi mondo.

Ĉu Budho aperas, ĉu malaperas, Budheco ĉiam restas sama. Konante tiun ĉi rezonon, oni devas paŝi sur la vojo al Vervekiĝo kaj proprigi al si Perfektan Saĝon, ne ĝenate de supraĵaj ŝanĝiĝoj de Budha imago respondantaj al ŝanĝiĝoj de homaj pensoj aŭ al kondiĉoj de la mondo.

Estas jam klarigite, ke Budho ne estas fizika korpo sed Vervekiĝo. Korpo povas esti imagita kiel ujo; se tiu ĉi ujo estas plenigita de Vervekiĝo, ĝi estas nomata Budho. Tial, se iu estas alkroĉita al la fizika korpo de Budho kaj lamentas pri Lia malapero, tiu ne povas vidi la veran Budhon.

Efektive, la vera naturo de ĉiuj aĵoj transcendas la apartigon de apero kaj malapero, de alveno kaj foriro, kaj de bono kaj malbono. Ĉiuj aĵoj estas sensubstancaj kaj perfekte egalaj.

Tiaj distingoj devenas de erara konsidero de tiuj homoj, kiuj vidas nur fenomenojn. La vera formo de Budho ne aperas nek malaperas.

III
VIRTOJ DE BUDHO

1. La Budho ricevas la respekton de la mondo pro kvin virtoj: elstara konduto, elstara vidpunkto, elstara Saĝo, elstara kapablo de prediko, kaj la forto por konduki homojn al la praktiko de Sia instruo.

Krome la Budho havas ok aliajn virtojn, per kiuj Li donas benon kaj feliĉon al homoj: la kapablo alporti tujajn profitojn en la mondon pere de la praktikado de Sia instruo, la kapablo juĝi korekte bonan kaj malbonan, aŭ ĝustan kaj malĝustan, la kapablo konduki homojn al Vervekiĝo per la instruado de ĝusta vojo, la kapablo konduki ĉiujn homojn al unu egala vojo, la kapablo eviti fieremon kaj arogantecon, la kapablo fari tion kion Li

diris, la kapablo diri tion kion Li faris, kaj tiamaniere Li plenumas la votojn de sia kompatema menso.

Pere de meditado Budho tenas kvietan kaj pacan spiriton, brilas kun amo, kompato, feliĉo kaj egalanimo. Budho rilatas al ĉiuj homoj kun justeco, forigante malpuraĵojn el la menso, kaj donante feliĉon en perfekta unueco de la spirito.

2. Budho estas kaj patro kaj patrino por homoj en la mondo. Post kiam infano naskiĝas, dum dek ses monatoj la gepatroj parolas al ĝi kun infanecaj vortoj; poste iom post iom ili instruas al ĝi paroli kiel plenkreskulo. Same kiel tiuj ĉi gepatroj, Budho unue zorgas pri homoj kaj poste igas ilin zorgi pri si mem. Budho unue alportas aĵojn koresponde al iliaj deziroj kaj poste kondukas ilin al paca kaj sekura rifuĝejo.

Tion, kion Budho predikis en Sia lingvo, homoj ricevas kaj asimilas en sia propra lingvo, kvazaŭ la prediko estus direktita ekskluzive al ili mem.

La korstato de Budho estas super homa ideo; ĝi ne povas esti klarigita per vortoj; ĝi eble povas esti sugestita per paraboloj.

Eĉ kiam akvo de la rivero Gango estas kirlata de paŝado de ĉevaloj kaj elefantoj, aŭ de naĝado de testudoj

kaj fiŝoj, ĝi ĉiam fluadas pure kaj neĝenate de tiaj bagateloj. Budho similas al tiu ĉi riverego. Eĉ se fiŝoj kaj testudoj de aliaj instruoj venas naĝe en la profundon kaj interpuŝiĝas unu kun la aliaj en la fluado, estas vane. Budha Darmo fluadas pure kaj senĝene.

3. La Saĝo de Budho, estante perfekta, forlasas ekstremojn de antaŭjuĝoj kaj tenas moderecon, kiu estas super ĉiuj vortoj por priskribi. Estante ĉiel saĝa, Li scias la pensojn kaj sentojn de ĉiuj homoj kaj klare ekvidas ĉion en tiu ĉi mondo en unu momento.

Kiel la steloj en la ĉielo speguliĝas sur la serena oceano, tiel la pensoj, sentoj kaj cirkonstancoj de homoj speguliĝas en la profundo de la Saĝo de Budho. Tial Budho estas nomata la Perfekta Vervekiĝinto, la Ĉioscianto.

La Saĝo de Budho refreŝigas la sekajn mensojn de homoj, lumigas ilin, kaj instruas al ili la signifon de tiu ĉi mondo, ĝiajn kaŭzojn kaj rezultojn, ĝian aperon kaj malaperon. Ja, sen la helpo de Budha Saĝo, kia aspekto de la mondo povus esti komprenata de homoj?

4. Budho aperas ne nur kiel Budho. Iufoje Ĝi aperas ankaŭ kiel enkarniĝo de malbono, iufoje kiel virino, dio, reĝo aŭ politikisto; iufoje Ĝi aperas en bordelo aŭ en vetludejo.

Okaze de epidemio Ĝi aperas kiel kuracisto, kaj

dum milito Ĝi predikas sindetenon kaj amon por ĉiuj suferantaj homoj; por tiuj, kiuj kredas, ke ĉio eterne ekzistadas, Ĝi predikas efemerecon kaj necertecon; por tiuj, kiuj estas fieraĉaj kaj egoismaj, Ĝi predikas humilecon kaj sinoferon; por tiuj, kiuj estas envolvitaj en reton de vulgaraj plezuroj, Ĝi montras la mizeron de tiu ĉi mondo.

La laboro de Budho signifas montri la puran esencon de Dharma-kāya (la absoluta naturo de Budho) en ĉiuj aferoj kaj en ĉiuj okazoj; tiel la amo kaj kompato de Budho elfluas el tiu ĉi Dharma-kāya en senfina vivo kaj senlima lumo, alportante savon al la homaro.

5. La mondo similas al brulanta domo, kiu estas ripete detruata kaj rekonstruata eterne. Homoj, estante konfuzitaj de la mallumo de sia malsaĝo, perdas sin mem en kolero, malplezuro, ĵaluzo, antaŭjuĝo kaj vulgaraj pasioj. Ili similas al beboj bezonantaj patrinon; ĉiuj homoj devas dependi de la favoro de Budho.

Budho estas patro de la tuta mondo; ĉiuj homoj estas infanoj de Budho. Budho estas la plej sankta el ĉiuj sanktuloj. La mondon kovras la fajro de kadukiĝo, malsano kaj morto; ĉie ajn estas suferoj. Sed homoj absorbitaj en vana serĉado al vulgara plezuro, ne estas sufiĉe saĝa por koni tion ĉi.

Budho vidis, ke tiu ĉi mondo de iluzio estas vere brulanta domo, tial Ĝi forlasis ĝin kaj trovis rifuĝon kaj pacon en la kvieta arbaro. Tie, el la granda kompato, Ĝi alvokas al ni, "Tiu ĉi mondo de ŝanĝiĝo kaj sufero apartenas al mi; ĉi ĉiuj malsaĝaj kaj senkonsideraj homoj estas miaj infanoj. Mi estas la sola persono, kiu povas savi ilin de iluzio kaj mizero."

Ĉar Budho estas la granda reĝo de la Darmo, Ĝi predikas al ĉiuj homoj laŭvole. Budho aperas en la mondon por favori homojn. Por savi ilin de sufero Ĝi predikas la Darmon, sed oreloj de homoj estas obtuzaj pro avidemo kaj ili estas senatentaj.

Sed tiuj, kiuj aŭskultas Ĝiajn instruojn estas liberaj de la iluzioj kaj la mizeroj de vivo. "Homoj ne povas esti savitaj, dependante de sia propra saĝo", Ĝi diras, "kaj per konfido al mia parolo ili devas eniri en mian instruon." Tial oni devas aŭskulti la instruon de Budho kaj praktiki ĝin.

DARMO

KAŬZOJ KAJ KONDIĈOJ

I

KVAROPA NOBLA VERO

1. Tiu ĉi mondo estas plena de suferoj. Naskiĝo estas sufero, Maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto estas suferoj. Renkonti homon, kiun oni malamas, estas sufereo, apartiĝi de karulo estas sufero, barakti vane por satigi siajn bezonojn estas sufero. Vere, vivo, kiu ne estas libera de deziro kaj pasio, estas ĉiam envolvita en afliktojn. Tio ĉi nomiĝas la Vero pri Sufero.

La kaŭzo de homa sufero troviĝas sendube en la soifoj de la fizika korpo kaj en la iluzioj de vulgaraj pasioj. Se oni ĝisfunde esploras tiujn ĉi soifojn kaj pasiojn, oni trovas ilin enradikiĝintaj en ardaj denaskaj instinktoj. Tia deziro, havante fortan volon vivi kiel sian bazon, serĉas ĉiujn dezirindaĵojn; eĉ morto ne faras escepton. Tio ĉi nomiĝas la Vero pri la Kaŭzo de Sufero.

Se deziro, kiu kuŝas ĉe la radiko de homa pasio, povas esti forigita, tiam pasio formortas kaj ĉiuj homaj suferoj finiĝas. Tio ĉi nomiĝas la Vero pri la Halto de la Kaŭzo de Sufero.

Por eniri en tian staton, en kiu troviĝas nenia deziro

kaj nenia sufero, oni devas sekvi certan vojon. La etapoj de tiu ĉi Nobla Okera Vojo estas: Ĝusta Vido, Ĝusta Penso, Ĝusta Parolo, Ĝusta Agado, Ĝusta Vivtenado, Ĝusta Klopodo, Ĝusta Atentado, kaj Ĝusta Koncentrado. Tio ĉi nomiĝas la Vero pri la Nobla Vojo al la Halto de la Kaŭzo de Sufero.

Oni devas firme teni tiujn ĉi Verojn en sia menso. Ĉar la mondo estas plena de suferoj, tiuj, kiuj volas liberiĝi de suferoj, devas detranĉi la katenon de vulgaraj pasioj, kiu estas la sola kaŭzo de suferoj. La vivmaniero, kiu estas libera de ĉiuj vulgaraj pasioj kaj suferoj, povas esti konata nur pere de Vervekiĝo, kaj Vervekiĝo povas esti atingita nur pere de la disciplino de la Nobla Okera vojo.

2. Ĉiuj, kiuj serĉas Vervekiĝon, devas kompreni la Kvaropan Noblan Veron. Ne komprenante ĉi tion, oni devas vagadi senfine en la konfuziva labirinto, nome en viv-iluzioj. Tiuj, kiuj komprenas tiun ĉi Kvaropan Noblan Veron, nomiĝas “akirintoj de la okuloj de Vervekiĝo.”

Tial, kiu volas sekvi la instruojn de Budho, devas koncentri sian menson sur tiun ĉi Kvaropan Noblan Veron kaj klopodi por klare kompreni ĝian signifon. En ĉiuj epokoj iu ajn sanktulo, se tiu estas vera sanktulo, estas tiu,

kiu komprenas ĝin kaj instruas ĝin al aliaj homoj.

Kiam ni klare komprenas tiun ĉi Kvaropan Noblan Veron, tiam la Nobla Okera Vojo kondukas nin for de avido; kaj se ni estas liberaj de avido, ni ne kverelas kun aliaj homoj, ni ne mortigas, nek ŝtelas, nek adultas, nek trompas, nek riproĉas, nek flatas, nek envias, nek koleras, nek forgesas ŝanĝiĝemon de vivo, kaj nek flankeniras al malĝusta vojo.

3. Tiu, kiu sekvas la Noblan Veron, similas al tiu, kiu eniras en malluman ĉambron kun lampo en sia mano: tiam mallumo tuj foriras, kaj la ĉambro estas plena de lumo.

Tiu, kiu komprenas la signifon de la Noblaj Veroj kaj lernis sekvi la Noblan Vojon, povas posedi la lunon de saĝo, kiu forbalaas la mallumon de malsaĝo.

Budho gvidas homojn, simple indikante al ili la Noblan Kvaropan Veron. Tiuj, kiuj komprenas ĝuste la instruon, akiras ĝustan Vervekiĝon; ili povas gvidi kaj gardi aliajn homojn en tiu ĉi nekonstanta mondo, kaj indas konfidon. Kiam oni klare komprenas la Noblan Kvaropan Veron, ĉiuj fontoj de vulgaraj pasioj elsekiĝas.

Ekirante de tiu ĉi Nobla Kvaropa Vero, la disĉiploj de Budho atingas ĉiujn aliajn valorajn verojn; ili akiras la saĝon kaj klarvidan kapablon kompreni rezonadon de ĉiaj aferoj kaj prediki pri la Darmo al ĉiuj homoj en la mondo.

II
KAŬZOJ KAJ KONDIĈOJ

1. De ĉiuj homaj suferoj troviĝas kaŭzoj, kaj troviĝas ankaŭ la maniero, per kiu ili finiĝas. Kial? Ĉar ĉio en la mondo estas la rezulto de vasta interplektiĝo de kaŭzoj kaj kondiĉoj, kaj ĉar ĉio malaperas, kiam tiuj ĉi kaŭzoj kaj kondiĉoj ŝanĝiĝas.

Pluvas, vento blovas, floroj floras, folioj maturiĝas kaj velkas. Tiuj ĉi ĉiuj fenomenoj rilatas kun kaŭzoj kaj kondiĉoj, naskiĝas per ili, kaj estingiĝas, kiam la kaŭzoj kaj kondiĉoj ŝanĝiĝas.

Ni naskiĝas per la kondiĉoj de gepatroj. Nia korpo nutriĝas per manĝaĵoj kaj nia menso kreskas per instruo kaj sperto.

Tial, kaj nia korpo kaj nia menso estas rilatantaj al kondiĉoj, kaj ili ŝanĝiĝas, kiam kondiĉoj ŝanĝiĝas.

Kiel nodoj interligitaj reciproke faras reton, tiel same ĉiuj aĵoj en la mondo estas interligitaj inter si. Se iu pensas, ke nodo de reto estas nodo per si mem aŭ izolita, tio estas erara.

Nodo de reto estas nomata nodo, nur kiam ĝi koncernas aliajn nodojn. Ĉiu nodo havas sian lokon kaj respondecon rilate al aliaj nodoj.

2. Floroj floras pro serioj da pluraj kondiĉoj, kiuj alportas ilian floradon. Folioj defalas pro serioj da pluraj kondiĉoj, kiuj alportas ilian defaladon. Floroj ne aperas sendepende kaj folioj ne defalas per si mem, spitante sezonon. Ĉio havas sian alvenon kaj foriron kondiĉite; nenio povas esti sendependa, sen ajna ŝanĝiĝo.

Ĉio estiĝas de serioj da kondiĉoj kaj kaŭzoj, kaj ĉio malaperas laŭ la sama regulo; tio estas eterna kaj neŝanĝebla leĝo. Ĉio ŝanĝiĝas, nenio restas konstanta.

III
DEPENDA EKESTO

1. Kie estas la fonto de homaj malĝojo, lamento, sufero kaj agonio? Ĝi troviĝas en la fakto, ke homoj estas malvidaj kaj plenaj de deziroj.

Homoj alkroĉiĝas al la vivo de riĉeco kaj honoro, al komforto kaj plezuro, al ekscitiĝo kaj mem-dorlotado, ne sciante pri la fakto, ke la deziro al tiuj ĉi aferoj estas la fonto de homaj suferoj.

Ekde la komenco la mondo estas plena de sinsekvo da ruinigoj, aldone al la neeviteblaj faktoj de malsano, maljuniĝo kaj morto.

Sed se oni atente konsideras ĉiujn ĉi faktojn, oni nepre trovas, ke ĉe la bazo de ĉiuj suferoj kuŝas alkroĉiĝo. Se oni estas liberigita de tiuj alkroĉiĝoj, homaj suferoj finiĝas.

La kaŭzo de la alkroĉiĝoj estas malvido kaj avido.

Malvido kaj avido devenas de la fakto, ke homoj ne estas konsciaj pri la vera rezono rilate la ŝanĝiĝo de aferoj.

De malvido kaj avido venas malpura deziro al aĵoj, kiujn oni ne povas akiri efektive, sed senĉese kaj blinde serĉadas.

Pro malvido kaj avideco oni supozas distingon,

malgraŭ ke efektive distingo ne ekzistas. Origine ne ekzistas distingo inter bono kaj malbono en homa agado. Sed pro malvido oni supozas distingon kaj juĝas homan agadon bona aŭ malbona.

Pro malvido ĉiuj homoj ĉiam havas malĝustan ideon; al ili ĉiam mankas ĝusta vidpunkto; ili estas katenitaj de sia egoo kaj agadas malĝuste. Rezulte ili perdas sin en iluziaj ekzistaĵoj.

Farante siajn agojn la kampo por sia egoo, uzante la funkcion de distingo de la menso kiel semon, kovrante la menson per malvido, nutrante ĝin per la akvo de avidaj deziroj, verŝante al ĝi akvon de egoismo, oni akumulas la malĝustan koncepton kaj portas la enkorpiĝon de iluzion sur si.

2. Tial, post ĉio, estas nia propra menso, kiu naskas la iluziojn de malĝojo, lamentado, doloro kaj agonio.

Tiu ĉi tuta mondo de iluzio estas nenio alia ol ombro naskita de menso. Kaj samtempe estas tiu ĉi sama menso, kiu alportas la mondon de Vervekiĝo.

3. En tiu ĉi mondo estas tri eraraj vidpunktoj. Se oni alkroĉiĝas al ĉi tiuj vidpunktoj, ĉio en la mondo devas esti

neata.

Unue, iu diras, ke ĉiuj homaj spertoj estas bazitaj sur sorto; due, iu diras, ke ĉio estas kreita de Dio kaj regata de Lia volo; trie iu diras, ke ĉio okazas hazarde sen ajna kaŭzo kaj kondiĉo.

Se ĉio estus decidita de sorto, kaj bona agado kaj malbona agado estus antaŭdestinitaj, kaj feliĉo kaj malfeliĉo ankaŭ estus antaŭdestinitaj. Tiel ekzistus nenio, kio ne estas antaŭdestinata de sorto. Sekve ĉiu plano kaj klopodo por plibonigo aŭ progresigo estus vanaj kaj humaneco perdus esperon.

Tiel same estas la aliaj vidpunktoj. Se ĉio okazus laŭ la plano de nekonata Dio aŭ okazus tute hazarde, kian esperon por humaneco, krom obeo, ni povus atendi? Estas ne mirinide, ke tiuj, kiuj tenas tiujn ĉi opiniojn, perdas esperon kaj neglektas klopodon por agadi saĝe kaj eviti malbonon.

Efektive tiuj ĉi tri vidpunktoj estas eraraj: ĉio aperas kaj malaperas laŭ la serio da kaŭzoj kaj kondiĉoj.

LA TEORIO DE MENSO SOLA KAJ REALA STATO DE AFEROJ

I

MALKONSTANTECO KAJ SEN-EGOO

1. Kaj nia korpo kaj nia menso devenas de interplektitaj kaŭzoj kaj kondiĉoj. Sed tio ne signifas, ke ni havas egoon aŭ konstantan personecon. Nia korpo estas agregato de elementoj, tial ĝi estas malkonstanta.

Se nia korpo estus egoo, ĝi povus fari ion ajn tiel, kiel ĝi volas.

Reĝo havas la forton laŭdi aŭ puni siajn subulojn laŭ sia volo. Tamen li malsaniĝas kaj maljuniĝas kontraŭ sia intenco aŭ deziro. Tiurilate liaj riĉaĵoj kaj potenco ne disponas pri liaj deziroj.

Ankaŭ nia menso ne estas egoo. La homa menso estas agregato de kaŭzoj kaj kondiĉoj. Ĝi estas en konstanta ŝanĝiĝo.

Se nia menso estus egoo, ĝi povus fari ion ajn tiel, kiel ĝi volas. Sed nia menso ofte forflugas de tio, kion ni trovas bona, kaj ĉasas malbonaĵon kontraŭvole. Nenio

okazas ĝuste tiel, kiel la menso deziras.

2. Se temas pri la demando, ĉu nia korpo estas konstanta aŭ malkonstanta, oni devas respondi, “malkonstanta.”

Se temas pri la demando, ĉu malkonstanta ekzistaĵo estas feliĉa aŭ suferiga, oni ordinare nepre respondas, “suferiga.”

Se ni kredas, ke tiel malkonstanta ekzistaĵo, tre ŝanĝiĝebla kaj plena de suferoj, estas egoo-personeco, tio estas serioza eraro.

La homa menso ankaŭ estas malkonstanta kaj suferiga; ĝi havas nenion, kio povus esti nomata egoo-personeco.

Niaj korpo kaj menso, kiuj konsistigas individuan vivon, kaj la ekstera mondo ĉirkaŭanta nin estas tute apartaj de la koncepto de “mi” aŭ “mia”.

La menso, kiun kovras malpuraj deziroj kaj malsaĝeco, obstine persistas en falsa imago pri “mi” aŭ “mia”.

Kaj nia korpo kaj ĝiaj eksteraĵoj devenas de kaŭzoj kaj kondiĉoj kunlaborantaj, do ili senĉese ŝanĝiĝas kaj ne venas al fino.

La homa menso senfine ŝanĝiĝanta estas sama kiel fluanta akvo de rivero, aŭ kiel flagranta flamo de kandelo; ĝi saltadas de loko al loko, same kiel simio, neniam haltante eĉ por unu momento.

Saĝulo, vidante kaj aŭdante tion ĉi, devas forĵeti alkroĉiĝon al korpo kaj menso, se li volas atingi Vervekiĝon.

3. Estas kvin aferoj, kiujn neniu povas plenumi en tiu ĉi mondo: la unua, ĉesi maljuniĝi, havante korpon maljuniĝontan; la dua, ĉesi malsaniĝi, havante korpon malsaniĝontan; la tria, ĉesi morti; la kvara nei estingiĝon de aĵoj estingiĝontaj; la kvina, nei elĉerpiĝon de aĵoj elĉerpiĝontaj.

Ordinaraj homoj en la mondo senescepte pli aŭ malpli frue alfrontas tiujn ĉi faktojn, kaj plejmulte da ili konsekvence suferas, sed tiuj, kiuj aŭdis la instruon de Budho, ne havas suferon, komprenante, ke la menciitaj faktoj estas neeviteblaj.

En tiu ĉi mondo troviĝas kvar veroj: la unua, ĉiuj viv-estaĵoj ekestas de malvido; la dua, ĉiuj objektoj de deziroj estas malkonstantaj, malcertaj kaj suferplenaj; la tria, ĉiuj estaĵoj ankaŭ estas malkonstantaj, malcertaj kaj suferplenaj; la kvara, oni povas trovi nenion, kio estas nomata "egoo", kaj ne troviĝas io "mia" en la mondo.

Tiuj ĉi veroj, ke ĉio estas malkonstanta, ŝanĝiĝema kaj egomanka, ne havas rilaton kun la fakto de apero aŭ neapero de Budho en la mondo. Tiuj ĉi veroj estas certaj. Budho eksciis tion ĉi kaj predikas Darmon al ĉiuj homoj.

II

LA TEORIO DE MENSO SOLA

1. Kaj iluzio kaj Vervekiĝo devenas de menso, kaj ĉiuj ekzistaĵoj kaj fenomenoj estiĝas de la funkcio de menso, same kiel el maniko de ĵonglisto ekaperas diversaj aĵoj.

La aktivecoj de menso estas senlimaj. Ili formas la medion de nia vivo. Malpura menso ĉirkaŭigas sin per malpuraj aĵoj. Pura menso ĉirkaŭigas sin per puraj aĵoj. Tial niaj ĉirkaŭaĵoj estas senlimaj same kiel la aktivecoj

de menso.

Kiel artisto desegnas pentraĵon, tiel same la aktivecoj de menso kreas sian eksteraĵon. Dum la eksteraĵoj kreitaj de Budho estas puraj kaj liberaj de arda pasio, tiuj kreitaj de ordinaraj homoj ne estas tiaj.

La menso elvokas multspecajn formojn, same kiel lerta pentristo kreas bildoj pri diversaj mondoj. Troviĝas nenio, kio ne estas kreita de la menso. Budho, nia menso kaj viv-estaĵoj ne diferencas en la kapablo krei ĉion ajn.

Budho ĝuste komprenas, ke ĉio devenas de la menso. Tiuj, kiuj scias tion, povas vidi veran Budhon.

2. Sed tiu ĉi menso, kiu kreas sian eksteraĵon, neniam estas libera de timoj, lamentoj aŭ ĉagrenoj ne nur en estinteco sed ankaŭ en estanteco kaj estonteco, ĉar ili devenas de malvido kaj avareco.

De malvido kaj avareco la mondo de iluzio komenciĝas, kaj ĉiu vasta komplekso de kaŭzoj kaj kondiĉoj ekzistas nenie alie ol en menso.

Iluzio, kiu estas nomata “naskiĝo-kaj-morto”,

devenas de menso kaj ekzistas en menso. Tial, kiam forpasas la menso, kiu koncernas naskiĝo-kaj-morton, la mondo de naskiĝo-kaj-morto ankaŭ forpasas.

Ne-vervekiĝinta vivo ekestas de menso, kiu estas konfuzita de iluzia mondo. Kiam ni lernas kaj scias, ke iluzia mondo ne ekzistas ekstere de menso, nia konfuzita menso fariĝas klara; kiam ni ĉesigos krei malpurajn eksteraĵojn, ni atingos Vervekiĝon.

Tiamaniere tiu ĉi mondo de naskiĝo-kaj-morto estas kreita de menso, estas submetita kaj regata de menso; menso estas mastro de ĉiu situacio. La mondo de sufero estas alportita de la homa menso plena de iluzioj.

3. Tial ĉio en tiu ĉi mondo estas kreita, reguligita kaj regata de menso. Kiel radoj sekvas bovon tirantan ĉaron, tiel same suferoj sekvas la homon, kiu parolas kaj agadas kun malpura menso.

Sed se ni parolas aŭ agadas kun bona menso, feliĉo sekvas nin, ĝuste kiel ombro sekvas figuron. Kiuj agadas malbone, tiujn sekvas la penso, “mi faris malbonaĵon,” kaj la memoro pri la ago akumuliĝas kaj poste alportos neeviteblan rekompencon. Sed kiuj agadas kun bona intenco, tiuj sentas feliĉon, pensante “mi faris bonaĵon,” kaj la penso, ke bona ago alportas daŭran feliĉon en la

posta vivo, faras ilin ankoraŭ pli feliĉaj.

Se nia menso estas malpura, la vojo fariĝas neglata kaj peniga, kaj pro tio ni stumblas; multaj faloj kaj ega doloro atendas. Sed se nia menso estas pura, la vojo estas glata kaj ni povas piediri trankvile.

Kiuj ĝuas puran korpon kaj menson, tiuj piediras sur la vojo al Budheco, tranĉante la reton de egoismaj pensoj kaj malbonaj deziroj. Kiuj estas trankvilaj en menso, tiuj akiras pacon en la menso kaj povas kulturi sian menson tage kaj nokte kun pli da diligento.

III

REALA STATO DE AFEROJ

1. Ĉar ĉio en tiu ĉi mondo devenas de kaŭzoj kaj kondiĉoj, oni ne povas trovi fundamentan distingon inter aĵoj. Ŝajnaj distingoj ekzistas pro niaj absurdaj kaj antaŭjuĝaj pensoj.

En la ĉielo ekzistas nenio distinganta orienton de okcidento; ni kreas distingojn el nia propra menso kaj kredas pri ilia realeco.

En matematiko, ĉiu el la nombroj de unu ĝis infinito estas kompleta per si mem kaj ne portas distingon de kvanto en si mem; sed ni kreas distingon pro nia propra konveno, por ke ni povu indiki diversajn sumojn.

Esence ne ekzistas la distingo inter la proceso de vivo kaj tiu de detruo, sed oni kreas distingon kaj nomas unu naskiĝo kaj alian morto. Pri agado ne estas distingo inter ĝusto kaj malĝusto, sed oni kreas distingon pro sia propra konveno.

Budho detenas sin de tiuj ĉi distingoj, kaj rigardas la mondon kvazaŭ pasantan nubon. Por Budho ĉiu difinitiva aĵo estas iluzio. Li scias, ke ĉio ajn, kion menso kaptas aŭ forĵetas, estas sensubstanca; Li tial evitas enfalejon de imagoj kaj distingaj pensoj.

2. Ni ligiĝas al ĉio pro nia propra imagita konveno kaj komforto; ni alteniĝas al sano, riĉeco, honoro, kaj alkroĉiĝas al vivo efemera.

Ni faras arbitran apartigon inter ekzisto kaj ne-ekzisto, bono kaj malbono, kaj ĝusto kaj malĝusto. Por ni vivo estas daŭro de ligiĝo kaj alkroĉiĝo, kaj kaŭze tio ni devas preni sur nin iluziojn, dolorojn kaj suferojn.

Iam estis unu homo longe vojaĝanta; li venis al granda rivero. Li pensis: “Tiu ĉi bordo de la rivero estas malfacila kaj danĝera por piediri, sed la transa bordo ŝajnas pli facila kaj senĝena. Kiel mi tamen povas transiri?” Li faris floson el branĉaj lignoj kaj kanoj, per kiu li povis alveni al la transa bordo. Tiam li pensis: “Tiu ĉi floso estis tre utila por transiri la riveron, tial mi ĝin ne forĵetu, sed portu kun mi.” Tiel li propravole prenis sur sin nenecesan ŝarĝon. Ĉu li estas saĝa homo?

Tiu ĉi parabolo instruas, ke ni devas ne alkroĉiĝi eĉ al bonaĵo kaj forĵeti ĝin, kiam ĝi fariĝis nenecesa, des pli tiel, se temas pri malbonaĵo. Budho evitas senutilajn kaj nenecesajn diskutojn, tion farante regulo de Sia vivo.

3. Ĉio ne venas nek iras; ne aperas nek malaperas; tial oni ion ne akiras nek perdas.

Budho instruas: ĉiuj aĵoj ne aperas nek malaperas, ĉar ili transcendas kategorion de ekzisto kaj ne-ekzisto. T.e. ĉio estas konkordo kaj serio da kaŭzoj kaj kondiĉoj; ĉio ne ekzistas per si mem, tiel oni povas diri, ke ĉio estas ne-ekzistanta. Samtempe, ĉar ĝi havas relativan kunligon kun kaŭzoj kaj kondiĉoj, oni povas diri, ke ĝi ne estas ne-ekzistanta.

Alkroĉiĝi al aĵo, vidante ĝian formon, estas la fonto de iluzio. Se oni ne alkroĉiĝas al la formo, la falsaj imagoj kaj absurdaj iluzioj ne venas. Vervekiĝo signifas vidi tiun ĉi veron kaj esti liberigita de tiaj malsaĝaj iluzioj.

Vere la mondo similas al sonĝo, kaj la trezoroj de la mondo estas samaj kiel allogaj miraĝoj. Same kiel ŝajna distanco en pentraĵo, aĵo ne havas realecon en si mem; ĝi similas al aeroflagreto.

4. Kredi, ke aĵoj kreitaj de nekalkulebla serio da kaŭzoj kaj kondiĉoj povas daŭri eterne, estas serioza miskompreno; tiu ĉi estas nomata la teorio de konstanteco. Kontraŭe, kredi, ke aĵoj tute malaperas, estas nomata la teorio de ne-ekzisto.

Tiuj ĉi nocioj de eterna vivo kaj eterna morto, de ekzisto kaj ne-ekzisto, estas aplikeblaj ne al la esenca karaktero de aĵoj, sed nur al iliaj supraĵaj figuroj, kiujn oni vidas per malklaraj homaj okuloj. Instigite de deziroj, homoj ekrilatas kaj alkroĉiĝas al tiuj ĉi supraĵaj figuroj. Sed en sia esenca eco aĵoj malhavas ĉi tiajn distingojn kaj alkroĉiĝojn.

Pro tio, ke ĉiuj aĵoj devenas de serioj da kaŭzoj kaj kondiĉoj, iliaj aspektoj estas konstante ŝanĝiĝantaj; t.e. en ili ne troviĝas eterneco, kaj aŭtentikaj substancoj mankas

al ili. Pro tiu ĉi konstanta ŝanĝiĝo de la aspektoj, oni komparas aĵojn kun miraĝoj aŭ sonĝoj. Sed spite de tiu ĉi konstanta ŝanĝiĝo de la aspektoj, aĵoj en sia esenca eco estas konstantaj kaj senŝanĝaj.

Rivero aperas kiel rivero por ni, sed al malsata demono, kiu vidas fajron en akvo, ĝi ne ŝajnas rivero. Tial, kvankam paroli kun ordinara homo pri ekzisto de rivero estas senprobleme, tamen kun la demono estas sensence.

Ni povas diri pri ĉio la samon kiel ĉi tiu rivero; aĵoj estas samaj kiel iluzioj. Ni ne povas diri, ke aĵoj ekzistas, nek ke ili ne-ekzistas.

Estas erare rigardi ĉi tiun efemeran vivon kiel senŝanĝan veran vivon. Tamen ni ne povas diri, ke ekster ĉi tiu mondo de ŝanĝo kaj ŝajno estas alia mondo de eterneco kaj vero. Estas erare rigardi ĉi tiun mondon kiel provizoran mondon, tiel same kiel realan mondon.

Malkleraj homoj supozas, ke tiu ĉi mondo estas reala, kaj daŭrigas sian agadon sur tia absurda supozo. Sed ĉar tiu ĉi mondo estas nur iluzio, iliaj agadoj bazitaj sur eraro kondukas ilin nur al damaĝo kaj sufero.

Konstatinte, ke la mondo estas nur iluzio, saĝaj homoj ne agas sub la erara supozo, ke ĝi estus reala. Tial ili povas eviti suferon.

IV

LA MEZA VOJO

1. Tiuj, kiuj intencas paŝi sur la vojo al Vervekiĝo, devas atente eviti du ekstremojn. La unua, estas la ekstremo de diboĉa vivo satiganta korpajn dezirojn. La dua, estas la mala ekstremo, kiu emas veni al tiu, kiu volas rezigni la nunan vivon kaj iri al tro asketa disciplino, torturante siajn korpon kaj menson senrezone.

La Nobla Vojo, kiu transcendas tiujn ĉi du ekstremojn kaj kondukas al Vervekiĝo, saĝo kaj paco de menso, povas esti nomata la Meza Vojo. Kio estas la Meza Vojo? Ĝi konsistas el la Okera Nobla Vojo: Ĝusta Vido, Ĝusta Penso, Ĝusta Parolo, Ĝusta Agado, Ĝusta Vivtenado, Ĝusta Klopodo, Ĝusta Atentado, kaj Ĝusta Koncentrado.

Kiel jam menciite, ĉiuj aĵoj aperas kaj malaperas

pere de senfina serio da kaŭzoj kaj kondiĉoj. Malsaĝuloj vidas vivon kiel ekziston aŭ ne-ekziston, sed saĝuloj vidas ion ajn trans ekzisto aŭ ne-ekzisto; tio ĉi estas la ĝusta vidpunkto de la Meza Vojo.

2. Supozu jene ; unu ŝtipo flotas sur granda rivero. Se la ŝtipo ne surbordiĝas, aŭ ne subakviĝas, aŭ ne depreniĝas, aŭ ne putriĝas, ĝi finfine atingos la maron.

Se ni ne estas alligitaj al vivo de diboĉado, aŭ ne estas alligitaj al asketisma vivo; se ni ne fieras pri nia virto aŭ ne estas alligitaj al nia malbona agado; se ni ne persistas en Vervekiĝo, nek malestimas iluzion, nek timas ĝin, tio signfas, ke ni sekvas la Mezan Vojon.

Grava afero por ni sekvantoj de la vojo al Vervekiĝo estas, ke ni evitu esti kaptitaj kaj implikitaj de ia ajn ekstremo; tio estas, ke ni ĉiam sekvu la Mezan Vojon.

Sciante, ke ĉio ne ekzistas nek ne-ekzistas, memorante, ke ĉio havas sonĝo-similan naturon, ni devas eviti esti kaptitaj de fiero aŭ laŭdo pro siaj bonaj agadoj; kaptitaj kaj implikitaj de io ajn alia.

Se ni ne volas esti kaptitaj de la sekvo de niaj deziroj, ni devas lerni ĝuste en la komenco, ke alkroĉiĝi al

io alportas nenion bonan, kaj ni devas alkutimiĝas lasi ĉion. Ni neniam devas alkroĉiĝi al ekzisto nek al ne-ekzisto, al io ajn interna nek al ekstera, al bonaĵo nek al malbonaĵo, al ĝustaĵo nek al malĝustaĵo.

Kiam ni alligiĝas al io, ĝuste tiumomente tuj komenciĝas vivo de iluzio. Tial tiu, kiu sekvas la Noblan Vojon al Vervekiĝo, ne tenas en si bedaŭrojn, ne havas antaŭjuĝojn, sed estas trankvila kaj paca en sia menso, kio ajn okazas.

3. Vervekiĝo ne havas ian difinitan formon aŭ naturon, per kiu ĝi povas manifesti sin; do, en Vervekiĝo mem ne troviĝas io, kio estu vervekita.

Vervekiĝo ekzistas nur pro iluzio kaj malvido; se ili malaperas, Vervekiĝo ankaŭ malaperas. Kaj la malo ankaŭ estas vera. Iluzio kaj malvido estas, nur kiam Vervekiĝo estas; kiam Vervekiĝo ĉesas, iluzio kaj malvido jam ne estas.

Tial estu singardema kontraŭ la penso rigardi Vervekiĝon kiel ian "ekzistaĵon", de kiu oni estas katenita, por ke Ĝi ne fariĝu obstaklo. Kiam la menso en mallumo eniras en lumon, mallumo forpasas. Kaj kun ĝia forpaso la afero, kiun oni nomas Vervekiĝo, ankaŭ forpasas.

Dum ni deziras Vervekiĝon kaj serĉadas ĝin, tio signifas, ke iluzio ankoraŭ restas ĉe ni; tial tiuj, kiuj sekvas la vojon al Iluminiĝo, devas ne teni ĝin kiel realaĵon, kaj kiam ni akiras Vervekiĝon, ni devas ne resti en ĝi.

Kiam ni atingas Vervekiĝon en tiu ĉi senco, ĉio fariĝas Vervekiĝo en si mem tiel, kiel ĝi estas; tial ni devas sekvi la vojon al Vervekiĝo ĝis la grado, ke en nia penso sekularaj deziroj kaj Vervekiĝo fariĝas identaj tiel, kiel ili estas.

4. Tiu ĉi koncepto pri universala unueco — ke aĵoj en sia esenca naturo havas nenian distingajn markojn — estas nomata "Ŝunjato". "Ŝunjato" signifas mankon de substanco aŭ ne-substancecon, ne-naskiĝon, mankon de mem-naturo, ne-dualecon. Ĉar aĵoj en si mem ne havas formon aŭ karakterizon, ni ne povas paroli pri ili, kiel ekzemple ke ili estas naskitaj aŭ estas detruitaj. Pri la esenca naturo de aĵoj troviĝas nenio, kio povas esti skribita per vortoj, kiuj faras distingon inter aĵoj; ĝuste tial aĵoj ne havas substancon.

Kiel jam montrite, ĉio aperas kaj malaperas pro kaŭzoj kaj kondiĉoj. Nenio ekzistas tute sola; ĉio rilatas al

ĉio alia.

Kie ajn estas lumo, tie estas ombro; kie ajn estas longeco, tie estas mallongeco; kie ajn estas blanko, tie estas nigro. Ĝuste tiel, la mem-naturo de aĵoj ne povas ekzisti sola, tial ili estas nomataj sensubstancaj.

De la sama rezono, Vervekiĝo ne povas ekzisti ekster malvido, kaj malvido ne povas ekzisti ekster Vervekiĝo. Ĉar ambaŭ ne diferencas inter si en sia esenco, tie ne troviĝas dualeco.

5. Homoj kutime pensas pri si mem, ke ili estas ligitaj al naskiĝo kaj morto. Sed efektive ne troviĝas substanco en tiaj konceptoj.

Ĉar homoj tenas en sia sino la ideon de ego-personeco, ili alkroĉiĝas al la ideo de posedo. Sed ĉar efektve ne troviĝas tia aĵo kiel "egoo", ankaŭ ne troviĝas tia aĵo kiel posedaĵoj. Kiam homoj povas klarvidi tiun ĉi veron, ili povos ankaŭ klarvidi la veron pro "ne-dualeco".

Homoj tenas la distingon inter pureco kaj malpureco. Sed en la naturo de aĵoj, ne troviĝas tia distingo. Ĝi aperas nur el falsaj kaj absurdaj imagoj en ilia

menso.

Tiel same homoj apartigas bonon de malbono, kaj ligiĝas al tio, sed bono kaj malbono ne ekzistas sendepende unu de la alia. Tiuj, kiuj sekvas la vojon al Vervekiĝo, neas dualecon; la vojo kondukas ilin ne al laŭdo de bono nek al kondamno de malbono, ne al malrespekto de bono nek al tolero de malbono.

Homoj kompreneble timas malfeliĉon kaj deziras feliĉon; sed se oni atente ekzamenas la distingon, malfeliĉo ofte estas feliĉo kaj inverse. Saĝulo lernas vid-al-vide la ŝanĝiĝantan cirkonstancon de vivo kun justa spirito, ne ravite de sukceso, kaj ne deprimite pro malsukceso. Tiel oni klare komprenas la veron de ne-dualeco.

Tial, tiuj vortoj, kiuj esprimas rilatojn de dualeco — kiel ekzemple ekzisto kaj ne-ekzisto, vulgara pasio kaj vera scio, pureco kaj malpureco, bono kaj malbono — estas uzataj nur en homa pensado sed ne estas troveblaj en la naturo de aĵoj. Kiam homoj detenas sin de tiuj vortoj kaj de emocioj naskitaj de la vortoj, ili klare vidas la universalan veron pri Ŝunjato.

6. Puraj kaj bonodoraj lotusoj floras ne sur pura ebenaĵo nek sur tero, sed en malpura kota akvo. Tiel

same, en sterko de vulgaraj pasioj ĝermas pura Vervekiĝo de Budheco. Eĉ eraraj opinioj naskitaj de herezoj kaj iluzioj pro vulgaraj pasioj povas esti semoj de Budheco.

Se plonĝisto volas akiri perlojn, li devas kuraĝe descendi al la fundo de maro spite de danĝeroj, ekz. dentizitaj koraloj kaj malicaj ŝarkoj. Tiel same ni devas alfronti la danĝerojn de vulgaraj pasioj, se ni volas akiri la valoran perlon de Vervekiĝo. Ni unue devas migri inter montaj rokoj de egoismo kaj memfiero, antaŭ ol ĉe ni estiĝas la deziro trovi vojon, kiu kondukas nin al Vervekiĝo.

Estas leĝendo pri iu ermito, kiu havis grandan deziron trovi la veran vojon, grimpante sur monton de glavoj kaj forĵetante sin en fajron; tiam li ne estis vundita ne bruligita, sed sentis sin refreŝigita. Tiu, kiu riskas la danĝeron de la vojo, renkontas freŝan venteton blovantan sur glava monto de memfiero kaj inter fajro de malamo, kaj finfine klarvidas, ke memfiero kaj vulgaraj pasion, kontraŭ kiuj li/ŝi luktadis kaj suferadis, estas nenio alia ol Vervekiĝo.

7. Instruo de Budho kondukas nin al ne-dualeco, for de la distingema koncepto de du kontraŭaj vidpunktoj. Estas erare, se oni serĉadas aĵojn imagitajn kiel bonaj kaj ĝustaj

kaj evitadas aĵojn imagaitajn kiel malbonaj kaj pekaj.

Se oni persistas en la opinio, ke ĉio estas malplena kaj transira, tio estas eraro, same kiel oni insistas, ke ĉio estas realaĵo kaj ne ŝanĝiĝas. Se oni alkroĉiĝas al sia ego-personeco, tio estas erara, ĉar tio ne utilas al solvo de malkontento kaj suferado. Sed se oni kredas, ke egoo ne ekzistas, tio ankaŭ estas eraro kaj ne utilas al praktiko de la vojo al vero. Se oni asertas, ke ĉio estas suferiga, tio ankaŭ estas eraro; se oni asertas, ke ĉio estas feliĉiga, tio ankaŭ estas eraro. Budho instruas la Mezan Vojon transcendantan tiujn ĉi du kontraŭajn konceptojn, en kiu dualeco mergiĝas en unueco.

LA NATURO DE BUDHO

I

LA MENSO DE PURECO

1. Estas multaj diferencoj kaj gradoj en homaj intelektoj; iuj estas saĝaj, iuj estas malsaĝaj, iuj estas bonkoraj, iuj estas malicaj, iuj estas facile gvideblaj, iuj estas malfacile gvideblaj, iuj posedas puran menson, iuj posedas menson malpurigitan; sed ĉi tiaj diferencoj estas nekonsiderindaj, se temas pri la atingo de Vervekiĝo. La mondo estas simila al lageto plena de multspecaj lotusaj floroj; troviĝas floroj de multaj diversaj koloroj. Iuj estas blankaj, iuj estas rozkoloraj, iuj estas bluaj, iuj estas flavaj; iuj kreskas en akvo, iuj malvolvas siajn foliojn sur akvo, kaj iuj levas siajn foliojn super akvo. Homo havas pli multajn diferencojn. Estas diferenco de sekso, sed ĝi ne estas esenca diferenco, ĉar kun taŭga trejnado kaj viro kaj virino povas atingi Vervekiĝon.

Por fariĝi trejnisto de elefanto oni devas posedi kvin kvalifikojn: bonan sanstaton, konfidon, diligentecon, sincerecon al sia celo, kaj saĝon. Por sekvi la Budhan Noblan Vojon al Vervekiĝo oni devas posedi la samajn kvin bonajn kvalitojn. Se oni havas tiujn ĉi kvalitojn, tiam, sendepende de genro, oni povas atingi Vervekiĝon. Por lerni la instruon de Budho ne necesas longa tempo,

ĉar ĉiuj homoj havas la naturon, kiu ebligas ilin atingi Vervekiĝon.

2. Praktikante la vojon al Vervekiĝo, ni vidas Budhon kun niaj propraj okuloj kaj fidas Budhon kun nia propra menso. La okuloj, kiuj vidas Budhon, kaj la menso, kiu fidas Budhon, estas la samaj okuloj kaj la sama menso, kiuj estis migrantaj en la mondo de naskiĝo-kaj-morto ĝis la tago, kiam ni komencis praktikadon.

Se reĝa lando estas plagita de banditoj, reĝo devas trovi, kie estas ilia citadelo, antaŭ ol li atakas ilin. Tiel same, se iu estas ĝenata de vulgaraj pasioj, tiu devas unue serĉi ilian originon.

Kiam iu estas en ĉambro kaj malfermas siajn okulojn, unue tiu vidas la internon de la ĉambro kaj nur poste eksteren tra la fenestro. Same kiel ĉi tiel, ni ne povas lasi la okulojn vidi eksteraĵojn, anatŭ ol ni rekonas nian propran internaĵon.

La menso estas ene de la korpo, tial ĝi devas unue koni la internaĵon. Sed ĝenerale homoj estas absorbitaj de eksteraj aferoj kaj ŝajne ne multe scias aŭ atentas aĵojn en la korpo.

Se la menso estus ekster la korpo, ĝi ne povus kontaktiĝi kun la bezonoj de la korpo. Sed efektive la korpo sentas, kion la menso scias, kaj la menso scias, kion la korpo sentas. Tial, oni ne povas diri, ke la homa menso estas ekster la korpo. Kie, do, ekzistas la substanco de la menso?

3. Ekde la nekonata pasinteco homoj vagadis en malvido, kondiĉite de siaj propraj agoj kaj trompite de du fundamentaj eraraj koceptoj.

Unue, ili kredas, ke la diskriminacianta menso, kiu kuŝas ĉe la radiko de tiu ĉi vivo de naskiĝo-kaj-morto, estas ilia reala naturo; due, ili ne scias, ke ili posedas tiun puran menson de Vervekiĝo, kiu estas ilia vera naturo, kaj kiu estas kaŝita malantaŭ la distingema menso.

Kiam iu levas sian manon pugnigitan, la okuloj vidas ĝin, kaj la menso rekonas ĝin, sed tiu menso ĝin rekonanta ne estas vera menso.

La rekonanta kaj distingema menso devenas de imagataj diferencoj, kiujn kreas avido kaj aliaj humoroj rilataj al la memo. La rekonantan menson determinas

kaŭzoj kaj kondiĉoj, tial al ĝi mankas ia mem-substanco, kaj ĝi konstante ŝanĝiĝas. Sed, ĉar homoj kredas, ke tiu ĉi menso estas reala, iluzio penetras en kaŭzojn kaj kondiĉojn, kio naskas suferadon.

Kiam iu malfermas sian manon pugnigitan, la menso perceptas tion; sed kiu moviĝas? Ĉu la menso, aŭ la mano? Aŭ neniu el ili? Se la mano moviĝas, la menso moviĝas sekvante ĝin, kaj tiel inverse; sed la moviĝanta menso estas nur supraĵa ekapero de menso; ĝi ne estas vera kaj fundamenta menso.

4. Fundamente, ĉiu homo havas puran kaj klaran menson. Tamen polvo de vulgaraj deziroj estiĝintaj de cirkonstanco kovras ĝin. La malpurigita menso ne estas esenco de homa naturo. Io estas aldonita al ĝi, same kiel entrudinto aŭ gasto en domo, sed ne ĝia mastro.

La luno ofte kaŝiĝas malantaŭ nuboj. Sed nuboj ne povas movi la lunon, kaj ĝi restas pura kaj senmakula. Tial ni ne devas iluzie pensi, ke tiu ĉi makulita menso estas nia propra efektiva menso.

Ni devas konstante rememori tiun ĉi fakton, strebante veki en ni mem la puran kaj senŝanĝan fundamentan menson de Vervekiĝo. Se ni alkroĉiĝas al ŝanĝiĝanta kaj malpurigita menso, aŭ se ni estas iluziitaj

de trompaj ideoj, ni devas migradi en la mondo de iluzio.

Iluzio kaj malpureco de homa menso naskiĝas de avido kaj ankaŭ de reagoj al ŝanĝantaj cirkonstancoj.

La menso, kiu neniam estas malordigita de okazaj aferoj kaj restas pura kaj trankvila sub ĉiaj cirkonstancoj, estas la vera menso, kaj ĝi devas esti nia mastro.

Oni ne povas diri, ke gastejo malaperas, kiam gastoj momente ne estas; tiel same oni ne povas diri, ke vera memo malaperas, kiam momente malestas malpurigita menso, kiu estiĝas de ŝanĝantaj cirkonstancoj de vivo. Tio, kio ŝanĝiĝas laŭ ŝanĝiĝantaj kondiĉoj, ne estas la vera naturo de menso.

5. Ni supozu aŭditorion, kiu estas luma dum sunbrilo kaj malluma post sunsubiro.

Ni povas pensi, ke la lumo devenas de la suno kaj la mallumo venas kun nokto. Sed ni ne povas pensi sammaniere pri la menso, kiu perceptas lumon kaj mallumon. Kvankam oni povas atribui lumon kaj mallumon al la suno, la menso, kiu sensas ilin, povas esti atribuita al nenio. Ĝi povas reveni nur al la vera naturo, al sia fundamenta naturo.

Tiu, kiu rimarkas momentan ŝanĝiĝon de lumeco kaj mallumeco, estas nur portempa menso.

Tiu, kiu havas diversajn sentojn de momento al momento kun la ŝanĝiĝanta cirkonstanco de vivo, estas nur portempa menso; ĝi ne estas vera kaj reala menso. La fundamenta kaj vera menso, kiu klarvidas lumon kaj mallumon, estas la vera homa naturo.

Portempaj sentoj pri bono kaj malbono, aŭ pri amo kaj malamo, devenas de ĉirkaŭaĵoj kaj ŝanĝiĝantaj eksteraj kondiĉoj; tiaj sentoj estas nur momentaj reagoj kaŭzitaj de malpuraĵoj akumulitaj en la homa menso.

Malantaŭ la deziroj kaj vulgaraj pasioj entenataj en la menso kuŝas klara, nemakulita, fundamenta kaj vera esenco de menso.

Akvo formas sin ronda en ronda ujo kaj kvadrata en kvadrata ujo, sed akvo mem ne havas specifan formon. Oni ofte forgesas tiun ĉi fakton.

Homoj pensas, ke iuj aĵoj estas bonaj aŭ malbonaj, ŝatindaj kaj malŝatindaj, kaj distingas ekziston kaj ne-

ekziston; tiamamiere ili suferadas, katenite de tiu ĉi impliko kaj alkroĉiĝante al ĝi.

Se homoj nur forlasos sian alkroĉiĝon al tiuj ĉi imagaj kaj falsaj distingoj kaj restarigas la purecon de sia origina menso, tiam ilia menso kaj korpo liberiĝos de malpureco kaj suferado; ili gajnos trankvilecon kune kun libereco.

II
LA NATURO DE BUDHO

1. Ni supre parolis pri la pura kaj vera menso kiel fundamento. Ĝi estas la naturo de Budho, t.e. la semo de Budheco.

Se ni metas lenson inter la suno kaj mokso, ni povas akiri fajron. De kie la fajro venas? Kvankam la lenso estas treege malproksima de la suno, fajro certe aperas sur la mokso tra la lenso. Se la mokso ne havas la naturon bruli, fajro neniel estiĝas ĉi tie.

Laŭ la sama maniero, kiam la Saĝo de Budho

koncentriĝas al la homa menso, ĝia vera naturo, kiu estas Budheco, bruliĝas, kaj la fajro lumigas menson de la homoj kaj vekas konfidon al Budho. Budho tenas la lenson de Saĝo antaŭ ĉiuj homoj, kaj tiel ilia konfido progresas.

2. Homoj ofte malatentas sian veran menson por Budheco, estas katenitaj de la impliko de vulgaraj pasioj, alkroĉiĝas al la distingo de bono kaj malbono, kaj lamentas pri sia sklaveco kaj suferado.

Kial homoj, posedantaj la fundamentan kaj puran menson, tamen alkroĉiĝas al iluzioj kaj pelas sin al migrado en la mondo de iluzio kaj suferado, kovrante sian propran naturon de Budho, malgraŭ la lumo de Budha Saĝo direktita al ili?

Iam estis iu viro; li konsterniĝis antaŭ spegulo, ĉar li ne trovis siajn kapon kaj vizaĝon sur ĝi. Tamen lia vizaĝo vere ne malaperis. Li nur malatente rigardis malantaŭan flankon de la spegulo.

Estas tiel same malsaĝe kaj nenecese, ke iu suferadas, pro tio ke tiu ne povas akiri Vervekiĝon spite al sia klopodo. Nenie estas malsukceso en Vervekiĝo; malsukceso kuŝas en tiuj homoj, kiuj dum longa tempo serĉas Vervekiĝon en sia falsa menso kaj ne komprenas,

ke ilia menso ne estas vera sed iluzia kaj kaŭzita de amasigo de avarecoj kaj iluzioj, kiuj kovras kaj kaŝas ilian veran menson.

Do, se la amasigo de falsaj imagoj estas forigita, Vervekiĝo aperos. Estas tamen mirinde, ke kiam homoj atingas Vervekiĝon, ili trovas, ke Vervekiĝo ne povas ekzisti sen falsaj imagoj.

3. La naturo de Budho estas senlima. Eĉ se malicaj homoj naskiĝas en la mondo de besto aŭ de malsata demono, aŭ falas en inferon, ili neniam perdas la naturon de Budho.

Kiom ajn droananta en malpuraĵoj de karno, kaŝita ĉe la radiko de vulgaraj deziroj, aŭ forgesita, la kapablo de homoj vervekiĝi, la Budheco, neniam nuliĝas.

4. Antaŭ longa tempo iu viro vizitis sian amikon kaj en lia hejmo endormiĝis ebria. Lia amiko restis apud li tiom longe kiom eblis. Sed li nun devis foriri. Li estis maltrankvila pri la estonto de la ebria amiko kaj enkudris juvelon en lian vestaĵon. Kiam la viro vekiĝis, li vagadis de loko al loko kun mizera vivtenado, ne sciante, ke lia amiko kaŝis juvelon en lian vestaĵon. Poste li renkontĝis kun sia amiko, kiu informis lin pri la juvelo en lia vestaĵo kaj konsilis lin serĉi la juvelon.

Same kiel la ebria viro de tiu ĉi rakonto, homoj migradas kun suferoj en tiu ĉi vivo de naskiĝo-kaj-morto, ne konsciante, ke en sia interno estas kaŝita pura kaj senmakula, ege valora trezoro de la naturo de Budho.

Kvankam homoj ne konscias la fakton, ke ĉiuj posedas en sia interno tiun ĉi superban naturon, kaj kiom ajn malsaĝaj kaj degenerintaj ili estas, Budho neniam perdas sian konfidon al ili, ĉar Ĝi scias, ke eĉ en la plej aĉa ulo potenciale troviĝas ĉiuj virtoj de Budheco.

Tial Budho vekas memkonscion en ili, kiuj estas trompitaj de malsaĝeco kaj ne povas vidi sian propran Budho-naturon, kondukas ilin for de iliaj iluzioj, kaj instruas al ili, ke origine ne troviĝas diferenco inter ili mem kaj Budheco.

5. Budho estas tiu, kiu jam akiris Budhecon, kaj homoj estas tiuj, kiuj havas kapablon akiri Budhecon; tio estas la tuto de la diferenco inter ili.

Tamen, se iu pensus, ke li/ŝi jam akiris Vervekiĝon, tiu trompas sin mem, ĉar tiu estas moviĝanta en la direkto al Budheco, sed tiu ankoraŭ ne atingis Budhecon.

Budha-naturo ne aperas sen diligenta klopodo, kaj la

praktikado daŭras ĝis la tuta ekfloro de Budheco.

6. Iam estis iu reĝo, kiu kunvokis kelkajn blindulojn ĉirkaŭ unu elefanto, kaj ordonis al ili palpi la elefanton. Poste li demandis ilin, "Kia estas elefanto?" Kiu tuŝis ĝian dentegon, diris, "Ĝi similas al granda karoto." Kiu tuŝis ĝian orelon, diris, "Ĝi similas al ventumilo." Kiu tuŝis ĝian nazon, diris, "Ĝi similas al pistilo." Kiu tuŝis ĝian gambon, diris, "Ĝi similas al pistujo." Kiu tuŝis ĝian voston, diris, "Ĝi similas al ŝnuro." Neniu el ili povis informi la reĝon pri ĝia reala formo.

Tiel same, ni povas parte koni homan naturon, sed estas malfacile koni la tuton de la vera naturo de homo, nome la naturon de Budho.

Ekzistas unusola ebla rimedo, per kiu la eterna naturo de homo, ne malhelpate de vulgaraj pasioj nek detruite de morto, povas esti efektivigita; t.e. per Budho kaj la Budha nobla instruo.

III

SEN-EGOECO

1. Ĝis nun ni parolis pri la naturo de Budho, kvazaŭ ĝi

estus io, kio povas esti priskribita, kaj kvazaŭ ĝi similus animo, pri kiu aliaj instruoj predikas. Sed ĝi ne estas tia.

La koncepto de “ego-personeco” estas io, kio estas imagata de mem-trompa menso, kiu unue kaptas ĝin kaj due alkroĉiĝas al ĝi. Sed oni devas forĵeti ĝin. Aliflanke la naturo de Budho estas io neesprimebla, kio la unua devas esti malkovrita. Iusence ĝi ŝajnas esti “ego-personeco”, sed ĝi ne estas egoo en la senco de “mi estas” aŭ “io mia”.

Kredi la ekziston de eterna egoo estas renversita pensmaniero, kiu supozas, ke ekzistus io neekzistanta. Nei Budha-Naturon estas erare, ĉar tio ĉi supozas, ke ekzisto estus neekzisto.

Ni klarigu tion ĉi per unu parabolo: iu patrino kondukis sian malsanan infanon al kuracisto. La kuracisto donis al ŝi medikamenton kaj instrukciis, ke ŝi ne donu al la infano mamlakton, ĝis la medikamento estos digestita.

Ŝi ŝmiris siajn mamojn per amaraĵo, por ke la infano ne suĉu mamojn. Post kiam la medikamento estis sufiĉe digestita, ŝi donis al ĝi siajn mamojn forlavinte la amaraĵon. Ŝi prenis tiun ĉi metodon por savi sian infanon pro sia amo.

Same kiel la patrino en tiu ĉi parabolo, Budho unue neas ekziston de egoo por forigi miskomprenon kaj detrui alkroĉiĝon al ego-personeco; kaj kiam la miskompreno kaj alkroĉiĝo estas forigitaj, Ĝi klarigas la realecon de vera menso, t.e. la naturo de Budho.

Alkroĉiĝo al egoo kondukas homojn al iluzio, sed konfido al sia naturo de Budho kondukas ilin al Vervekiĝo.

Jen alia parabolo: estis malriĉa virino, al kiu skatolo enhavanta oron estis donacita, sed ŝi, ne sciante tion, daŭrigis mizeran vivon, ĝis alia persono malfermis ĝin kaj montris al ŝi la oron. Budho malfermas la menson de homoj kaj montras al ili la purecon de ilia naturo de Budho.

2. Se ĉiuj havas tian naturon de Budho, kial troviĝas multaj suferoj? Kial homoj trompas kaj mortigas unu la aliajn. Kial troviĝas diferencoj inter homoj pri riĉeco aŭ rango?

Estas parabolo pri iu luktisto, kiu portis ornamaĵon el valorega juvelo sur sia frunto. Iun tagon, kiam li luktis, li estis tiel forte batita je sia frunto, ke la juvelo mergiĝis

en la karnon. Li pensis, ke li perdis la juvelon. Sed poste ĉe lia frunto estiĝis inflamo, kaj li petis kirurgon kuraci la vundon. Kiam la kirurgo venis kuraci la vundon, li trovis la juvelon enigitan en la karnon kun sango kaj puso. Li prenis spegulon kaj montris al la luktisto la juvelon.

La naturo de Budho similas al la juvelo en tiu ĉi parabolo: ĝin kovras koto kaj polvo de falsaj pens-manieroj, kaj homoj pensas, ke ili ne posedas aŭ perdis ĝin. Sed bona gvidanto malkaŝas ĝin por ili.

La naturo de Budho ekzistas en ĉiuj, kiom ajn profunde ĝin kovras ilia avareco, kolero kaj malsaĝeco, aŭ kaŝas ilia konduto kaj venĝemo. La naturo de Budho neniam estas perdiĝas nek detruiĝas. Kiam ĉiuj malpuraĵoj estos forigitaj, frue aŭ malfrue ĝi reaperos.

Kiel al la luktisto de tiu ĉi parabolo la spegulo montris la juvelon kaŝitan en karno, sango kaj puso, tiel same al homoj la lumo de Budho montras la naturon de Budho kaŝitan sub iliaj vulgaraj deziroj kaj pasioj.

3. La naturo de Budho ĉiam estas pura kaj trankvila, kiom ajn diferencaj estas la kondiĉoj kaj la cirkonstancoj de homoj. Lakto estas ĉiam blanka spite de haŭtokoloro de bovino, ĉu ruĝa, blanka aŭ nigra. Tiel same, tute ne

gravas, kiel ajn diferencaj estas homaj agadoj, kiuj faras kondiĉojn por homa vivo, aŭ kiel ajn diversaj efikoj sekvas iliajn farojn kaj pensojn.

En Hindio estas rakonto pri mistera medicina herbo, kiu kaŝe kreskis sub altaj herboj en Himalajo. Dum longa tempo oni serĉadis ĝin vane, sed finfine unu saĝulo trovis ĝin per ĝia bonodoro. Dum la tuta vivo li kolektadis tiun ĉi medicinan herbon en kuvo. Sed post lia morto, la herbo, ne trovite de aliaj homoj, restis tie kaj putriĝis. Ĝia odoro tamen disfluis al diversaj direktoj kun malsamaj nuancoj.

Tiel same, la naturo de Budho estas kovrita de altaj herboj de vulgaraj pasioj kaj tre malofte estas trovita. Sed Budho trovas ĝin kaj montras ĝin al homoj. La naturo de Budho havas unu dolĉan guston, sed ĉar homoj akceptas ĝin diversmaniere pro siaj malsamaj kapabloj, tial ili pasigas malsamajn vivojn.

4. Diamanto, la plej malmola materialo, ne povas esti rompita. Ŝtonoj povas esti muelitaj en pulvorojn, sed diamanto restas sendifekta. La naturo de Budho similas al diamanto, kaj ĝi ne estas detruebla.

La naturo de homo en ĝia korpo kaj menso povas esti rompita; sed la naturo de Budho neniam rompiĝas.

La naturo de Budho estas certe la plej admirinda karakterizaĵo en homa naturo. Budho instruas, ke malgraŭ senfinaj variaĵoj en homa naturo, ekzemple viro kaj virino, nenia diferenco ekzistas rilate al la naturo de Budho.

Por produkti puran oron estas necese fandi ercon, forpreni skorion, kaj rafini. Se homoj fandas la ercon de sia menso kaj forprenas malpuraĵojn de vulgaraj pasioj kaj egoismo, ili ĉiuj povas repreni la puran naturon de Budho.

VULGARAJ PASIOJ

I

MALPURECO DE MENSO

1. Estas du specoj de vulgaraj pasioj, kiuj malpurigas kaj kovras la purecon de la naturo de Budho.

La unua estas la pasio rilate analizon kaj diskuton, per kiu homoj deflankiĝas de vera juĝado. La dua estas la pasio rilate emocian sperton, per kiu homoj konfuziĝas pri valoro de afero.

Kaj iluzio de rezonado kaj tiu de praktikado faras la du fundamentajn malpuraĵojn de homoj, kaj en ilia bazo kuŝas la du originaj pasioj: la unua estas malvido, kaj la dua estas deziro.

La iluzio de rezonado estas bazita sur malvido, kaj la iluzio de praktikado estas bazita sur deziro. Tiuj ĉi du tendencoj, implikante unu la alian, kune faras la fonton de ĉiuj malfeliĉoj.

Se homoj estas en malvido, ili ne povas rezoni ĝuste kaj sekure. Se homoj submetiĝas al deziroj ardantaj, neeviteble sekvas ilin alkroĉiĝo, ekpreno kaj algluiĝo al

ĉio. Tiu ĉi konstanta avidemo al ĉiaj plezurigaj aĵoj vidataj kaj aŭdataj kondukas homojn al iluzioj. Kelkaj homoj submetiĝas eĉ al la deziro morti.

El tiuj ĉi fontoj, malvido kaj dezirego naskiĝas ĉiuj eblaj pasioj: avareco, kolero, malsaĝeco, eraro, indigno, ĵaluzo, flatado, trompo, fiereco, malestimo, ebrieco, egoismo k.t.p.

2. Avideco devenas de malĝusta ideo de kontentiĝo; kolero devenas de malĝusta ideo pri la cirkonstanco, kiun oni ne volas akcepti, aŭ pri kiu oni ne estas kontenta; malvido devenas de manko de la kapablo juĝi, kio estas korekta konduto.

Avideco, kolero kaj malvido estas nomataj la tri fajroj de la mondo. La fajro de avideco bruligas tiujn, kiuj pro avideco perdis sian veran menson; la fajro de kolero bruligas tiujn, kiuj pro kolero perdis sian veran menson; la fajro de malvido bruligas tiujn, kiuj perdis sian veran menson, ne povante aŭskulti kaj atenti la instruon de Budho.

Vere tiu ĉi mondo estas bruligata de multaj kaj diversaj fajroj. Jen estas fajroj de avideco, fajroj de kolero, fajroj de malvido, fajroj de stulteco kaj egoismo, fajroj de kadukiĝo, malsano kaj morto, fajroj de malĝojo,

lamentado, suferado kaj agonio. Ĉie ajn tiuj ĉi fajroj furiozas. Tiuj ĉi fajroj ne nur bruligas la memon, sed ankaŭ igas aliajn homojn suferi kaj kondukas ilin al malbonaj kondutoj en la tri sferoj: korpo, buŝo kaj menso. De la vundoj kaŭzitaj de tiuj ĉi fajroj ekestas puso, kiu infektas kaj venenas tiujn, kiuj alproksimiĝas al ili, kaj kondukas tiujn al perversa vojo.

3. Avideco ekestas, kiam oni volas esti kontenta; kolero ekestas, kiam oni estas malkontenta; malvido ekestas de malpuraj pensoj. La malbono de avideco havas etan malpurecon, sed estas malfacile forigebla; la malbono de kolero havas pli da malpureco, sed estas facile forigebla; la malbono de malvido havas multe pli gravan malpurecon, kaj estas malfacile konkerebla.

Tial homoj devas estingi tiujn ĉi fajrojn, kiam ajn kaj kie ajn ili aperas, prave juĝante, kio povas doni veran kontenton, strikte ekzamenante la menson alfronte al malkontentigaj aferoj de vivo, kaj ĉiam rememorante la instruon de Budho pri bona volo kaj kompato. Se ilia menso estas plena de saĝa, pura kaj neegoisma pens-maniero, nenie troviĝas la ebleco, ke vulgaraj pasioj burĝonas

4. Avideco, kolero kaj malvido similas al febro. Tiu, kiu havas tiun ĉi febron, nepre devas suferi kaj esti

turmentata de maldormo, eĉ se kuŝante en komforta ĉambro..

Tiu, kiu ne havas tian febron, povas facile dormi en trankvilo eĉ sur la tero kun maldika kovraĵo el folioj en vintra malvarma nokto, aŭ eĉ en malgranda fermita ĉambro en somera varmega nokto.

La tri pasioj — avideco, kolero kaj malvido — estas kaŭzoj de ĉiuj homaj veoj. Por elimini la kaŭzojn ni devas observi la preceptojn, praktiki koncentradon de menso kaj havi saĝecon. Observado de preceptoj forigas la malpuraĵon de avideco, ĝusta koncentrado de menso forigas la malpuraĵon de kolero, kaj saĝeco forigas la malpuraĵon de malvido.

5. Homaj deziroj estas senfinaj. Tio estas simila al soifo de tiu, kiu trinkas salan akvon; tiu neniam kontentiĝas kaj ties soifo pli kaj pli kreskas.

Homoj volas kontentigi sian avidecon, sed ili gajnas nur pligrandiĝintan malkontenton, kaj ilia malĝojo pli grandiĝas.

Homoj neniam povas kontentigi siajn dezirojn, kiuj ĉiam estigas maltrankvilecon kaj incitiĝon, kaj kiuj

neniam povas esti kvietigataj. Kiam la deziroj ne povas esti kontentigitaj, tio ofte igas homojn kvazaŭ frenezuloj.

Por kontentigi siajn dezirojn homoj konfliktas kaj batalas unu kontraŭ la alia: reĝo kontraŭ reĝo, vasalo kontraŭ vasalo, gepatroj kontraŭ gefiloj, frato kontraŭ frato, fratino kontraŭ fratino, amiko kontraŭ amiko; ili batalas kaj eĉ mortigas reciproke por kontentigi siajn dezirojn.

Por kontentigi siajn dezirojn ili ofte ruinigas eĉ sin mem, ŝtelante, trompante kaj adultante. Tiam ili arestite suferas pro malhonoro kaj puno.

Pro siaj deziroj ili kulpas pri siaj korpo, parolo kaj menso, spite tion, ke ili bone scias, ke kontentigo de deziro finfine alportos al ili malfeliĉojn kaj suferojn. Sed la forto de deziro estas tiel potenca. Poste ili enfalos en malluman mondon kaj tie suferados kaj agonios.

6. El ĉiuj vulgaraj pasioj ampasio estas la plej intensa, kaj aliaj diversaj pasioj sekvas ĝin.

Ampasio estas grundo, kie aliaj pasioj ĝermas kaj kreskas. Ampasio estas demono, kiu formanĝas ĉiujn bonajn agojn en la mondo. Ampasio estas vipero sin

kaŝanta en florĝardeno; ĝi venenas tiujn, kiuj venas sin amuzi per belaĵoj. Ampasio estas grimpoplato, kiu kreskas ĉirkaŭ arbo, disvolvas branĉojn, kaj fine strangolas la arbon. Ampasio etendas siajn tentaklojn en homajn emociojn kaj forsuĉas sukon de bono en homa menso, kiu fine velkas. Ampasio estas logaĵo metita de malica demono; ĝi kaptas malsaĝulojn kaj trenas ilin en la profundon de la pekoplena mondo.

Se oni donas al malsata hundo sekigitan oston ŝmiritan per sango, la hundo avide mordas ĝin, ĝis ĝi laciĝas kaj frustriĝas. Ampasio por homo estas sama kiel osto por hundo. Homoj avidas ĝin, ĝis ili elĉerpiĝas.

Se oni metas unu pecon de viando antaŭ du sovaĝajn bestojn, ili batalas kaj vundas unu la alian. Malsaĝulo portante torĉon paŝas kontraŭ vento kaj bruligas sin mem. Same kiel tiuj ĉi bestoj kaj malsaĝulo, homoj vundas kaj bruligas sin mem pro siaj vulgaraj deziroj.

7. Estas facile defendi la eksteron de nia korpo kontraŭ venena sago, sed estas neeble defendi nian menson de venena sago, kiu originas en la menso mem. Avideco, kolero, malvido kaj la pasio de egoismo — tiuj ĉi kvar venenaj sagoj naskiĝas ene de la menso kaj infektas ĝin per mortiga veneno.

Kiam homoj estas infektitaj de avideco, kolero kaj malvido, ili mensogas, hipokritas, parolas malsincere kaj insultas, kaj fine aktualigas siajn vortojn per mortigo, ŝtelo kaj adulto.

Tiujn ĉi tri malbonajn mensostatojn, kvar malbonajn parolmanierojn, kaj tri malbonajn kondutoj, — oni nomas ilin kune dek gravaj malbonoj.

Se homoj alkutimiĝas mensogi, ili senkonscie faras ĉiajn eblajn malĝustajn agojn. Antaŭ ol ili povas fari kanajlaĵon, ili devas mensogi, kaj unu fojon mensoginte, ili faras kanajlaĵon indiferente.

Avideco, dezirego, timo, kolero kaj malfeliĉo devenas de malvido. Tiamaniere malvido estas la plej fundamenta venenaĵo.

8. De deziro sekvas ago; de ago sekvas sufero; deziro, ago kaj sufero estas kvazaŭ radoj turniĝantaj senfine.

Tiu ĉi turniĝado de la radoj ne havas komencon nek finon; la homo ne povas eviti metempsikozon, t.e. ripetadon de naskiĝo-kaj-morto. Unu vivo sekvas alian vivon laŭ transmigranta cirklo en senfina ripetiĝo.

Se oni amasigas cindrojn kaj ostojn de sia korpo bruligitajn en la daŭranta transmigrado, la amaso estus alta kiel monto; se oni kolektus mamlaktojn de si suĉitajn dum sia transmigrado, la kolektaĵo estus profunda kiel maro.

Kvankam la naturon de Budho posedas ĉiuj homoj, ĝi estas tiel profunde enterigita en la malpuraj vulgaraj pasioj, ke ĝi restas nekonata dum longa tempo. Ĝuste tial sufero estas universala kaj okazas senfina ripetiĝo de mizeraj vivoj.

II
HOMA NATURO

1. Homa naturo similas al densa arbustaro, kiu ne havas enirejon kaj malfacile alireblas. Kompare dirite, la naturo de besto estas multe pli facile komprenebla ol tiu de homo. Tamen ĝenerale oni povas klasifiki homan naturon en kvar tipojn.

La unua temas pri tiuj, kiuj pro malĝusta instruo praktikas asketan vivon kaj igas sin suferantaj. La dua, tiuj, kiuj igas aliajn suferantaj per kruelo, per ŝtelo, per

mortigo, aŭ per aliaj malafablaj agoj. La tria, tiuj, kiuj igas sin mem kaj aliajn homojn suferantaj. La kvara, tiuj, kiuj mem ne suferas kaj savas aliajn el suferado. Tiuj ĉi de la lasta kategorio, sekvante la instruon de Budho, ne cedas al avideco, kolero kaj malvido, vivas en paco, afablo kaj saĝo, sen mortigi aŭ ŝteli.

2. Troviĝas tri specoj de la homo. La unua temas pri tiuj, kiuj similas al literoj ĉizitaj sur rokon; ili tuj cedas al kolero kaj tenas sian koleron dum longa tempo. La dua, tiuj, kiuj similas al literoj skribitaj sur sabloj; ili ankaŭ koleras, sed ilia kolero tuj vaporiĝas. La tria, tiuj, kiuj similas al literoj skribitaj sur fluanta akvo; ili ne tenas siajn pensojn ŝanĝiĝantajn; ili ne aŭskultas insulton nek klaĉon; ilia menso estas ĉiam pura kaj senmakula.

Troviĝas tri specoj de la homo. La unua temas pri tiuj, kiuj estas fieraj, senpripensaj kaj neniam kontentaj; ilia naturo estas facile komprenebla. La dua, tiuj, kiuj estas ĝentilaj kaj ĉiam agas post konsidero; ilia naturo estas malfacile komprenebla. La tria, tiuj, kiuj konkeris deziron komplete; ne eblas kompreni ilian naturon.

Tiel la homo povas esti klasifikita per multaj diversaj manieroj, sed malgraŭ tio, homa naturo estas malfacile komprenebla. Budho sola povas kompreni ĝin kaj per sia saĝo kondukas homojn per diversaj instruoj.

III
HOMA VIVO

1. Estas parabolo, kiu bildigas homan vivon. Iam unu viro remis sur rivero malsupren. Alia viro sur la bordo avertis lin, "Ĉesu remi tiel gaje sur la rapide fluanta rivero! Vin atendas rapidega fluo kaj danĝera kirlo, kaj cetere ankaŭ krokodiloj kaj demonoj embuskantaj en abismo. Vi pereos, se vi daŭre iras."

En tiu ĉi parabolo, "la rapide fluanta akvo" estas vivo de volupto; "remi gaje" estas lasi pasion neregata; "rapidega fluo" signifas vivon de kolero kaj sufero; "kirlo" signifas plezuron en vulgaraj pasioj; "krokodiloj kaj demonoj" aludas kadukiĝon kaj morton sekvontan la vivon de volupto kaj pasioj; "alia viro sur la bordo" estas Budho.

Estas alia parabolo. Iu viro farinte krimon forkuris. Kelkaj policistoj sekvis lin, do li volis kaŝi sin kaj descendis en puton, uzante la grimpoplanton malsupren kreskantan laŭ la muro de la puto. Kiam li estis descendanta, li vidis viperojn ĉe la fundo de la puto, do li decidis kroĉi sin al la grimpoplanto por sia sekureco. Post kelke da tempo, kiam liaj brakoj laciĝis, li trovis du

musojn, unu blanka kaj la alia nigra, ronĝantajn la grimpoplanton.

Se la grimpoplanto estas mordita, li enfalos ezn la viperojn kaj pereiĝos. Tiam, rigardinte supren, li hazarde tvovis abelujon super sia vizaĝo. De la abelujo de tempo al tempo falis gutoj de mielo. La viro tiam forgesis ĉiajn danĝerojn kaj gustumis la mielon kun ĝojo.

En tiu ĉi parabolo, “iu viro” signifas tiun, kiu naskiĝis por suferi kaj mortos sola. “Policistoj” kaj “viperoj” estas nia korpo enhavanta ĉiajn dezirojn. “Grimpoplanto” estas la kontinueco de homa vivo. “Du musoj, unu blanka kaj la alia nigra” estas la tempodaŭro, tagoj kaj noktoj, aŭ la pasantaj jaroj. “Mielo” indikas la fizikajn plezurojn, kiuj trompas suferojn pro pasanaj jaroj.

2. Estas ankoraŭ alia parabolo. Iu reĝo metis kvar viperojn en keston, kiun li lasis al sia servisto, ordonante, ke li bone zorgu pri ili, kaj avertis: se li kolerigas eĉ unu el ili, li estu mortopunita. La servisto timis tion kaj decidis forĵeti la keston kaj forkuri.

La reĝo sendis kvin policistojn por aresti lin. En la komenco ili alproksimiĝis al la servisto kun afabla sinteno kun la intenco certe akompani lin al la hejmo. Sed la servisto ne fidis al ili kaj plu forkuris al iu alia vilaĝo.

Atinginte la vilaĝon, li ekhavis vizion kaj aŭdis ies voĉon, kiu diras: ĉi tie ne troviĝas sekura ŝirmejo, kaj ses banditoj atakos lin en nokto. Do li timigite forkuris, ĝis li alvenis al furiozanta rivero, kiu malhelpis lin antaŭeniri. Konsiderante la danĝeron lin minacantan, li faris floson kaj sukcesis transiri la turbulentan fluon. Li finfine trovis sekuron kaj pacon.

"Kvar viperoj en kesto" indikas la kvar elementoj: tero, akvo, fajro, kaj vento. Ili konsistigas nian korpon. Nia korpo estas fonto de avidoj kaj malamikoj de nia bona menso. Tial li forkuris de sia korpo.

"Kvin policistoj kiuj alproksimiĝis kun afabla sinteno" signifas la kvin komponantojn: formo, sento, percepto, formivo, kaj konscio. Ili kune faras korpon kaj menson de la homo.

"Sekura ŝirmejo" signifas la ses sensorganoj, kiuj ne estas veraj ŝirmejoj post ĉio, kaj "ses banditoj" estas la ses objektoj de la ses sensorganoj. Tiel, vidante la danĝeron en la ses sensorganoj, la viro forkuris ankoraŭfoje kaj venas al la furiozanta rivero de vulgaraj pasioj.

Tiam li faris al si floson de bona instruo de Budho

kaj sekure transiris la riveron.

3. En la mondo estas tri okazoj de danĝero, en kiuj patrino ne povas helpi siajn gefilojn kaj gefiloj ne povas helpi sian patrinon: — brulego, inundo, kaj rompoŝtelo. En tiuj ĉi okazoj tamen ne mankas ŝanco, en kiu ili helpas unu la alian.

Sed estas tri okazoj de danĝero, en kiuj patrino absolute ne povas helpi siajn gefilojn kaj gefiloj sian patrinon. Tiuj ĉi tri okazoj estas la tempo de malsaniĝo, la periodo de kadukiĝo, kaj la momento de morto.

Kiel gefiloj povus anstataŭi sian patrinon, kiam ŝi iom post iom kadukiĝas? Kiel patrino povus anstataŭi sian filon, kiam li estas malsana? Kiel ili povus helpi unu la alian, kiam la momento de morto alproksimiĝas? Kiom ajn ili amas unu la aliajn, aŭ kiom ajn ili estas intimaj, neniu povas helpi la aliajn en ĉi tiaj okazoj.

4. Iam Jamao, reĝo de infero, demandis krimulon, kiu enfalis en lian inferon pri siaj malbonaj agoj dum la vivo, ĉu li ne vidis tri ĉielajn mesaĝistojn, kiam li vivis. La viro respondis, “Ne, mia Reĝo! Mi ne vidis ilin.”

Jamao demandis lin, ĉu li ne vidis maljunulon kun

kurbigita lumbo kaj bastono por piedirado. La viro respondis, “Jes, mia Reĝo! Mi vidis tiajn maljunulojn tre ofte.” Jamao diris al li, “Vi estas suferanta tiun ĉi punon, ĉar vi ne rekonis en maljunuloj ĉielan mesaĝiston, kiu estis sendita por averti vin, ke vi devas tuj ŝanĝi vian vivmanieron antaŭ ol vi ankaŭ fariĝas maljuna.”

Jamao ankoraŭ demandis lin, ĉu li ne vidis povran kaj izolitan malsanulon. La viro respondis, “Jes, mia Reĝo! Mi vidis tiajn malsanulojn tre ofte.” Jamao diris al li, “Vi venis ĉi tien, ĉar vi ne sukcesis rekoni en malsanuloj ĉielan mesaĝiston senditan por averti vin pri via propra malsano.”

Jamao ankoraŭ plu demandis lin, ĉu li ne vidis mortinton. La viro respondis, “Jes, mia Reĝo! Mi vidis mortintojn multe da fojoj.” Jamao diris al li, “Ĝuste ĉar vi ne rekonis en mortintoj ĉielan mesaĝiston senditan por averti vin, ke vi devas morti. Se vi estus rekoninta tiujn mesaĝistojn kaj preninta ilian averton sincere, vi estus ŝanĝinta vian vivmanieron kaj ne alveninta al tiu ĉi loko de suferoj.”

5. Foje estis juna virino nomata Kisagotami, edzino de riĉulo. Ŝi fariĝis freneza pro la morto de sia eta filo. Ŝi, tenante la mortintan filon en siaj brakoj, iris de domo al domo por peti revivigi lin.

Kompreneble neniu povis helpi ŝin, sed finfine unu disĉiplo de Budho rekomendis ŝin viziti Budhon, kiu tiam restis ĉe Ĵetavano. Do ŝi vizitis Budhon kun la kadavro de la infano.

Budho rigardis ŝin kun simpatio kaj diris, "Por revivigi la infanon mi bezonas kelkajn semojn de papavo; iru kaj petu kvar aŭ kvin semojn el hejmo, en kiu neniu funebro okazis."

La freneza patrino iris al urbo kaj vane serĉis hejmon, en kiu neniu mortis. Finfine ŝi devis reiri al Budho ne havante semon. Vidante la kvietan vizaĝon de Budho, ŝi por la unua fojo komprenis la signifon de la vortoj de Budho. Ŝi deprenis la kadavron de si kaj enterigis ĝin. Poste ŝi revenis al Budho kaj fariĝis unu el la disĉiploj.

IV

REALECO DE HOMA VIVO

1. Homoj en la mondo inklinas esti egoismaj kaj malsimpatiaj; ili ne scias kiel ami kaj respekti unu la

aliajn, disputas kaj kverelas pri sensignifaj aferoj, nur damaĝante kaj suferigante sin mem. Tial ilia vivo estas malgaja rondiro plena de suferoj.

Ĉu ili estas riĉaj aŭ malriĉaj, ili zorgas pri mono; ili suferas pro malriĉeco kaj suferas pro riĉeco. Ĉar ilia vivo estas regata de avideco, ili neniam kontentiĝas.

Riĉulo zorgas pri sia bieno, zorgas pri sia domo, zorgas pri ĉiaj siaj posedaĵoj. Riĉulo estas maltrankvila, timante, ke katastrofo trafos lin, ke lia domo bruliĝos, rabistoj envenos, ke kidnapistoj fortrenos lin. Li poste zorgas pri sia morto kaj pri malordo de sia sano. Certe lia vojo al morto estas soleca, ĉar neniu akompanas lin.

Malriĉulo ĉiam suferas pro manko; tio stimulas lian senfinan deziron al tereno kaj domo. Bruligite de avideco, li elĉerpas sian korpon kaj menson, kaj fine venas al morto meze de sia vivo.

Al li ŝajnas, ke la tuta mondo kontraŭstaras lin. La vojo al morto estas soleca, ĉar li devas longe vojaĝi sen amiko, kiu bonvolas akompani lin.

2. Nu, en la mondo estas kvin malbonagoj. La unua estas krueleco; ĉiuj vivestaĵoj, eĉ insektoj, batalas unu la

aliajn. Fortuloj atakas malfortulojn; malfortuloj trompas fortulojn. Ĉie ajn okazas bataloj kaj kruelaj agoj.

La dua estas manko de klara limo inter la rajto de patro kaj tiu de filo; inter pliaĝa frato kaj plijuna; inter edzo kaj edzino; inter pliaĝa parenco kaj plijuna. En ĉiu okazo ĉiu deziras okupi pli altan pozicion kaj ekspluati la aliajn. Ili trompas unu la aliajn. Mankas sincereco.

La tria estas manko de klara limo pri la konduto inter viro kaj virino. Ili fojfoje ekhavas malpurajn kaj lascivajn imagojn kaj dezirojn, kiuj kondukas ilin al skandaloj, al disputoj, kvereloj, maljustaĵoj kaj malvirtaĵoj.

La kvara estas tendenco ignori alies rajtojn kaj troigi nur siajn gravecojn. Tial homoj mensogas kaj balilaĉas, insultas kaj vundas aliulojn, neniam memkritikante.

La kvina estas tendenco neglekti siajn proprajn devojn por la aliaj. Homoj pensas tro multe pri sia komforteco kaj pri siaj deziroj. Ili forgesas la favorojn, kiujn ili ricevis. Ili ĝenas la aliajn kaj fine faras gravan pekon.

3. Oni devas havi pli grandan simpation unu kun la

aliaj. Oni devas respekti unu la aliajn kaj helpi reciproke en malfacilaĵoj. Sed efektive homoj estas egocentrismaj kaj durkapaj. Ili malestimas aliajn homojn pro ilia fuŝo kaj malamas aliajn pro ilia avantaĝo. Tiuj ĉi emoj pli kaj pli disvolviĝas malbonaj kaj poste fariĝas netolereblaj.

La sentimento de malestimo ne tuj alportas perfortajn agojn, sed ĝi venenas la vivon kun kolero kaj malestimo, tiel profunde penetrante en homan menson, ke homoj portadas la markon ankaŭ en la venonta vivo.

Vere en la mondo de ampasio la homo naskiĝas sola kaj mortas sola. Ĉiu sola devas ricevi sian rekompencon de sia konduto, ĉar neniu povas anstataŭi lin.

La leĝo de kaŭzo kaj kondiĉo estas universala. Ĉiu devas porti sian propran ŝarĝon de pekoj kaj devas renkonti sola la venĝon. Tiu ĉi sama leĝo regas ankaŭ bonajn agojn. Vivo plenigita de simpatio kaj favoro rezultigas bonan sorton kaj feliĉon.

4. Homoj estas ligitaj al vulgara amo kaj enfermitaj en malĝojo. Ili tute ne povas liberigi sin el la doloriga penso dum longa tempo. Plie dronante en severa avideco, ili estas kovritaj de malico, faras sencelajn agadojn, konfliktas kun la aliaj, ne povas esti intimaj al la vera vojo, mortas nenature, kaj devas eterne suferi.

Tia konduto ne harmonias kun la natura vojo nek kun la leĝo de la kosmo. Tial ĝi nepre alportas malfeliĉon, kaj tiaj homoj suferas en tiu ĉi vivo kaj en la posta vivo.

Estas la fakto, ke ĉio en tiu ĉi vivo estas efemera kaj necerta. Sed multaj homoj ne rimarkas tiun ĉi fakton kaj daŭrigas serĉi vulgaran ĝojon kaj vane provas kontentigi siajn dezirojn. Estas vere lamentinde.

5. Estas neeviteble, ke estante en la mondo plena de suferoj, homoj pensas kaj agas egocentrisme kaj egoisme; ankaŭ estas neeviteble, ke pluaj suferoj kaj malfeliĉoj sekvas.

Homoj amas sin mem kaj neglektas la aliajn. Ili lasas siajn dezirojn kreski al avideco, adulto kaj ĉiaspecaj pekoj. Tial ili devas suferi senfine.

Luksa vivo ne longe daŭras sed forpasas tre rapide. En tiu ĉi mondo nenia plezuro daŭras eterne.

6. Tial homoj devas forĵeti, dum ili estas junaj kaj sanaj, sian avidecon kaj sian alkroĉiĝon al mondaĵoj, kaj devas diligente serĉi la veran Vervekiĝo, ĉar aparte de Vervekiĝo nenie troviĝas eterna fidindaĵo nek feliĉo.

Plejparte da homoj tamen ne kredas aŭ ignoras la leĝon de kaŭzo-rezulto. Ili daŭrigas sian kutiman vivon plenan de avideco kaj egocentrismo, ne atentante, ke bonaj agoj alportas feliĉon kaj malbonaj agoj alportas malfeliĉon. Ili ankaŭ ne konscias, ke iliaj agoj en la nuna vivo kondiĉas ne nur iliajn proprajn statojn en la postaj vivoj sed ankaŭ la vivojn de aliaj homoj.

Ili lamentas kaj kriaĉas pri siaj suferoj, tute ne komprenante la efikon, kiun iliaj nunaj agoj havas sur iliaj postaj vivoj, kaj la rilaton inter iliaj suferoj kaj la agoj de iliaj antaŭaj vivoj. Ili pensas nur pri nunaj deziroj kaj nunaj suferoj.

Nenio en la mondo estas eterna aŭ senŝanĝa; ĉio estas ŝanĝanta momenton post momento neantaŭvideble. Sed homoj estas malsaĝaj kaj egocentrismaj, kaj interesiĝas nur pri deziroj kaj suferoj antaŭ siaj okuloj. Ili ne aŭskultas bonajn instruojn nek strebas kompreni ilin, simple lasante sin al la nunmomenta intereso, al riĉaĵo kaj volupto.

7. Ekde pratempo nekalkulebla nombro da homoj naskiĝis kaj naskiĝas en tiu ĉi mondo de iluzio kaj sufero. Estas tamen feliĉe, ke tiu ĉi mondo havas la instruon de Budho, kaj ke oni povas esti helpata surbaze de ĝi.

Ĝuste tial oni devas pensi profunde, devas teni sian menson pura kaj sian korpon sana, devas forlasi avidecon kaj malbonon, kaj devas serĉi bonon.

Feliĉe, nun venis al ni la instruo de Budho. Do, ni devas fidi ĝin kaj deziri naskiĝon en la Pura Lando de Budho. Bone konante la instruon de Budho, ni devas ne sekvi aliajn vojojn al avido kaj peko. Kaj ni devas ne nur teni la instruon de Budho ĉe ni solaj, sed praktiki ĝin kaj transdoni ĝin al la aliaj.

LA SAVO FARE DE BUDHO

I

LA VOTOJ DE BUDHO AMITABO

1. Kiel jam eksplikite, homoj ĉiam inklinas subiĝi al siaj vulgaraj pasioj, ripetante pekon post pekon, kaj portas ŝarĝojn de netolerablajn agojn; iliaj propraj saĝoj aŭ fortoj ne kapablas rompi tiujn ĉi kutimojn de avideco kaj sintrompo. Se homoj ne povas konkeri kaj forigi vulgarajn pasiojn, kiel ili povas esperi la realiĝon de sia vera naturo de Budheco?

Budho, kiu komprenis komplete la naturon de la homo, ekhavis grandan simpation al homoj kaj starigis voton fari ĉion eblan, eĉ riskante sian propran intereson, por savi ilin el la maltrankvilo kaj sufero. Por aktualigi la savon, Ĝi aperigis sin kiel Bodisatvo en la nekalkuleble malproksima pasinteco kaj ĵuris la jenajn dek votojn:

a) "Kiam mi estos atingonta Budhecon, ĉiuj en mia lando certe eniru en Budhecon kaj povu akiri Vervekiĝon. Se ne, mi ne fariĝu Budho."

b) "Kiam mi estos atingonta Budhecon, mia lumo atingu ĉiujn angulojn de la mondo. Se ne, mi ne fariĝu Budho."

c) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, mia vivo daŭru senfine, por ke mi povu savi nekalkuleblajn homojn. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

d) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, ĉiuj Budhoj en la dek direktoj kune laŭdu mian nomon. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

e) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, homoj kun sincera menso deziru naskiĝi en mia lando, ripete vokante mian nomon dek fojojn kun pura konfido kaj efektive naskiĝu. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

f) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, homoj ĉie ajn estu destinitaj atingi Vervekiĝon, praktiku virtajn agojn kaj sincere deziru naskiĝi en mia lando; tiuokaze mi aperu en la momento de ilia morto kune kun granda kompanio de Bodisatvoj por bonvenigi ilin al mia Pura Lando. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

g) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, homoj ĉie ajn aŭdu mian nomon, pensu pri mia lando, plantu sincere semojn de virto por naskiĝi en mia lando; tiuokaze mi povu plenumi ĉiujn iliajn elkorajn dezirojn. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

h) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, ĉiuj, kiuj naskiĝas en mia Pura Lando, atingu la rangon, kiu ebligas ilin fariĝi Budho en la venonta vivo, escepte de tiuj, kiuj surbaze de sia propra voto, portante la kirason el granda voto por la bono de homoj, strebas por la profito kaj paco de la mondo, gvidas sennombrajn homojn al Vervekiĝo, kaj kultivas la virton de granda kompato. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

i) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, homoj tra la tuta mondo estu influataj de mia spirito de ama kompato, kiu purigas ilian menson kaj korpon, kaj kiu levas ilin super la mondon. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

j) “Kiam mi estos atingonta Budhecon, homoj ĉie ajn aŭdante mian nomon, lernu la ĝustan ideon pri naskiĝo-kaj-morto kaj kaptu la perfektan saĝon, kiu tenas ilian menson pura kaj trankvila en la mezo de la mondo plena de avideco kaj sufero. Se ne, mi ne fariĝu Budho.”

“Mi nun ĵuras ĉi tiel: se mi ne povus plenumi tiujn ĉi votojn, mi ne atingu Budhecon. Mi estu la fonto de nelimigita Lumo. Mi lumigu ĉiujn landojn por savi suferantojn en la mondo, malfermu la trezorejon de instruo kaj disdonu la trezorojn de bonaj virtoj.”

2. Tiamaniere Ĝi, akumulinte nekalkuleblajn virtojn dum multege da eonoj, fariĝis Amitabo, la Budho de Senfina Lumo kaj Senlima Vivo, kaj perfektigis sian propran Budho-landon de Pureco aŭ la mondon de paco, kie Ĝi nun loĝas lumigante ĉiujn homojn.

Tiu ĉi Pura Lando, en kiu troviĝas nenia sufero, estas certe la plej trankvila kaj feliĉa loko. Vestaĵoj, manĝaĵoj, kaj ĉiaj belaĵoj aperas, kiam la tieaj viv-estaĵoj bezonas ilin. Kiam facila zefiro pasas tra la arbojn juvele ornamitajn, muziko de la sankta instruo plenigas la aeron kaj purigas la menson de tiuj, kiuj aŭskultas ĝin.

En tiu ĉi Pura Lando troviĝas multaj bonodoraj lotusaj floroj, kaj ĉiu floro havas multajn trezorajn petalojn, kaj ĉiu petalo brilas kun neesprimebla beleco. La brilo de tiuj ĉi lotusaj floroj lumigas la vojon de Saĝo, kaj tiuj, kiuj aŭskultas la muzikon de la sankta instruo, estas kondukataj al plena paco.

3. Nun ĉiuj Budhoj en la dek direktoj laŭdas la virtojn de tiu ĉi Budho de Senfina Lumo kaj Senlima Vivo.

Ĉiu ajn homo, kiu aŭdas la Nomon de la Budho kaj akceptas la instruon kun ĝojo, ekhavas la menson komunan kun tiu de la Budho kaj naskiĝos en la mirinda Pura Lando de la Budho.

Tiuj, kiuj naskiĝas en la Pura Lando, partoprenas la senliman vivon de la Budho. Ilia menso estas tuj plenigita de simpatio al ĉiuj suferantoj; ili starigas la votojn por savi aliajn homojn kaj laboras por plenumi la votojn.

Kun la spirito de la votoj ili forlasas ĉiujn vulgarajn alkroĉiĝojn kaj klarvidas la malkonstantecon de la mondo. Kaj ili dediĉas siajn meritojn por emancipi ĉiujn vivestaĵojn; ili unuigas sian vivon kun tiu de aliaj homoj, komune havante iliajn iluziojn kaj suferojn, sed samtempe realigante ilian liberiĝon el kateniĝo kaj alkroĉiĝo al vulgara vivo.

Ili konas la malhelpojn kaj malfacilaĵojn de tiu ĉi mondo, sed ankaŭ konas la senliman povon de la kompato de la Budho. Ili tute libere iras aŭ venas, paŝas aŭ haltas laŭ sia volo, sed ili preferas resti kun tiuj homoj, al kiuj la Budho donas favoron de kompato.

Pro tio, se iu aŭdas la Nomon de la Budho Amitabo, tiu kuraĝigite vokas la Nomon kun plena konfido kaj partoprenas la kompaton de la Budho. Tial ĉiuj devas aŭskulti la instruon de Budho kaj sekvi ĝin, eĉ se ŝajnas, ke ĝi kondukus ilin denove en flamojn, kiuj kovras la mondon de naskiĝo-kaj-morto.

Se homoj sincere kaj fervore deiziras atingi Vervekiĝon, ili devas dependi de la povo de tiu ĉi Budho. Ne estas eble por ordinaraj homoj realigi sian superan naturon de Budho sen la subteno de la Budho.

4. Amitabo ne estas fore distanca de ĉiu ajn. Ĝia lando de pureco estas priskribita kiel lando fore situanta en okcidento, sed ĝi troviĝas ankaŭ en la menso de tiuj, kiuj fervore deziras esti kun la Budho.

Kiam oni prezentas al si la figuron de Amitabo, Ĝi brilas en dek milionoj da orkoloroj kaj havas okdek kvar mil da figuroj aŭ karakterizaĵoj. Ĉiu figuro aŭ karakterizaĵo havas respektive okdek kvar mil da radioj. Ĉiu radio lumigas la mondon, neiam lasante en mallumo eĉ unu homon, kiu vokas la Nomon de la Budho. Tiamaniere la Budho helpas homojn partopreni en la savado fare de la Budho.

Vidante la figuron de tiu ĉi Budho, oni povas ankaŭ senti la menson de la Budho. La menso de la Budho estas granda kompato, kiu etendiĝas al ĉiuj, eĉ al tiuj, kiuj neglektas aŭ forgesas ĝian kompaton, des pli al tiuj, kiuj memoras ĝin kun konfido.

Al tiu, kiu tenas konfidon en si, la Budho donas ŝancon unuiĝi kun Ĝi. Ĉar tiu ĉi Budho estas ĉion egale

ampleksanta, se iu pensas pri la Budho, Ĝi pensas pri li/ŝi kaj eniras en lian/ŝian menson.

Tio signifas, ke kiam iu pensas pri la Budho en sia menso, lia/ŝia menso estas jam Budho per si mem kun perfekta figuro kaj karakterizaĵo.

Tial sciu, ke se iu tenas puran kaj ĝustan konfidon en sia menso, lia/ŝia menso estas tiu de la Budho mem.

5. La Budho havas multajn formojn de avataro kaj enkarniĝo kaj povas aperigi sin en multnombraj manieroj laŭ la kapablo de ĉiu homo.

Ĝi povas aperigi sian korpon en tiel grandega figuro, ke ĝi kovras la tutan ĉielon kaj etendiĝas al senlimaj stelaj spacoj. Ĝi ankaŭ povas aperigi sian korpon en infinitezimo. Ĝia apero estas iufoje kiel formo, iufoje kiel energio, iufoje kiel mensa aspekto, kaj iufoje kiel persona ekzisto.

Kiel ajn Ĝi aperas, Ĝi certe aperas antaŭ tiuj, kiuj vokas la Nomon de la Budho kun konfido. Al tiuj homoj Amitabo ĉiam aperas akompanate de du Bodisatvoj: Avalokiteŝvaro, la Bodisatvo de Kompato, kaj Mahastamaprapto, la Bodisatvo de Saĝo. Ĝi aperas tra la

tuta mondo, por ke ĉiu ajn povu vidi, kondiĉe ke li/ŝi havu konfidon al Ĝi.

Tiuj, kiuj povas vidi Ĝian provizoran figuron, povas havigi al si kontentiĝon kaj feliĉon; des pli tiuj, kiuj povas vidi la realan Budhon, havigas al li nekalkuleblan feliĉon de ĝojo kaj paco.

6. Ĉar la menso de Amitabo mem estas granda kompato kaj saĝo, tiu ĉi Budho savas ĉiujn homojn.

Tiuj, kiuj faras nekredeble teruran krimon, kiuj havas la menson plenan de avideco, kolero kaj stultaj pasioj, kiuj mensogas, parolaĉas, insultas kaj kalmunias, kiuj mortigas, ŝtelas kaj ĝuas volupton, kiuj estas proksimaj al la fino de la vivo post jaroj da pekaj agoj, — al ili estas destinita longa periodo de puno.

Kiam tiaj homoj estas finiĝontaj sian vivon, bona amiko venas al ili kaj sincere instruas ilin, “Nun la doloro minacas vin, kaj vi ne havas eĉ momenton pripensi Budhon. Estas sufiĉe, ke vi nur voku la Nomon de la Budho.”

Se ili tutkore vokas la sanktan nomon de la Budho, ĉiuj pekoj, kiuj estus devintaj destini ilin al la malbona

mondo, estas forigitaj.

Eĉ simpla ripetado de la sankta nomo povas forigi pekojn. Kiel pli multe da bonaĵoj eblas, se oni koncentras sian menson al tiu ĉi Budho!

Tiuj, kiuj vokas la sanktan nomon, kiam ili venas al la fino de la vivo, renkontiĝas kun Amitabo kaj la Bodisatvoj de Kompato kaj de Saĝo kaj kondukiĝas de Ili al la Lando de la Budho, kie ili renaskiĝas puraj kiel blankaj lotusaj floroj.

Tial ĉiuj devas teni en sia menso la vortojn "Namo-Amitabo", kiuj signifas tutkoran dependon sur la Budho de Senfina Lumo kaj Senlima Vivo!

II
LA PURA LANDO

1. La Budho de Senfina Lumo kaj Senlima Vivo estas nun vivanta kaj disdonanta Sian Veron. En la Pura Lando troviĝas nenia sufero kaj nenia mallumo; tieaj viv-estaĵoj pasigas ĝojan tempon. Tial ĝi estas nomata la Lando de Feliĉo.

En la mezo de tiu lando troviĝas la lageto plena de pura akvo, freŝa kaj briletanta, kies ondoj plaŭdas milde sur bordoj de oraj sableoj. Tie kaj ĉi tie floras tiel grandaj lotusfloroj kiel radoj de veturiloj, kun multaj kaj diversaj koloroj — bluaj floroj kun blua lumo, flavaj floroj kun flava lumo, ruĝaj floroj kun ruĝa lumo, blankaj floroj kun blanka lumo. La aero estas plena de ties parfumo.

Tie kaj ĉi tie ĉirkaŭ la lageto staras palacoj dekoraciitaj per kvar trezoroj — oro, arĝento, safiro kaj kristalo — kun ŝtuparo farita el marmoro. Aliloke troviĝas balustradoj elstarantaj super la lageto, ĉirkaŭitaj de kurtenoj ornamitaj per juveloj, inter kiuj staras bonodoraj arboj kaj densaĵoj plenaj de floroj.

En la aero sonas solena muziko. Sur la tero brilas oraj koloroj. Ses fojojn tage kaj nokte falas floroj de la ĉielo, kiujn la loĝantoj de la lando kolektas en la florpladon kaj portas al aliaj Budhaj landoj, por oferi ilin al miliardo da Budhoj.

2. En tiu mirinda lando vivas cignoj, pavoj, papagoj, lanioj, paradizaj birdoj kaj aliaj, kiuj ĉiam bele kantas, laŭdas ĉiujn virtojn kaj bonojn kaj proklamas la instruon.

Kiu ajn aŭdas aŭ aŭskultas la muzikon de la birdaj voĉoj, aŭskultas la voĉon de la Budho, renovigas sian konfidon al la Budho kaj ĝojas esti kun la Budho kaj esti en la harmonio de la kolegoj.

Milda zefiro blovete trapasas arbojn de la Pura Lando kaj tuŝas la reton kun brilantaj sonoriloj, oni aŭdas delikatan sonon. Kaj tiumomente centoj kaj miloj da sonoj estas aŭdeblaj.

Tiuj, kiuj aŭdas tiun sonon, pensas pri la Budho, pri la Darmo kaj pri la Samgo. La Lando de la Budho estas provizita per tiuj virtoj kaj belaj ornamaĵoj.

3. Kial la Budho en tiu ĉi lando estas nomita Amitabo? Tio estas, ĉar la lumo de la Budho estas senfina kaj la vivdaŭro de la Budho estas senlima. Ĝia superba lumo de la instruo sen ia ajn obstaklo atingas ĉiujn angulojn de la lando; Ĝia vigla forto de la kompato neniam malkreskas dum senkalkuleblaj eonoj.

Kaj ĉar la nombro de tiuj, kiuj naskiĝinte en la Pura Lando perfekte vervekiĝas, estas nekalkuleble granda; ili neniam regresas al la mondo de iluzio aŭ naskiĝo-kaj-morto.

Kaj ankaŭ ĉar la nombro de tiuj, kiuj vervekiĝas al la nova vivo per la Lumo, estas nekalkuleble granda.

Tial ĉiuj homoj devas koncentri sian menson al Ĝia Nomo. Kiam ili estas alvenontaj al la fino de la vivo, se ili vokas la Nomon en perfekta konfido kaj kun neŝancela menso, eĉ unu tagon aŭ unu semajnon, ili povas naskiĝi en la Pura Lando, kondukite de Amitabo kaj aliaj multaj sanktuloj.

Se iu aŭdas la Nomon de Amitabo kaj konfidas la instruon, tiu povas atingi la plej perfektan Vervekiĝon.

LA VOJO DE PRAKTIKO

LA VOJO DE PURIGADO

I

PURIGI LA MENSON

1. Homoj havas vulgarajn pasiojn, kiuj kondukas ilin al iluzioj kaj suferoj. Estas kvin metodoj por teni ilin for de la katenoj de vulgaraj pasioj.

La unua: homoj devas havi ĝustajn ideojn, kiuj sin bazas sur atentema observado, kaj ĝuste kompreni la rilaton inter kaŭzo kaj rezulto kaj ties signifon. Ĉar la kaŭzo de suferoj havas sian radikon en la mensaj deziroj kaj alkroĉiĝoj, kaj ĉar deziroj kaj alkroĉiĝoj rilatas al eraraj observoj fare de egoo, ignorante la signifon de la leĝo de kaŭzo kaj rezulto, kaj ĉar tio devenas de malĝustaj observoj, paco eblas, nur se el la menso estas forigita la vulgaraj pasioj.

La dua: homoj povas forigi el si la erarajn observojn kaj sekvajn vulgarajn pasiojn per atentema kaj pacienca mens-regado. Kun efika mens-regado ili povas eviti dezirojn estiĝantajn de la stimulado de okuloj, oreloj, nazo, lango, haŭto, kaj de plipostaj mensaj procesoj; tiamaniere eblas fortranĉi la radikon de ĉiuj vulgaraj pasioj.

La tria: homoj devas havi ĝustajn ideojn por ke ili povu taŭge uzi objektojn. Kiam ili vestas sin kaj manĝas, ili neniam devas konsideri komfortecon kaj plezuron, sed pensi, ke vestaĵoj estas necesaj por ŝirmi la korpon kontraŭ ekstrema varmo aŭ malvarmo kaj por kaŝi la korpon pro hontemo, kaj ke manĝaĵoj estas necesaj por nutri la korpon, per kiu oni serĉas la vojon al Vervekiĝo. Vulgaraj pasioj neniam povas aperi, se ili tiel ĝuste pensas.

La kvara: homoj devas lerni paciencon; ili devas elteni la nekomfortecon de varmego kaj malvarmego, malsato kaj soifo; ili devas esti paciencaj eĉ se ili ricevas insulton kaj mokon, ĉar praktikante paciencon oni povas estingi la fajron de iluzioj, kiuj forbruligas ilian korpon.

La kvina: homoj devas lerni, kiamaniere ili povas eviti diversajn danĝerojn. Ĝuste kiel saĝulo, kiu tenas sin for de sovaĝa ĉevalo aŭ freneza hundo, tiel oni neniam devas amikiĝi kun malbonuloj, nek iri al lokoj, al kiuj saĝuloj evitas iri. Se oni praktikas singardemon kaj prudenton, la fajro de iluzioj estingiĝos.

2. Estas kvin specoj de deziroj en la mondo. Deziroj estiĝas de la figuroj, kiujn okuloj vidas; de la sonoj, kiujn oreloj aŭdas; de la bonodoroj, kiujn nazo flaras; de la

gustoj, kiujn lango gustumas; de la tuŝoj, kiujn haŭto sensas. De tiuj ĉi kvin pordoj al deziroj venas la amo al fizika komforteco

Multaj homoj, influate de la amo al fizika komforteco, ne atentas la malfeliĉojn, kiuj sekvas la komfortecon, kaj ili estas enkaptitaj per demonaj kaptiloj, same kiel cervo enkaptita de ĉasisto en arbaro. Tiuj ĉi kvin deziroj ja estas vere danĝeraj kaptiloj. Homoj, enkaptitaj de ili, iluziiĝas kaj suferas. Tial ili devas scii, kiamaniere ili povas eviti la kaptilojn.

3. La metodo por fuĝi de la kaptilo de iluzioj ne estas unu. Supozu, ke vi kaptas serpenton, krokodilon, birdon, hundon, vulpon kaj simion, kiuj havas sian respektivan instinkton, kunigas ilin per fortaj ŝnuroj, kaj poste forlasas ilin; tiam tiuj ĉi ses vivaĵoj deziros reiri al sia respektiva loĝejo laŭ la instinkto; t.e. serpento al la loko kun amasigitaj herboj, krokodilo al akvo, birdo al aero, hundo al vilaĝo, vulpo al kampo, kaj simio al arbaro. Pro tio ili kontraŭbatalos unu la alian kaj ili estos trenataj al la direkto, kien la plej forta vivaĵo reiras.

Same kiel la vivaĵoj en tiu ĉi parabolo, homoj estas tentataj de diversaj objektoj, kiujn ili vidas per siaj okuloj, aŭdas per siaj oreloj, flaras per sia nazo, gustumas per sia lango, sensas per sia haŭto, kaj imagas per sia cerbo.

Tiamaniere ili estas regataj de dominanta deziro.

Se tiuj ĉi ses vivaĵoj estas alligitaj per apartaj ŝnuroj al granda kolono, komence ili provos liberiĝi, ĝis ili laciĝas, kaj pli poste kuŝiĝus apud la kolono. Tiel same, se homoj trejnas kaj kulturas siajn mensojn, ili ne estas tentataj de la kvin deziroj. Tiuj, kies menso estas bone regataj, havos feliĉon en estanteco kaj estonteco.

4. Homoj volas havi gloran famon kaj laŭdon laŭ la postulo de egoisma komforteco. Sed famo kaj laŭdo konsumiĝas tiel, kiel incenso bruligas sin kaj estingiĝas. Se homoj postkuras senĉese honoron kaj aplaŭdon sed ne serĉas la vojon al vero, ili sin trovos en gravaj danĝeroj kaj bedaŭros sian sintenon.

Tiu, kiu postkuras famon, riĉecon kaj amaferon, similas al infano, kiu lekas mielon ŝmiritan sur glavo. Dum ĝi gustumas la dolĉaĵon, ĝi tranĉas al si la langon. Tiu similas al homo, kiu portas torĉon en sia mano kontraŭ forta vento; ĝia flamo certe bruligos liajn manojn kaj vizaĝon.

Oni neniam devas fidi je sia menso, kiu estas plena de la tri venenoj: avideco, kolero kaj malvido. Oni neniam devas lasi sian menson kuri senbride, sed devas teni ĝin sub strikta regado.

5. Atingi la perfektan mens-regadon estas la plej malfacila afero. Tiuj, kiuj volas Vervekiĝon, devas unue senigi sin je la fajro de ĉiuj deziroj. Deziro estas furioza fajro, tial serĉantoj de Vervekiĝo devas eviti la fajron de deziroj, same kiel portantoj de fojn-faskon evitas fajreron.

Sed estas stulte, se iu forprenus siajn okulojn por ne esti tentata de belaj figuroj. La menso estas ĉefo. Se oni bone regas sian menson, malbonaj deziroj malaperas per si mem.

Estas penige sekvi la vojon al Vervekiĝo, sed estas multe pli suferige, se homoj ne havas volon serĉi la vojon al Vervekiĝo. Homoj naskiĝas, maljuniĝas, malsaniĝas kaj mortas en tiu ĉi mondo, kaj pro tio ili suferas senfine.

Tiuj, kiuj serĉas la vojon al Vervekiĝo, similas al bovo, kiu paŝas sur kota vojo, portante pezan ŝarĝon sur sia dorso. Se la bovo paŝadas, ne rigardante ĉirkaŭajn objektojn, ĝi povas venki la koton kaj ripozi en la celo. Tiel same, se la menso estas regata kaj tenata sur la ĝusta vojo, tiam ne plu troviĝos koto de avideco kaj ĉiuj suferoj malaperos.

6. Tiuj, kiuj serĉas la vojon al Vervekiĝo, unue devas

forigi egoisman arogantecon kaj esti humila por akcepti la lumon de la instruo de Budho. Ĉiuj trezoroj de la mondo, oro, arĝento k.a. kaj honoro ne estas kompareblaj kun saĝo kaj virto.

Por ĝui bonan sanon, por alporti veran feliĉon al sia familio, por alporti pacon al ĉiuj, oni devas unue disciplini kaj regi sian propran menson. Se vi povas regi vian menson, vi povas trovi la vojon al Vervekiĝo, kaj saĝo kaj virto konsekvence venos al vi.

Kiel juveloj elterigitaj el la tero, tiel virto aperas el bona konduto, kaj saĝo aperas el pura kaj paca menso. Por iri sendanĝere tra la mezo de homa vivo, oni bezonas la lumon de saĝo kaj la gvidon de virto.

La instruo de Budho, kiu predikas al homoj, kiel ili eliminu la tri venenojn, nome avidecon, koleron kaj malvidon, estas bona instruo, kaj tiuj, kiuj sekvas tiun ĉi instruon, akiras feliĉan vivon.

7. Homoj kutime inklinas movi sin al la direkto, kiun ili celas. Se ili havas avidajn pensojn, ili fariĝas pli avidaj; se ili havas kolerajn pensojn, ili fariĝas pli koleraj; se ili havas malsaĝajn pensojn, iliaj piedoj moviĝas al tiu direkto.

Kiam venas rikolta sezono, bovpaŝtistoj tenas siajn bovojn en bovstalo, por ke ili ne eliru en la kampon, ne donu la kaŭzon por plendoj, kaj ne estu mortigitaj. Tiel same homoj devas firme protekti siajn mensojn kontraŭ malhonesteco kaj malfeliĉo, elimini pensojn, kiuj instigas avidecon, koleremon kaj malvidon, kaj kuraĝigi sian menson al stimulado de kompatemo kaj bonkoreco.

Kiam venas printempo kaj ekĝermas herboj en la kamparo, bovpaŝtistoj liberigas siajn bovojn, sed eĉ tiam ili fikse rigardas la lokon, kien bovoj iras, kaj neniam neglektas atenti pri paŝtejoj. Tiel same, homoj devas atenti, kiun direkton la menso moviĝas, kaj gardi la menson sub bona stato.

8. Iam la Budho Ŝakjamunio restis en la urbo Kaŭsambio. Ĉi tie loĝis unu viro, kiu malamis Ŝakjamunion. Li dungis malbonulojn kaj ordonis, ke ili insultu Lin. Tial, kiam la disĉiploj de Ŝakjamunio eniris en la urbon kaj almozpetis, ili nenion ricevis, sed aŭdis nur riproĉojn.

Tiam Anando diris al Ŝakjamunio, “Estas pli bone ne resti en ĉi tia urbo. Troviĝas aliaj pli bonaj urboj por viziti. Ni forlasu ĉi tiun urbon.”

Ŝakjamunio diris, “Se la sekvanta urbo estas simila

al tiu ĉi urbo, kiel ni faru?”

“Tiam ni ankoraŭfoje iru al alia urbo.”

Ŝakjamunio diris, “Ne, Anando, tiamaniere ne estos fino. Prefere ni restu ĉi tie kaj pacience atendu la tempon, kiam la insultoj ĉesos. Kaj poste ni transiru al alia loko.”

“En tiu ĉi mondo troviĝas profito kaj perdo, kalumnio kaj laŭdo, sufero kaj plezuro; la Iluminiĝinto ne estas regata de tiuj ĉi flankaj aferoj, kiuj venas kaj foriras baldaŭ.”

II
BONAJ KONDUTOJ

1. Tiuj, kiuj serĉas la vojon al Vervekiĝo, devas ĉiam atenti, ke ili konstante tenu siajn korpon, parolon kaj menson puraj. Por teni la korpon pura, oni neniam devas mortigi viv-estaĵojn, nek ŝteli aŭ adulti. Por teni la parolon pura, oni neniam devas mensogi, insulti, trompi aŭ ĝui babilaĉon. Por teni la menson pura, oni devas forigi ĉiajn avidecon, koleron kaj falsan prijuĝon.

Se la menso fariĝas malpura, certe homaj kondutoj fariĝas malpuraj; se la kondutoj estas malpuraj, estiĝos

suferoj. Tial estas plej grave, ke la menso kaj la korpo estu tenataj puraj.

2. Iam estis riĉa vidvino, kiu havis bonan reputacion pro la bonkoreco, modesteco kaj ĝentileco. Ŝi havis unu servistinon, kiu estis saĝa kaj diligenta.

Iun tagon la servistino pensis, "Mia mastrino havas tre bonan reputacion; mi volas scii, ĉu ŝi estas bonkora de sia naturo aŭ pro sia cirkonstanco? Mi provu trovi."

La sekvan matenon, la servistino ellitiĝis apenaŭ tagmeze. Ĉagrenite la mastrino kolere riproĉis ŝin. La servistino respondis, "Eĉ se mi ellitiĝas malfrue nur unu aŭ du fojojn, vi ne estu tiel kolerema." La mastrino koleregis.

La sekvan matenon, la servistino refoje ellitiĝis malfrue. Tio kolerigis la mastrinon kaj ŝi batis la servistinon per bastono. Tiu ĉi fakto vaste famiĝis kaj la vidvino perdis la bonan reputacion.

3. Multaj homoj similas al tiu ĉi mastrino. Dum al ili la cirkonstancoj estas favoraj, ili estas afablaj, modestaj kaj

pacaj. Sed estas dubinde, ĉu ili kondutas same, eĉ se la kondiĉoj ŝanĝiĝas al pli malfavoraj.

Kiam iu persono tenas puran kaj trankvilan menson kaj daŭre agas kun afableco, eĉ en la okazo, ke malagrablaj vortoj atingas ties orelojn, ke aliaj homoj montras malicon, aŭ ke mankas al tiu sufiĉaj manĝaĵoj, vestaĵoj kaj loĝejo, nur tiam tiu ĉi persono povas esti nomata bona homo.

Tial, tiu, kiu tenas sian menson trakvila kaj daŭre faras bonajn kondutojn nur tiam, kiam iliaj cirkonstancoj estas favoraj, ne estas vere bona homo. Nur tiu, kiu sekvas la instruon de Budho, disciplinas sian menson kaj korpon laŭ la instruo, povas esti nomata vere bona, modesta kaj paca homo.

4. Rilate al vortouzado, troviĝas kvin paroj da kontrastoj: vortoj, kiuj estas konvenaj al tempo, kaj kiuj ne estas konvenaj; vortoj, kiuj akordas kun fakto, kaj kiuj ne akordas; vortoj, kiuj sonoras agrablaj, kaj kiuj sonoras krudaj; vortoj, kiuj estas utilaj, kaj kiuj estas malutilaj; kaj vortoj, kiuj estas simpatiaj, kaj kiuj estas antipatiaj.

Kiajn ajn vortojn ni aŭdas, ni devas esti ĉiam

trankvilaj, fiksante nian menson ĉi tiel: mia menso ne ŝanĝiĝu; krudaj vortoj ne elfluu el mia buŝo; mia menso estu plena de kompato kaj amo; kolero kaj malamo ne okazu al mi.

Supozu, ke estas unu viro, kiu volas forigi koton el la grundo per ŝpato kaj fosilo. Kiel fervore li fosas kaj ĵetas la koton, tio tamen estas neebla tasko. Same kiel tiu malsaĝulo, ni ne povas havi esperon elimini ĉiujn vortojn. Tial, ni devas disciplini nian menson kaj plenigi ĝin per simpatio, por ke ni ne estu ĝenataj de la vortoj de aliuloj.

Ne estas eble pentri bildon sur la blua ĉielo per farbo. Ankaŭ estas neeble sekigi grandan riveron per la varmo de torĉo el fojno, aŭ fari krakojn frontante du pecojn de tre tanitaj ledoj. Tiel same, homoj devas disciplini sian menson, por ke ilia menso estu neniam ĝenata, kiajn ajn vortojn ili aŭdas.

Homoj devas disciplini sian menson kaj teni ĝin larĝa kiel la teron, senlima kiel la ĉielon, profunda kiel grandan riveron, kaj mola kiel tanitan ledon.

Eĉ se via malamiko kaptas kaj turmentas vin, se vi sentas indignon, vi ne estas nomata sekvanto de la instruo de Budho. Sub ĉia ajn cirkonstanco, vi devas pensi, “Mia menso estu ne ŝancelebla. Vortoj de malamo kaj kolero ne

pasu miajn lipojn. Mi brakumu mian malamikon kun simpatio kaj kompato, kiuj fluas el la menso plena de kompato al ĉiuj viv-estaĵoj."

5. Iu viro trovis formikejon, kiu brulas en tago kaj fumas en nokto. Li iris al iu saĝulo kaj petis lian konsilon, kion fari pri ĝi. La saĝulo diris, "fosu profunde ĝin per glavo." La viro fosis la formikejon laŭ la konsilo. Li sinsekve trovis riglilon, ŝaŭmon de akvo, forkon, keston, testudon, buĉistan tranĉilon, pecon da viando, kaj fine drakon. Li raportis al la saĝulo, kion li trovis. La saĝulo klarigis la signifon kaj diris, "Forĵetu ĉiujn escepte la drakon kaj ne ĝenu ĝin."

Tio ĉi estas parabolo. Ĉi tie "Formikejo" simbolas la homan korpon; "brilas en tago" signifas, ke homoj dum tago efektivigas la aferojn, kiujn ili pensis en la antaŭa nokto; "fumas en nokto" signifas, ke homoj dum nokto pripensas, ĝojas aŭ bedaŭras rilate aferojn, kiujn ili faris en la antaŭa tago.

En la sama parabolo, "iu viro" simbolas la personon, kiu serĉas Vervekiĝon; "saĝulo" estas Budho; "glavo" indikas puran saĝon; "fosu profunde ĝin per glavo" signifas la klopodon, per kiu oni devas atingi Vervekiĝon.

Plue en la parabolo, “riglilo” signifas malsaĝecon; “ŝaumo de akvo” signifas koleremon kaj ĉagreniĝon; “forkego” signifas ŝanceliĝon kaj maltrakvilecon; “kesto” signifas avarecon, koleron, maldiligentecon, frivolecon, penton kaj iluzion; “testudo” signifas korpon kaj menson; “buĉista tranĉilo” signifas la kvin dezirojn; “peco de viando” signifas avidecon al amuzaĵoj. Tiuj ĉi aĵoj estas ĉiuj malutilaj por ni, kaj tial diris la Budho. “Forĵetu ĉiujn.”

La lasta “drako” indikas la menson, kiu jam eliminis ĉiujn vulgarajn dezirojn. Se ni fosas pluen ĉirkaŭ ni, ni fine vidos la drakon. “Ne ĝenu la drakon” signifas lasi la menson libera de vulgaraj deziroj.

6. Pindolo, disĉiplo de Ŝakjamunio, akirinte la Vervekiĝon, volis reveni al sia naskiĝa urbo Kaŭsambio por rekompenci homojn, kiuj bonfaris al li, kaj aranĝis la kampon por semi Budho-semojn.

En la ĉirkaŭaĵo de Kaŭsambio estis malgranda parko, kie longe vicas kokoaj arboj farantaj ombron laŭ la digo de la rivero Ganga kaj blovas konstante malvarmeta vento.

Iun someran tagon, Pindolo sidis en meditado sub malvarmeta ombro de arbo; tiam reĝo Udjano venis al tiu ĉi parko kune kun siaj reĝino kaj servistinoj por distri sin per muziko. Post muziko kaj plezuro li faris sieston sub la malvarmeta ombro de alia arbo.

Dum la reĝo estis dormanta, liaj reĝino kaj servistinoj promenis de loko al loko, kaj hazarde ekvidis Pindolon sidantan en meditado. Ili konstatis, ke li estas sanktulo kaj petis de li predikon. Kaj ili atente aŭskultis lian predikon.

Kiam la reĝo vekiĝis de la siesto, li ekiris por serĉi siajn reĝinon kaj servistinojn, kaj trovis ilin, kiuj ĉirkaŭas unu el la disĉiploj de la Budho kaj aŭskultas lian predikon. La reĝo, voluptema kaj ĵaluza, insultis lin kun indigno. “Estas ne pardoneble, ke vi estas en la mezo de virinoj kaj parolaĉas kun ili.” Pindolo restis silenta kun la okuloj fermitaj.

La reĝo furioza eligis sian glavon kaj minacis Pindolon, sed tiu ĉi restis ankoraŭ silenta kaj ne moviĝis kiel roko. La reĝo pli kaj pli furiozanta detruis formikejon kaj ĵetis al li la koton plenigitan de formikoj, sed Pindolo ankoraŭ restis sidanta en meditado kaj eltenis la insulton.

Baldaŭ la reĝo hontis pri sia furioza konduto kaj

petis pardonon de Pindolo. Pro tiu okazaĵo la instruo de Budho trovis sian vojon en la kastelo de la reĝo kaj de tie ĝi disvastiĝis tra la tuta lando.

7. Post kelkaj tagoj, la Reĝo Udjano vizitis Pindolon en la arbaro, kie li vivis, kaj demandis, "Respektata instruisto mia, kiel disĉiploj de la Budho povas teni siajn menson kaj korpon puraj kaj ne tentataj de volupto, kvankam plejparto da ili estas junaj?"

Pindolo respondis, "Via Reĝa Moŝto, la Budho instruis al ni sintenadon al virinoj. Li instruis al ni, ke ni vidu pliaĝajn virinojn kiel niajn patrinojn, mezaĝajn virinojn kiel niajn fratinojn, kaj junajn virinojn kiel niajn filinojn. Laŭ tiu ĉi instruo, la disĉiploj tenas siajn menson kaj korpon puraj kaj ne tentataj de volupto, kvankam plejparto da ili estas junaj."

"Tamen, respektata instruisto mia, oni eble havus malĉastajn pensojn al virinoj samaĝaj kiel patrinoj, al virinoj samaĝaj kiel fratinoj, al virinoj samaĝaj kiel filinoj. Kiamaniere disĉiploj de Budho povas regi siajn dezirojn?"

"Via Reĝa Moŝto, la Honorato instruis al ni observi,

ke nia korpo estas plena de diversaj malpuraĵoj kiel sango, puso, ŝvito, kaj graso; observante tiamaniere, eĉ ni junuloj povas gardi nian korpon pura.”

“Respektata instruisto mia,” ankoraŭ demandis la Reĝo, “Tio povus esti facila por vi, disĉiploj de Budho, kiuj trejnis vian korpon kaj poluris vian saĝon, sed tio estas malfacila por tiuj, kiuj ankoraŭ ne trejnis sin, eĉ se ili nomiĝas disĉiploj de Budho. Eĉ se ili eble provas rememori malpuraĵojn, iliaj okuloj sekvas belajn formojn. Eĉ se li eble provas vidi malbelaĵojn, ili estas allogataj de belaj figuroj. Devas troviĝi ia alia motivo, por ke disĉiploj de la Budho povu teni sian konduton pura.”

“Via Reĝa Moŝto,” respondis Pindolo, “la Honorato instruas al ni gardi la pordojn de kvin sentoj. Kiam ni vidas belajn figurojn kaj kolorojn per niaj okuloj, kiam ni aŭdas plezurajn sonojn per niaj oreloj, kiam ni flaras odorojn per nia nazo, kiam ni gustumas per nia lango, kiam ni tuŝas objektojn per niaj manoj, ni devas neniam esti alkroĉitaj al belaĵoj kaj komfortaĵoj, nek esti irititaj de malbelaĵoj kaj malkomfortaĵoj. Al ni estas instruite ĉi tiel. Laŭ tiu ĉi instruo de la Honorato, eĉ junaj disĉiploj povas teni sian korpon kaj menson pura.”

“Respektata instruisto mia, la instruo de la Budho estas vere superba. De mia propra sperto mi sciiĝis, ke se

mi alfrontas ion belan aŭ plezuran kaj ne gardas mian menson, ĝi tuj estas malordigita de malnobla sento. Ke ni tenas niajn kondutojn puraj kaj gardas la pordojn de kvin sentoj, estas grava afero.”

8. Kiam ajn oni esprimas la penson en sia menso per ago, ĉiam troviĝas reago, kiu sekvas ĝin. Se oni insultas vin, vi probable volas reagi atakeme kaj venĝi la insultinton. Oni devas sin gardi pri tiu ĉi reakcio. Tio similas al kraĉado kontraŭ vento; la salivo malpurigas neniun alian ol la kraĉinton mem. Tio similas al balaado kontraŭ vento; la polvo ne foriras sed malpurigas la balainton mem. La inklinon al venĝo ĉiam sekvas malfeliĉo.

9. Estas tre bona ago forigi avidecon kaj kreskigi bonfareman menson. Estas ankoraŭ pli bone teni sian menson direktita al la Nobla Vojo.

Oni devas forigi egoisman menson kaj anstataŭigi ĝin per klopodado helpi aliulojn. Ago feliĉigi aliulojn inspiras al ankoraŭ aliaj homoj fari la samon. Tiamaniere feliĉo naskiĝas.

Miloj da kandeloj povas esti bruligitaj de unu kandelo, kaj tamen la vivo de la unua kandelo ne mallongiĝas per transdonado de fajro. Tiel same, feliĉo ne malkreskas per komunigado.

Tiuj, kiuj serĉas Vervekiĝon, devas esti atentemaj al sia unua paŝo unu post la alia. Kiom ajn altan esperon oni havas, ĝi devas esti atingita paŝon post paŝo. Ne forgesu, ke ĉiu paŝo sur la vojo al Vervekiĝo troviĝas en nia ĉiutaga vivo.

10. Ĉe la komenco de la vojo al Vervekiĝo troviĝas dudek malfacilaĵoj, kiujn ni devas venki en tiu ĉi mondo: 1. Estas malfacile por malriĉulo esti malavara. 2. Estas malfacile por orgojla homo lerni la vojon al Vervekiĝo. 3. Estas malfacile serĉi la vojon al Vervekiĝo riskante sian vivon. 4. Estas malfacile naskiĝi dum Budho vivas en la mondo. 5. Estas malfacile aŭskulti la instruon de Budho. 6. Estas malfacile teni la menson pura kontraŭ la instinkto de la korpo. 7. Estas malfacile ne deziri belajn kaj allogajn aĵoj. 8. Estas malfacile por potenculo ne uzi sian forton por satigi siajn dezirojn. 9. Estas malfacile ne koleri, kiam oni estas insultita. 10. Estas malfacile esti trankvila, kiam diversaj cirkonstancoj tentas nin. 11. Estas malfacile lerni amplekse kaj profunde. 12. Estas malfacile ne malestimi komencantojn. 13. Estas malfacile teni sin humila. 14. Estas malfacile trovi bonajn amikojn.

15. Estas malfacile observi la disciplinon, kiu kondukas nin al Vervekiĝo. 16. Estas malfacile ne esti malordigita de eksteraj kondiĉoj kaj cirkonstancoj. 17. Estas malfacile instrui aliulojn sciiĝinte iliajn kapablojn. 18. Estas malfacile konservi la paceman menson. 19. Estas malfacile ne disputi pri justeco kaj maljusteco. 20. Estas malfacile trovi kaj lerni bonan metodon.

11. Bonuloj kaj malbonuloj diferencas inter si per siaj karakteroj. Malbonuloj ne rekonas sian pekoplenan agadon; eĉ se ili rekonas sian pekon, ili ne volas ĉesigi sian agon kaj malŝatas aŭdi admonon de aliuloj. Bonuloj estas sentemaj rilate al justeco kaj maljusteco; ili tuj ĉesigas sian agadon, kiam ili rekonas malbonon en ĝi. Ili estas dankemaj al tiuj, kiuj atentigas ilin pri tiu malbona ago.

Tiamaniere bonuloj kaj malbonuloj diferencas inter si per siaj esencoj. Malbonuloj neniam ŝatas bonkorecojn montritajn de aliuloj, dum saĝuloj estas ĉiam dankemaj kaj klopodas esprimi sian dankemon ne nur al la favorantoj sed al ĉiuj homoj, havante en sia menso kompatemon.

III
INSTRUOJ EN MALNOVAJ FABELOJ

1. Antaŭ multaj jaroj estis lando, kiu havis tre strangan kutimon; en la lando, tiuj, kiuj maljuniĝis, estis forlasitaj en malproksima kaj nealirebla monto laŭ la ordono de la reĝo de la lando.

Iu ministro, kiu servadis al la reĝo, ne kuraĝis forlasi sian maljunan patron, kaj tial li konstruis sekretan subteran kavon, kien li kaŝis sian patron kaj plenumis filajn devojn al li.

Iun tagon dio aperis antaŭ la reĝon de la lando kaj donis al li malfacilan problemon, dirante, ke se li ne povos solvi ĝin, lia lando detruiĝos. La problemo estis: "Tie ĉi estas du serpentoj; distingu la sekson unu de la alia."

Nek la reĝo nek iu ajn en la palaco povis solvi la problemon; tial la reĝo anoncis tra la lando, ke tiu, kiu povas solvi, ricevos grandan rekompencon.

Reveninte hejmen la ministro iris al la loko, kie lia patro kaŝis sin, kaj demandis lin pri la solvo al la problemo; la patro tuj diris, "Estas tre facile. Metu la du

serpentojn sur molan tapiŝon; tiu, kiu movas sin tumulte, estas vira, kaj tiu, kiu restas senmova, estas ina.” La ministro parolis al la reĝo tiel, kiel lia patro instruis, kaj la problemo estis sukcese solvita.

Poste la dio proponis aliajn malfacilajn demandojn, kiujn la reĝo kaj liaj vasaloj ne povis respondi, sed kiujn la ministro ĉiam povis solvi, konsultinte sian patron.

Jen kelkaj el la demandoj kaj la respondoj. “Kiu estas nomata vekiĝinto, estante dormanta? Kaj kiu estas nomata dormanto, estante vekiĝinta?” La respondo estas jena: — Estas tiu, kiu nun trejnas la vojon por Vervekiĝo. Tiu estas vekiĝinta kompare kun tiuj, kiuj ne havas intereson je Vervekiĝo; li estas dormanta kompare kun tiuj, kiuj jam atingis Vervekiĝon.

“Kiamaniere vi povas pesi grandan elefanton?” “Ŝarĝu boaton per la elefanto kaj streku linion por marki, kiom la boato subakviĝis. Poste formetu la elefanton kaj ŝarĝu la boaton per ŝtonoj, ĝis ĝi subakviĝas ĝis la linio kaj pesu la ŝtonojn.”

“Kion signifas la diro ‘Akvo en unu taso estas pli multa ol akvo en oceano’?” Respondo estas jena: “Akvo en unu taso donita al ies gepatroj aŭ al malsanuloj pro pura kaj kompatema animo havas eternan meriton, sed

akvo en oceano iam elĉerpiĝos, kiom ajn granda amaso da akvo estas.”

La dio aperigis malsatulon tre malgrasan kun nur haŭto kaj osto, kiu diris, “Ĉu en tiu ĉi mondo troviĝas iu, kiu pli malsatas ol mi?” “Tiu, kiu estas egoisma kaj avida, kiu ne fidas la Tri Trezorojn de Budho, Darmo kaj Samgo, kaj kiu ne faras oferadon al siaj gepatroj kaj instruistoj, estas ne nur pli malsata, sed li falos en la mondon de malsataj demonoj kaj suferos de malsato por ĉiam.

“Jen estas kvadrata tabulo de melia ligno; kiu flanko de la tabulo estis la malsupro de la arbo?” “Metu la tabulon sur akvon; la flanko, kiu sinkas iom profunden, estis proksima al la radiko.”

“Jen estas du ĉevaloj, kiuj havas samajn grandecojn kaj formojn; unu estas patrino kaj la alia estas ŝia ido. Kiamaniere vi povus distingi ilin?” “Donu al ili fojnon; la patrina ĉevalo ŝovos la fojnon al sia ido.”

Ĉiu respondo al tiuj ĉi malfacilaj demandoj ĝojigis tiel la dion kiel la reĝon. La reĝo fariĝis dankema, sciiĝinte ke la respondoj venis de la maljuna patro, kiun la ministro kaŝis en la kavo, kaj la reĝo abolis sian ordonon forlasi maljunulojn en monto kaj anstataŭe ordonis, ke ili estu traktataj kun bonkoreco.

2. Reĝino Videho en Hindio iam sonĝis pri blanka elefanto, kiu havis ses eburajn dentegojn. Ŝi tre deziris la dentegojn kaj petis de la reĝo, ke li havigu ilin al ŝi. Kvankam tia tasko ŝajnis esti neebla, la reĝo, kiu tre amis la reĝinon, promesis grandan rekompencon al iun ajn ĉasisto, kiu raportos pri tia elefanto.

Hazarde en la Himalaja montaro troviĝis tia elefanto kun ses dentegoj, kiu estis sin trejnanta por fariĝi Budho. La elefanto iam savis la vivon de iu ĉasisto el danĝero en la fundo de la monto, kaj la ĉasisto povis reveni sekure al sia hejmlando. La ĉasisto tamen, blindigita de granda profito akirota de ĝia eburo kaj forgesinta la bonvolecon, kiun la elefanto montris al li, reiris al la monto por mortigi la elefanton kaj preni la eburon.

La ĉasisto, sciiĝinte ke la elefanto estis serĉanta Budhecon, alivestis sin per la robo de budhista monaĥo por ne doni gardemon, proksimiĝis al la elefanto en la monto, kaj pafis venenan sagon.

La elefanto sciiĝis, ke ĝia morto estas proksima, kaj ke la ĉasisto estis venkita de vulgara deziro al rekompenco. Tial ĝi havis kompaton por li kaj ŝirmis lin inter siaj kvar gamboj por protekti la ĉasiston kontraŭ

venĝoj de aliaj furiozaj elefantoj. Tiam la elefanto demandis al la ĉasisto, kial li faris tian stultan agon. La ĉasisto rakontis pri la rekompenco kaj konfesis, ke li deziris ĝiajn ses dentegojn. La elefanto tuj rompis la dentegojn frapante ilin kontraŭ arbo, donis ilin al la ĉasisto, kaj diris, "De tiu ĉi ofero mi kompletigis mian trejnadon por Budheco kaj renaskiĝos en la Puran Landon. Kiam mi fariĝos Budho, mi helpos vin por forigi viajn tri venenajn sagojn de avideco, kolero kaj malvido."

3. En arbustaro ĉe la piedo de la Himalajo iam loĝis unu papago kune kun multaj bestoj kaj birdoj. Iun tagon fajro estiĝis en la arbusto pro la frotado de bambuoj, kiun kaŭzis forta vento. Birdoj kaj bestoj estis timigitaj en konfuzo. La papago, sentante kompaton por ilia timo kaj sufero, kaj dezirante repagi por la bonkoreco, kiun ĝi ricevis de la arbustaro, kie ĝi povis kaŝi sin, provis fari ĉion, kion ĝi povis. Ĝi trempis sin en proksima lageto, flugis super la fajron, kaj verŝis gutojn da akvo sur la fajron por estingi ĝin. Ĝi ripetis tion diligente kun menso de kompato kaj kun dankemo al la arbustaro.

Tiu ĉi spirito de bonkoreco kaj sinofero estis rimarkita de dio, kiu malsupren venis de la ĉielo kaj diris al la papago, "Vi havas bravan animon, sed kiel vi povus estingi tian grandan fajron per kelkaj gutoj da akvo?" La papago respondis, "Estas nenio, kion la spirito de

dankemo kaj sinofero ne povas plenumi. Mi provos ripete kaj ripete ankaŭ en mia venonta vivo.” La granda dio estis impresita de la spirito de la papago, kaj ili kune estingis la fajron.

4. Antaŭ longa tempo en la Himalajo vivis birdo, kiu havis unu korpon kaj du kapojn. Iam unu el la kapoj rimarkis, ke la alia kapo manĝas iun dolĉan frukton. Ĝi sentinte ĵaluzon, diris al si, “Mi do manĝu venenan frukton.” Kaj ĝi manĝis venenon kaj la birdo mem mortis.

5. Iun fojon la vosto kaj la kapo de serpento kverelis pri tio, kiu el ili estu en antaŭo por rampi. La vosto diris, “Vi ĉiam prenas gvidon, sed tio ne estas justa. Vi devas lasi min iri antaŭ vi de tempo al tempo. La kapo respondis, “Estas la natura leĝo, ke mi estu la antaŭa. Mi ne povas ŝanĝi mian rolon pro vi.”

Sed la kverelo daŭris. Iun tagon la vosto ligis sin al arbo kaj tiel malebligis la kapon antaŭeniri. Kiam la kapo laciĝis de la baraktado kaj fine la vosto antaŭeniris. Pro tio la serpento falis en la kavon de fajro kaj brulmortis.

En la mondo de naturo troviĝas adekvata ordo kaj ĉio havas sian propran funkcion. Se tiu ĉi ordo estas konfuzita, la funkciado rompiĝas kaj la tuta ordo ruiniĝas.

6. Iam estis viro kolerema. Iun tagon du viroj parolis pri li antaŭ lia domo. Unu diris al la alia, “Li estas bona homo, sed estas tre malpacienca; li havas koleriĝan temperamenton kaj emas tuj ekkoleri.” La viro subaŭdis la rimarkon kaj elkuris el la domo por ataki la du virojn; li batis, frapis kaj vundis ilin.

Saĝulo akceptas konsilon pri sia eraro, ekzamenas sin mem, kaj plibonigas sian konduton, dum malsaĝulo, aŭdinte konsilon pri siaj malbonaĵoj, ne nur malestimas la konsilon sed ripetas la saman eraron.

7. Foje estis riĉa sed malsaĝa viro. Kiam li vidis belan tri-etaĝan domon de alia homo, li enviis ĝin kaj decidis havi tian domon, pensante ke li mem estas tiel riĉa. Do li venigis ĉarpentiston kaj ordonis lin konstrui tiel same belan domon.

La ĉarpentisto konsentis, kaj tuj komencis konstrui. Li konstruis unue la fundamenton, poste la unuan etaĝon, la duan etaĝon kaj la trian etaĝon. Sed la malsaĝulo diris senpacience, “Mi ne bezonas fundamenton, nek la unuan etaĝon, nek la duan etaĝon; mi bezonas la belan trian etaĝon. Konstruu ĝin rapide”

Malsaĝulo ĉiam pensas nur pri rezulto kaj estas senpacienca, ne tenante penon, kiu necesas por havi bonajn rezultojn. Povas esti nenia rezulto bona sen ĝusta peno, same kiel la tria etaĝo ne povas esti sen la fundamento kaj la unua kaj la dua etaĝoj.

8. Iu malsaĝulo boligis mielon. Kiam lia amiko subite vizitis lin, li volis regali lin per iom da mielo. Sed ĝi estis tro varmega; li ventumis ĝin por malvarmigi, ne estinginte la fajron,. Tiel same, ne estas eble akiri la mielon de klara saĝeco, ne estingante la fajron de vulgaraj pasioj.

9. Foje estis du demonoj, kiuj pasigis tutan tagon por disputi kaj kvereli pri unu kesto, unu bastono kaj unu paro da ŝuoj. Iu viro preterpasante demandis, "Kial vi disputas pri tiuj objektoj? Kian magian forton ili havas? Kial vi devas kvereli por posedi ilin?"

La demonoj klarigis al li, ke el la kesto ili povas venigi ion ajn, kion ili deziras — manĝaĵon, vestaĵon aŭ trezorojn, per la bastono ili povas venki malamikojn, kaj kun la paro da ŝuoj ili povas vojaĝi tra la aero.

Aŭdinte tion, la viro diris, "Kial vi kverelas? Se vi estos for de ĉi tie por momento, mi povas dividi la objektojn egale al vi." Kaj la du demonoj retiris sin kaj tuj

foriris. Kaj la homo tuj surmetis la ŝuojn, ekprenis la keston kaj la bastonon kaj deflugis tra la aero.

"La demonoj" ĉi tie simbolas homojn de herezaj kredoj. "Kesto" signifas la mondonacon. Ili ne komprenas, ke multaj trezoroj povas esti produktataj el bonfarado. "Bastono" signifas la praktikadon de koncentriĝo de la animo. Ili povas venki ĉiujn vulgarajn dezirojn. "Paro de ŝuoj" signifas la puran disciplinon de penso kaj kondukado, kiu kondukas ilin for de ĉiuj deziroj. Ne sciante ĉi tion, ili kverelis kaj disputis pri la kesto, la bastono kaj la paro da ŝuoj.

10. Foje iu viro estis vojaĝanta sola. Kiam fariĝis krepusko, li venis al neokupita domo kaj decidis tranokti tie. Noktomeze unu demono alportis kadavron de homo kaj metis ĝin sur la plankon. Post nelonge alia demono aperis kaj pretendis, ke la kadavro apartenas al li, kaj ili kverelis pri ĝi.

La unua demono diris, ke estas senutile kvereli plu pri ĝi, kaj proponis lasi juĝon al alia atestanto por decidi posedanton de la kadavro. La alia demono konsentis tion, kaj ekvidinte la viron kaŭrantan en angulo, demandis lin, kiu la unua alportis la kadavron. La viro terure ektimis, ĉar li bone sciis, ke kian ajn decidon li faros, li kolerigos demonon, kiu malgajnos la kadavron, kaj estos mortigita

de li. Sed la viro decidis diri malkaŝe tion, kion li vidis.

Kiel li antaŭsupozis, tio kolerigis la duan demonon, kiu deŝiris unu el liaj brakoj. Sed la unua demono anstataŭigis la perditan brakon per tiu de la kadavro. La furiozanta demono deŝiris lian alian brakon, sed la unua demono tuj anstataŭigis ĝin per la alia brako de la kadavro, kaj tiel iris ĝis ambaŭ brakoj, ambaŭ kruroj, la kapo kaj la korpo; ili estis unu post la alia deŝiritaj kaj anstataŭigitaj per la respondaj partoj de la kadavro. Tiam la du demonoj, vidinte la partojn de la viro forĵetitajn sur la planko, kolektis kaj manĝis ilin, kaj poste foriris.

La kompatinda viro, kiu rifuĝis en la senhoman domon, estis ĉagrenita de sia malfeliĉo. La partoj de lia korpo, kiujn la demonoj formanĝis, estis donitaj de liaj gepatroj, kaj tiuj ĉi partoj, kiuj nun apartenas al li, estas tiuj de la kadavro. Kiu do estas li nun? Pripensante ĉi tiujn faktojn, li ne povis ordigi ilin kaj elvagis el la domo kiel frenezulo. Alveninte al iu templo, li eniris en ĝin kaj rakontis sian ĉagrenon al la tieaj monaĥoj.

Oni povis vidi la veran signifon de sen-egoeco en tiu ĉi rakonto.

11. Iam bela virino en bela vesto vizitis ies domon. La mastro de la domo demandis ŝin, kiu ŝi estas. La virino respondis, ke ŝi estas diino de riĉeco. La mastro de la

domo ĝojis kaj afable ŝin gastigis.

Post nelonge aperis alia virino malbela kaj vestita malbele kaj malriĉe. La mastro demandis, kiu ŝi estas. La virino respondis, ke ŝi estas diino de malriĉeco. La mastro estis surprizita kaj volis forpeli ŝin el la domo, sed la virino rifuzis foriri, dirante, “La virino de riĉeco estas mia fratino. Inter ni estas interkonsento, ke ni neniam vivu apartaj; se vi forpelas min, ŝi iros kune kun mi.”. Tiel dirinte, la malbela virino tuj foriris, kaj ankaŭ la bela virino malaperis.

Kie estas naskiĝo, tie estas morto. Kie estas feliĉo, tie estas malfeliĉo. Malbonaj aferoj sekvas bonajn aferojn. Homoj devas klarvidi tion ĉi. Malsaĝuloj timegas malfeliĉon kaj strebas gajni feliĉon. Sed tiuj, kiuj serĉas Vervekiĝon, devas transcendi ilin ambaŭ kaj devas ne alteniĝi al ili.

12. Iam vivis malriĉa pentristo, kiu foriris de sia domo por serĉi sian fortunon, lasante hejme sian edzinon. Post tri jaroj da malfacilaj klopodoj li povis ŝparis tri cent pecojn da oro kaj decidis reiri al sia hejmo. Survoje li venis al granda templo, kie solena ceremonio de oferado ĵus okazis. Li estis treege impresita kaj diris al si, “Ĝis nun mi pensis nur pri estanteco, sed neniam konsideris

mian estontecan feliĉon. Estas parto de mia bona fortuno, ke mi venis al tiu ĉi loko. Mi devas utiligi tion por planti semojn de merito.” Pensante tiel, li donacis sian tutan ŝparitan monon al la templo kaj revenis senmona al sia hejmo.

Kiam li revenis hejmen, lia edzino riproĉis lin, ĉar li alportis al ŝi neniom da mono. La kompatinda pentristo respondis, ke li gajnis iom da mono, sed rezervis ĝin en sendanĝera provizejo. Kiam ŝi demandis pri la loko, kie li rezervis, li konfesis, ke li donacis ĝin al la monaĥoj de iu templo.

Tio kolerigis la edzinon. Ŝi insultis sian edzon kaj fine akuzis lin al la distrikta juĝejo. Kiam la juĝisto demandis la pentriston pri lia defendo, li diris, “Mi ne agis malsaĝe, ĉar mi gajnis monon per peniga klopodo dum longa tempo kaj volis uzi ĝin kiel semon por estonteca bona fortuno. Kiam mi venis al la templo, ŝajnis al mi, ke tie estas la kampo, kie mi devas planti mian oron kiel semon por bona fortuno. Kiam mi donacis al la monaĥoj la oron, ŝajnis al mi, ke mi forĵetis ĉian avidecon kaj avarecon el mia menso, kaj mi konstatis, ke vera riĉo ne estas oro, sed menso.”

La juĝisto laŭdis la spiriton de la pentristo, kaj tiuj, kiuj aŭdis tion, montris sian favoron helpante lin en

diversaj manieroj. Kaj poste la pentristo kaj lia edzino eniris en konstantan bonan fortunon.

13. Iu viro, kiu loĝis apud tombejo, nokte aŭdis ies voĉon el tombo voki lin. Li estis tiel timigita, ke li ne povis mem esplori la voĉon. La sekvan tagon li parolis pri tio al siaj kelkaj amikoj. Kuraĝulo el la amikoj decidis serĉi la lokon, de kie la voĉo venis.

Dum tiu viro estis tremanta pro timo, la brava amiko iris al la tombejo, kaj certe la saman voĉon li aŭdis el tombo. Li demandis al la voĉo, kio ĝi estas, kaj kion ĝi deziras. La voĉo respondis el sub la tero; "Mi estas kaŝita trezoro, kiun mi mem decidis doni al iu alia. Mi volis donaci ĝin al tiu viro en la lasta nokto, sed li estis tiel timema, ke li ne venis; tial mi min donacu al vi, kiu taŭgas por ricevi. Morgaŭ matene mi venos al via domo kune kun miaj sep subuloj."

La amiko diris, "Mi atendos vin, sed bonvolu diri al mi, kiel mi devas regali vin?" La voĉo respondis, "Ni venos en la roboj de monaĥo. Antaŭ ĉio pretigu vian ĉambron por ni; lavu vian korpon kaj purigu la ĉambron, kaj atendu min preparante ok bovlojn plenigitajn per kaĉo. Post manĝo, konduku nin unu post la alia en la

ĉirkaŭbaritan ĉambron, kie ni aliformigos nin mem en potojn plenajn de oro.

En la sekva mateno li lavis sian korpon kaj purigis la ĉambron tiel, kiel al li estis sugestite, kaj atendis la aperon de la ok monaĥoj. En la ĝusta tempo ili aperis kaj li akceptis ilin ĝentile. Post kiam ili finis manĝon, li kondukis ilin unu post la alia en la ĉirkaŭbaritan ĉambron, kie ĉiu monaĥo aliformigis sin en poton plenan de oro.

En la sama vilaĝo estis tre avida viro. Li sciiĝis pri la okazaĵo kaj deziris la potojn plenajn de oro. Li invitis aliajn ok monaĥojn al sia domo. Post ilia manĝado, li kondukis ilin en la ĉirkaŭbaritan ĉambron, sed ili ne aliformigis sin en la potojn, sed fariĝis koleraj kaj krie akuzis la avidan viron al la polico, kiu fine arestis lin.

La unua timema viro, aŭdinte ke la voĉo de la tombo alportis trezoron al la brava viro, iris al lia domo kaj avide postulis la oron, insistante ke ĝi apartenas al li, ĉar la voĉo estis unue adresita al li. Kiam la timema viro provis preni la potojn, li trovis multe da serpentoj levantaj iliajn kapojn por ataki lin.

La reĝo de tiu ĉi lando aŭdis tion kaj juĝis, ke la poto apartenas al la brava viro, kaj diris jenan rimarkon: “Ĉio en la mondo similas al tiu ĉi afero. Malsaĝuloj

deziras nur bonajn rezultojn, sed ili estas tiel timemaj por strebi al la celo, kaj ili ĉiam malsukcesas. Ili neniam fidas sian forton nek havas kuraĝon por fronti kontraŭ la interna batalado de menso, de kiu sola vera paco kaj harmonio povas esti akirataj.

LA VOJO DE PRAKTIKO

I

SERĈADO DE LA VERO

1. Se temas pri serĉado de vero, troviĝas diversaj demandoj negravaj. De kiaj materialoj estas konstruita la universo? Ĉu ĝi estas eterna? Ĉu ĝi havas limon? Kiamaniere estas organizita tiu ĉi socio de homoj? Kia estas la ideala formo por la socio? Se vi prokrastas serĉadon de la vojo kaj praktikon por Vervekiĝo tiel longe, dum tiuj ĉi demandoj ne estas solvitaj, vi mortos, antaŭ ol vi trovos la vojon.

Supozu, ke iu viro estas pafita per venena sago kaj liaj parencoj kaj amikoj kunvenintaj volas voki kuraciston por eligi la sagon kaj kuraci lin kontraŭ la veneno.

Supozu, ke la vundito diras, “Atendu momenton! Antaŭ ol vi eligos la sagon, mi deziras scii, kiu pafis la sagon? Ĉu tiu estis viro aŭ virino? Ĉu tiu estis noblulo aŭ kamparano? Kaj el kio estas farita la pafarko? Ĉu ĝi estas granda aŭ malgranda? Ĉu ĝi estas farita el ligno aŭ bambuo? El kio estas farita la arkoŝnuro? Ĉu ĝi estas fibro aŭ tendeno? Ĉu la sago estas el visterio aŭ fragmito? Kio estas ĝia plumo? Atendu eligi la sagon, ĝis mi estos informita pri ĉiuj ĉi aferoj!” Kio okazos al li?

Antaŭ ol li estos informita pri tiuj ĉi demadoj, sendube la veneno cirkulos tra la korpo kaj li mortos. En tiu ĉi okazo, tio kion ni devas unue pripensi, estas eligi la sagon kaj kuraci la vundon, por ke la veneno ne cirkulu en la tuta korpo.

Kiam fajro de pasioj danĝerigas la mondon, la demando pri la konstruo de la universo apenaŭ gravas. Kia estas la ideala formo de la homa komunumo estas ne tre grava por pritrakti.

La demandon, ĉu la universo havas limon, aŭ ĉu ĝi estas eterna, oni povas flanken lasi ĝis estos trovita ia maniero estingi la fajron de naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto. En la mezo de melankolio, tristo, sufero kaj ĉagreno, oni devas unue serĉi la vojon por solvi tiujn ĉi problemojn kaj strebi al la praktikado de la vojo.

La instruo de la Budho inkludas gravaĵojn, kiujn ni devas koni, kaj ekskludas negravaĵojn. Nome, la Budho instruas al homoj, ke ili devas lerni tion, kio estas lernenda, forigi tion, kio estas forigenda, praktiki tion, kio estas praktikenda, kaj klarvidi tion, kio estas klarvidenda.

Tial, homoj devas scii, kio estas la plej grava, kiu problemo devas esti solvita la unua, kaj kiu tasko estas la

plej urĝa por ili. Por scii ĉi supre menciitajn aferojn, antaŭ ĉio ili devas entrepreni trejni sian menson; t.e. ili devas unue peni regi sian menson.

2. Supozu, ke iu viro eniras en arbaron por preni medolon, kiu kreskas en la centro de arbo, kaj revenis kun branĉoj kaj folioj, pensante, ke li jam akiris medolon. Tio estas tute stulta. Sed homoj ofte kontentiĝas nur kun arbaj eksteraĵoj, kvankam ilia vera celo devas esti kapti la internan esencon.

Ĉi tie arba medolo signifas veron, kiun homoj serĉas kun la deziro liberiĝi de naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo kaj morto, aŭ de malĝojo, lamento, sufero kaj ĉagreno. Se iu homo, gajninte iom da respekto kaj honoro, fariĝas memkontenta kaj tro fiera, laŭdas sin mem kaj mallaŭdas aliajn, tiu eraras same kiel la viro, kiu pensas, ke li akiris arban medolon, kvankam li efektive akiris nur branĉojn kaj foliojn.

Se iu kontentiĝas kun iom da progreso, kiun tiu faris per malgranda klopodo, haltigas sian klopodon kaj iĝas fiera kaj aroganta, tio ankaŭ samas kiel la konduto de la supre menciita viro, kiu efektive akiris nur arban ŝelon.

Kaj se iu trovas, ke ties menso fariĝis pli trankvila

kaj ties penso pli klara, kaj haltigas sian klopodon kaj iĝas fiera kaj aroganta, tio ankaŭ samas kiel la konduto de la supre menciita viro, kiu efektive akiris nur arban endodermison.

Kaj se iu iĝas fiera kaj aroganta, opiniante ke tiu gajnis la kapablon de intuicia kompreno, tiu estas sama kiel la viro, kiu pensas, ke li akiris arban medolon, kvankam li efektive akiris arban fibron. Ĉi tiuj serĉantoj facilanime kontentiĝas de sia nesufiĉa klopodado, iĝas fieraj kaj arogantaj, haltigas sian klopodon, enfalas en pigrecon. Konsekvence ili denove invitos suferojn.

Tiuj, kiuj serĉas la veran vojon al Vervekiĝo, devas ne esperi facilan aŭ agrablan taskon, nek esti plezuraj pro respekto, honoro aŭ oferaĵoj. Kaj plie ili devas ne celi etan klopodon nek bagatelan progreson en trankvileco, kono kaj klarvidado.

Antaŭ ĉio homoj devas klare teni en sia menso la fundamentan kaj esencan naturon de tiu ĉi mondo de naskiĝo-kaj-morto.

3. La mondo ne havas sian propran substancon. Ĝi aperas laŭ la konkordo de kaŭzoj kaj kondiĉoj, kiuj havis sian originon, sole kaj ekskluzive, en la aktiveco de la

menso, kiu estas instigita de malsaĝo, mem-trompo, deziroj kaj ampasio. La mondo de iluzio ne estas io ekstera, pri kiu la menso false konceptas. Ĝi havas nenian ajn substancon, sed aperas laŭ la proceso de la menso mem, montrante siajn proprajn iluziojn. Ĝi estas fondita kaj konstruita de la deziroj de la menso, de ĝiaj suferoj kaj baraktoj akompanantaj la doloron kaŭzitan de ĝiaj propraj avideco, kolero kaj malsaĝo. Homoj, kiuj serĉas la vojon al Vervekiĝo, devas esti preta je batalado kontraŭ ĉi tia menso por atingi sian celon.

4. "Ho, mia menso! Kial vi ŝvebas tiel maltrankvile super la ŝanĝiĝemaj cirkonstancoj de vivo ? Kial vi igas min tiel konfuza kaj maltrankvila? Kial vi instigas min kolekti tiel multe da aĵoj? Vi similas al plugilo, kiu frakasiĝas en pecojn antaŭ la komenco de plugado; vi similas al direktilo, kiu estas malmuntita, ĝuste kiam oni estas ekveturonta al la maro de naskiĝo-kaj-morto. Se ni ne bone utiligas tiun ĉi vivon, por kio ni ripetadis renaskiĝojn?"

"Ho, mia menso! Iun fojon vi igis min naskiĝi kiel reĝo, kaj alian fojon vi igis min naskiĝi kiel ekzilito almozanta manĝaĵojn de loko al loko. Kelkajn fojojn vi igis min naskiĝi en ĉiela luksa domego, en kiu mi vivis ekstaza, sed poste vi forpelis min en la fajron de infero."

“Ho, mia malsaĝa, malsaĝa menso! Tiel vi gvidis min al diversaj vojoj, kaj mi ĉiam obeis vin. Sed nun mi aŭdis la instruon de la Budho; tial vi ne plu ĝenu min kaj ne kaŭzu pluajn suferojn, sed lasu min serĉi Vervekiĝon humile kaj pacience.”

“Ho, mia menso! Se vi nur lernus, ke ĉiuj aĵoj ne havas substancon kaj estas efemeraj, se vi nur lernus ne alkroĉi al aĵoj, ne deziregi aĵojn, ne kapitulaci al avideco, kolero kaj malsaĝo, tiam ni povus vojaĝi en trankvilo. Tiam tranĉante la katenon de deziroj per la glavo de saĝo, kaj ne ĝenate de ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj — avantaĝo aŭ malavantaĝo, gajno aŭ perdo, laŭdo aŭ klaĉo —, ni povus resti en paco.”

“Ho, mia kara menso! Tiu estas vi, kiu unue vekis en mi la volon serĉi la vojon; tiu estas vi, kiu sugestis al mi serĉi Vervekiĝon. Tamen kial vi nun tiel facile cedas al avideco, al emo al komforteco, kaj al plezuro ekscitita?”

“Ho, mia menso! Kial vi kuras tien kaj ĉi tien sen difinita celo? Lasu min transpasi ĉi tiun vastan maron de iluzio. Ĝis nun mi agadis laŭ via deziro, sed nun vi devas agadi laŭ mia deziro, kaj ni kune sekvu la instruon de la Budho.”

“Ho, mia kara menso! Montoj, riveroj kaj maroj

estas ŝanĝiĝemaj kaj plenaj de katastrofoj. Kie ni povas trovi trankvilecon en tiu ĉi mondo de iluzio? Ni sekvu la instruon de la Budho kaj transiru al la alia bordo, al Vervekiĝo.”

5. Tiuj, kiuj vere serĉas la vojon al Vervekiĝo, kun forta preteco antaŭenmarŝas. Tial eĉ se ili renkontas mokridantojn aŭ klaĉantojn, ili neniam ŝancelas sian decidon. Eĉ se iu batas ilin per pugno, ĵetas ŝtonon al ili kaj atakas ilin per glavo, ili neniam havas koleron en sia menso.

Eĉ se malamikoj detranĉus ilian kapon de la trunko, la menso devas ne esti ĝenata. Se la menso de vojserĉantoj fariĝas malluma pro tio, tio signifas, ke ili ne estas vera sekvanto de la instruo de la Budho. Kio ajn okazus, ili devas resti solidaj, firmaj, senmovaj, ĉiam radiante kun la menso de compato kaj favoro. Venu kalumnio, venu malfortuno! Tamen vojserĉantoj devas decide resti semovaj kaj trankvilaj en sia menso, plenigite de la instruo de la Budho.

Por atingi Vervekiĝon oni devas provi plenumi ĉiajn ajn taskojn malfacile plenumeblajn, elteni aferojn malfacile elteneblajn, kaj donaci aĵojn malfacile donaceblajn. Se iu diras, ke por atingi Vervekiĝon oni

devas limigi sian manĝaĵon je unu rizograjno tage, manĝu nur tiom. Se la vojo al Vervekiĝo trapasas fajron, ne hezitu trapasi fajron.

Sed donacinte aŭ plenuminte, oni devas ne havi la penson «Mi donacis» aŭ «Mi plenumis». Oni devas agi tiel , ĉar tio estas saĝa kaj prava afero. Oni devas agi kun la spirito de kompato; tio estas same kiel patrino flegas sian malsanan infanon. Patrino neniam havas la penson «Mi flegis».

6. Antaŭ multaj jaroj vivis reĝo, kiu amis sian popolon kaj sian landon. Li regis sian landon kun saĝo kaj bonkoro. Pro tio lia lando prosperis kaj estis paca. Li ĉiam deziris al si pli grandan saĝon kaj klerecon; li eĉ oferis rekompencon al iu ajn homo, kiu povas gvidi lin al valora instruo.

Lia fervoro kaj saĝo finfine atingis la atenton de dioj. Ili decidis unue provi lin. Iu dio aliformiĝinte en demonon aperis antaŭ la pordo de la reĝa palaco, kaj diris, “Bonvolu konduki min antaŭ la reĝon, ĉar mi havas sanktan instruon por li.” La reĝo petis la instruon. Ĉe tio la demono subite en timiga formo postulis manĝaĵon dirante, “Mi ne povas instrui ĝin, ĝis mi ekhavos manĝaĵon.” Tiam la plej bongusta manĝaĵo estis oferita

antaŭ la demono, sed la demono eĉ insistis, ke li devas ekhavi varman homan karnon kaj sangon. Ĉe tio la kronprinco decidis doni sian korpon al la demono kaj ankaŭ la reĝino decidis doni sian korpon. Sed ankoraŭ la demono ne estis kontenta kaj plie postulis la korpon de la reĝo mem.

Tiam la reĝo kun aplombo diris, "Mi volonte oferu al vi mian korpon, sed mi ne povas morti, antaŭ ol mi aŭdos la instruon."

La demono donis sekvantan instruon: "Lamento naskiĝas el la pasio, timo naskiĝas el pasio. Tiuj, kiuj forigis pasion, neniam havas lamenton nek timon." Subite la demono ŝanĝis sin en la originan figuron de la dio. Samtempe la mortintaj princo kaj reĝino aperis en siaj antaŭaj figuroj.

7. Iam vivis iu praktikanto, kiu serĉis la Veran Vojon en la Himalajo. Li tute ne ŝatis iajn ajn trezorojn de la tero nek la plezurojn de ĉielo. Li nur serĉadis la instruon, kiu povas forigi ĉiujn mensajn iluziojn.

La dioj, kortuŝite de lia fervoreco kaj sincereco, decidis provi lian menson. Do unu el la dioj ŝangis sian figuron en demonon kaj aperis en la Himalajo, recitante,

“Ĉio ŝanĝiĝas, ĉio aperas kaj malaperas.”

La praktikanto, aŭdinte ĉi tiun kanton treege ĝojis, kvazaŭ li estus trovinta fonton de malvarmeta akvo, aŭ kvazaŭ sklavo estus liberigita neatendite. Li diris al si mem, “Finfine mi trovis veran instruon, kiun mi delonge serĉadis.” Li sekvis la voĉon. Dezirante trovi la recitinton de la vero, li renkontis teruraspektan demonon. Kun timemo li proksimiĝis al la demono kaj demandis, “Ĉu estis vi, kiu recitis la sanktan verson, kiun mi ĵus aŭdis? Se estis vi, bonvolu reciti ĝin plu.”

La demono respondis, “Jes, ĝi estas mia verso. Sed ĉar mi estas tiel malsata, ke mi ne povas reciti plu, ĝis mi manĝos ion.”

La praktikanto fervore petis de li recii ĝin dirante, “Ĝi havas sanktan signifon kaj la de mi serĉatan instruon. Nun mi aŭdis la parton de ĝi. Bonvolu promesi al mi aŭskulti ĝin plu.”

La demono diris ankoraŭfoje, “Mi estas malsata. Sed se mi povas manĝi karnon kaj sangon de homo, mi recitu la verson ĝis la fino.”

Ĉe tio la praktikanto kun aspiro aŭskulti la instruon promesis doni sian propran korpon al la demono. Finfine

la demono kantis la kompletan kanton jene:

Ĉio ŝanĝiĝas,
Ĉio aperas kaj malaperas.
Kiam oni transcendas aperon kaj malaperon,
Jen estas perfekta trankvilo.

Aŭdinte tion ĉi, 1a praktikanto skribis la verson sur rokoj kaj arboj ĉirkaŭe kaj grimpis sur arbon. Poste li ĵetis sin antaŭ la piedojn de la demono. En tiu momento la demono reŝanĝis sian figuron en dion kaj ricevis lian korpon en la manoj sendifekte.

8. Antaŭ multaj jaroj estis fervora vojserĉanto nomata Sadaprarudito. Li forĵetis ĉiun delogon de profito aŭ honoro kaj riskis sian vivon por serĉi la veran vojon. Iun tagon li aŭdis voĉon de ĉielo, kiu diris, “Sadaprarudito, iru rekte al oriento! Timu nek varmon, nek malvarmon. Neniam estu ĝenata de distingo de bono aŭ malbono. Nur paŝu orienten fervore. En la fora oriento vi certe trovos vian veran instruiston kaj akiros Vervekiĝon.”

Sadaprarudito ĝojegis pro tiu ĉi definitiva instrukcio kaj tuj ekvojaĝis orienten. Iufoje li dormis en soleca kampo, iufoje en sovaĝa montaro. Estante vaganto en fremdaj landoj li suferis de persekutado kaj humiligado. Iufoje li vendis sin mem kiel sklavon por satigi sin,

sentante kvazaŭ li vendus siajn karnon kaj oston. Tamen finfine li renkontis veran instruiston kaj petis lian instruon.

Jen estas proverbo: “Bonaĵo ofte renkontas malhelpon.” Sadaprarudito trovis, ke ĝi estas vera, dum sia vojaĝo al vera vojo. Li ne havis monon por aĉeti kelkajn florojn kaj incenson, kiujn li volis oferi al la instruisto. Li provis vendi sian servon, sed li trovis neniun, kiu dungas lin. Ŝajnis al li, ke iu malbona spirito malhelpas lin kaj deturnigi lin de la celo. La vojo al Vervekiĝo estas tre malfacila, kaj eble ĝi kostas homan vivon.

Sadaprarudito ne havis monon por aĉeti paperon kaj inkon, per kiuj li povas skribi la instruon de la gvidanto. Tial li pikis sian brakon per glavo kaj verŝis sian sangon, per kiu li skribis la vortojn de la gvidanto. Tiamaniere li akiris la altvaloran Veron.

9. Iam estis knabo nomata Sudano, kiu ankaŭ deziris Vervekiĝon kaj fervore serĉis la vojon. De fiŝkaptisto li lernis mirindaĵon pri la maro. De kuracisto li lernis kompaton al malsanuloj suferantaj. De riĉulo li lernis, ke ŝpari malgrandan sumon da mono estas sekreto de lia

granda riĉaĵo, kaj pensis, ke estas necese konservi ĉiun etan gajnon por iri al la vojo al Vervekiĝo.

De meditanta monaĥo li lernis, ke la pura kaj paca menso havas miraklan forton por purigi kaj trankviligi la menson de aliaj homoj. Foje li renkontis virinon havantan noblan karakteron kaj estis impresita de ŝia favorema spirito. De ŝi li lernis, ke amo estas la frukto de saĝo. Foje li renkontis maljunan asketon, kiu diris al li, ke por atingi celon li devas supreniri sur monton de glavoj aŭ trapasi valon de fajro. Tiel, laŭ siaj spertoj Sudano lernis, ke vera instruo povas esti akirata de ĉio, kion li vidis aŭ aŭdis.

Li lernis paciencon de malriĉulo kaj fizike handikapita virino; li lernis lecionon de simpla feliĉo rigardante infanojn ludantajn sur strato; de ĝentilaj kaj humilaj homoj, kiuj deziras nenion, kion ordinaraj homoj deziras, li lernis la sekreton vivi pace kun la tuta mondo.

Li lernis lecionon de harmonio el la komponado de bonodoraj incensaĵoj, kaj lecionon de dankemo el la aranĝado de floroj. Iun tagon en arbaro li ripozis sub granda arbo kaj vidis etan arbon kreskantan apud la arbo velkinta kaj jam falinta. Tio donis al li la instruon, ke homa vivo ne estas konstanta.

Tage sunlumo kaj nokte brilantaj steloj ĉiam freŝigis

lian spiriton per la sperto de lia longa vojaĝo. Tiel Sudano profitis de la spertoj de sia longa vojaĝo.

Vere tiuj, kiuj serĉas Vervekiĝon, devas pensi pri sia menso kvazaŭ pri kastelo gardenda kaj ornamenda. Ili devas larĝe malfermi la pordojn de sia menso direktita al Budho, inviti Ĝin kun respekto kaj humilo en la internon de sia menso, kaj oferi al Ĝi la incenson de konfido kaj la florojn de ĝojo.

II
DIVERSAJ VOJOJ

1. Por tiuj, kiuj serĉas Vervekiĝon, estas la triopa trejnado kiel praktika metodo. Ili devas kompreni kaj sekvi ĝin: la unua ero estas disciplino por praktika konduto; la dua ero estas koncentrado de menso; la tria ero estas saĝo.

Kio estas disciplino? Ĉiuj vojserĉantoj, ĉu monaĥo aŭ laiko, devas observi la preceptojn por bona konduto. Ili devas regi sian menson kaj korpon kaj protekti la pordojn de la kvin sensoj. Ili devas timi eĉ etan kulpon kaj momenton post momento devas penadi fari nur bonajn agojn.

Kion signifas koncentrado de menso? Ĝi signifas forigon de avideco aŭ malbonaj deziroj kaj teni la menson pura kaj trankvila.

Kio estas la saĝo? Ĝi estas la kapablo perfekte kompreni kaj pacience akcepti la Noblan Kvaropan Veron — sciiĝi pri la fakto de sufero kaj ĝia naturo; pri la kaŭzo de sufero: pri la finiĝo de sufero: kaj pri la Nobla Vojo, kiu kondukas al la fino de sufero.

Tiuj, kiuj fervore sekvas tiun ĉi triopan trejnadon, povas esti nomataj disĉiploj de Budho.

Supozu, ke azeno, kiu ne havas bonan formon, nek voĉon nek kornojn kiel tiujn de bovo, sekvas bovaron kaj pretendas, “Vidu, mi ankaŭ estas bovo.” Kiu kredas ĝin? Tiel same estas stulte, ke iu ne sekvante la triopan trejnadon fanfaronas, ke li/ŝi estas vojserĉanto aŭ disĉiplo de Budho.

Por gajni rikolton de kamparo en aŭtuno, kamparano devas anticipe en printempo devas plugi, prisemi kaj irigacii kampojn, kaj ankaŭ elradiki herbaĉojn. Tiel same, serĉantoj de Vervekiĝo devas sekvi la triopan trejnadon. Kamparanoj ne povas atendi, ke ili vidos burĝonojn hodiaŭ, grajnojn morgaŭ kaj rikolton postmorgaŭ. Tiel

same serĉantoj de Vervekiĝo ne povas forigi pasiojn hodiaŭ, detrui alkroĉiĝon morgaŭ kaj akiri Vervekiĝon postmorgaŭ.

Ankaŭ post kiam kamparanoj prisemas kampojn, kreskaĵoj bezonas ilian paciencan laboradon dum longa tempo kaj atendi ŝanĝiĝon de sezono. Tiamaniere ekestas burĝonoj kaj laste rikolto. Tiel same, por akiri Vervekiĝon, praktikantoj devas kulturi la teron de Vervekiĝo laŭ la triopa trejnado, t.e. disciplino, koncentrado de menso kaj saĝo.

2. Estas malfacile paŝi sur la vojo kondukanta al Vervekiĝo, dum oni avidas al luksa vivo, postkuras komforton kaj estas konfuzita de ampasioj. La diferenco inter ĝuado de vivo kaj tiu de la Vera Vojo estas granda.

Kiel jam eksplikite, la menso estas la fonto de ĉiuj aĵoj. Se la menso ĝuas mondumajn aferojn, iluzio kaj sufero sekvos nin neeviteble; sed se la menso ĝuas la Veran Vojon, feliĉo, kontento kaj ĝojego sekvos.

Tial tiuj, kiuj serĉas Vervekiĝon, devas teni sian menson pura kaj pacience sekvi kaj praktiki la triopan trejnadon. Se ili observas la disciplinon, ili konsekvence gajnas koncentradon de menso; kaj se ili gajnas

koncentradon de menso, ilia menso fariĝas klara kaj saĝa, kaj tio kondukas al Vervekiĝo.

Vere, tiu ĉi triopa trejnado — disciplino, koncentrado kaj saĝo — estas vera vojo al Vervekiĝo. Ĉar homoj ne laŭiris la triopan trejnadon, mensaj iluzioj akumuliĝas ĉe ili dum longa tempo. Ili devas ne disputi kun aliaj homoj, sed pacience meditadi en sia interno de pura menso por atingi Vervekiĝon.

3. Se analizi la triopan trejnadon de praktikado, ĝi povas esti klarigita kiel la Nobla Okera Vojo; aŭ kiel la klarvidado el la kvar metodoj, aŭ kiel la ĝusta klopodado el la kvar flankoj, aŭ kiel la kvin fortoj, aŭ kiel la paramito aŭ la perfektigo el la ses branĉoj.

La Nobla Okera Vojo esta la praktikado konsistanta el: la ĝusta vido, la ĝusta penso, la ĝusta vorto, la ĝusta faro, la ĝusta vivo, la ĝusta peno, la ĝusta atento, kaj la ĝusta koncentrado.

La Ĝusta Vido signifas plene kompreni la Noblan Kvaropan Veron, esti konvinkita pri la leĝo de kaŭzo kaj rezulto, kaj ne esti trompita de iluzioj kaj deziroj.

La Ĝusta Penso signifas la rezolutan menson, kiu ne permesas deziregon, avidecon, koleron kaj agon vundi aliajn vivojn.

La Ĝusta Vorto signifas eviti mensogon, senutilan babiladon, kalumnion kaj hipokritan parolon.

La Ĝusta Faro signifas ne mortigi, ne ŝteli kaj ne adulti.

La Ĝusta Vivo signifas eviti hontindan vivmanieron.

La Ĝusta Peno signifas diligentan klopodadon cele al la ĝusta direkto.

La Ĝusta Atento signifas teni puran kaj prudentan menson.

La Ĝusta Koncentrado signifas teni la menson ĝusta kaj trankvila por klarvidi la esencon de la menso, sen ajna neĝusta celo.

4. La klarvidado el la kvar metodoj estas jena: la unua, rigardi la korpon malpuran, klopodante forigi ĉian

alkroĉiĝon al ĝi; la dua, rigardi la sensojn kiel fonton de sufero, kion ajn ili sentas, ĉu doloran aŭ plezuran; la tria, rigardi la menson konstante ŝanĝiĝantan; la kvara, rigardi ĉion en la mondo kiel fenomenon estiĝintan de kaŭzo kaj kondiĉo, kaj konscii, ke nenio restas senŝanĝa por ĉiam.

5. La ĝusta klopodado el la kvar flankoj estas jena: la unua, preventi malbonon antaŭ ol ĝi ĝermas; la dua, fortranĉi malbonon, kiu jam ĝermis; la tria, instigi la menson, por ke bono ĝermu; la kvara, kreskigi bonon, kiu jam ĝermis, kaj grandigi ĝin.

6. La kvin fortoj estas jena: la unua, kapablo de konfido; la dua, kapablo de klopodo; la tria, kapablo de prudenta menso; la kvara, kapablo de koncentrado; la kvina; kapablo teni klaran saĝon. Tiuj ĉi kvin fortoj estas necesaj por Vervekiĝo.

7. La paramito aŭ la perfektigo el la ses branĉoj estas jena: la unua, perfektigi oferon aŭ donacon; la dua, perfektigi observadon de preceptoj; la tria, perfektigi paciencon; la kvara, perfektigi penadon; la kvina, perfektigi koncentradon de menso; la sesa, perfektigi saĝon. Per tiuj ĉi praktikoj oni povas transiri de tiu ĉi

bordo de iluzio al la bordo de Vervekiĝo.

La praktikado de ofero forigas avaran menson; la praktikado de preceptoj profundigas la penson pri justeco; la praktikado de pacienco helpas por regi la timeman kaj kolereman menson; la praktikado de penado helpas nin esti diligentaj; la praktikado de koncentrado helpas nin regi vagantan menson; la praktikado de saĝo ŝanĝas la malluman kaj konfuzitan menson al pura kaj saĝa menso.

Ofero kaj observo de preceptoj faras la fundamenton necesan por konstrui grandan kastelon, t.e. la tutan praktikadon. Pacienco kaj penado estas la muroj de la kastelo kaj protektas nin kontraŭ malamikoj eksteraj. Koncentrado kaj saĝo estas la armiloj, kiuj protektas nin kontraŭ la atako de naskiĝo-kaj-morto.

Doni almozon al petantoj estas la ago de ofero kompreneble, sed ne estas la Vera Ofero. Vera Ofero devenas de simpatia memvola menso, antaŭ ol estas petite, kaj devas esti konstanta, sed ne kelkfoja.

Se post ofero restas la sento de pento aŭ memlaŭdo, ĝi neniam estas Vera Ofero. Vera Ofero estas tia, kia oni oferas kun ĝojo kaj poste forgesas sin mem kiel oferinton kaj forgesas ankaŭ akceptinton kaj oferaĵon.

Estas sep specoj de ofero, kiujn ĉiuj, eĉ malriĉuloj, povas praktiki. La unua estas la fizika ofero, t.e. oferi servon per sia laboro. La plej alta tipo de tiu ĉi ofero estas oferi sian propran vivon, kio estas rakontota en la sekva parabolo. La dua estas la spirita ofero, t.e. oferi kompatan menson al aliaj viv-estaĵoj. La tria estas la okula ofero, t.e. oferi varman rigardon al aliaj homoj, por ke ili estu trankvilaj. La kvara estas ofero de milda mieno, t.e. ĉiam montri rideton sur vizaĝo. La kvina estas parola ofero, t.e. oferi favorajn kaj varmajn vortojn. La sesa estas ofero de loko, t.e. fordoni sian lokon al aliaj homoj. La sepa estas ofero de domo, t.e. liveri al aliaj homoj sian ĉambron kiel tranoktejon. Tiuj ĉi oferoj povas esti praktikataj de ĉiu ajn en ĉiutaga vivo.

8. Antaŭ longe estis princo nomata Satvo. Iun tagon li kaj liaj du pliaĝaj fratoj iris al arbaro por ludi. Tie ili vidis tigron, kiu naskis sep idojn, kaj kiu pro sia malsato estis manĝonta siajn idojn.

La pliaĝaj fratoj forkuris pro timo, sed la princo Satvo grimpis sur krutaĵon kaj ĵetis sin antaŭ la tigron por savi la tigridojn. Tiel li satigis la patrinan tigron kaj savis la sep idojn.

La princo Satvo agis ĉi tiel tute spontane. Sed en sia

menso li pensis: “Ĉi tiu mia korpo estas ŝanĝanta kaj nekonstanta. Ĝis nun mi amis nur la korpon kaj ne konsciis pri oferado, sed vere nun mi oferu mian korpon por akiri Vervekiĝon.” Lia penso montras, kia estu la vera celkonscio por Vervekiĝo.

9. Troviĝas la Kvar Nemezureblaj Mensostatoj, kiujn serĉanto de Vervekiĝo devas atente teni. Ili estas bonkoreco, kompato, simpatia ĝojo kaj egalanimeco. Oni povas forigi avarecon per bonkoreco; oni povas forigi koleron per kompato; oni povas forigi suferon per simpatia ĝojo; oni povas forigi la kutimon de diskriminacio inter amiko kaj malamiko per egalanimeco.

Estas granda bonkoreco doni al aliaj homoj feliĉon kaj kontenton; estas granda kompato forigi suferon kaj malĝojon de aliaj homoj; estas granda simpatia ĝojo fari aliajn homojn feliĉaj kaj kontentaj kun la menso de ĝojo; estas granda egalanimeco konduti al ĉiuj homoj egale kaj sen distingo.

Oni devas teni tiujn ĉi Kvar Nemezureblajn Mensostatojn kaj forigi avarecon, koleron, suferon kaj menson de amo-malamo, sed tio ne estas facila afero. Malbona menso estas malfacile forigebla kvazaŭ gardohundo, kaj ĝusta menso estas facile perdiĝema

kvazaŭ cervo kuranta en arbaro; aŭ malbona menso estas malfacile forigebla kvazaŭ literoj gravuritaj sur ŝtono, kaj ĝusta menso estas facile perdiĝema kvazaŭ vortoj skribitaj sur akvo. Tial, estas plej malfacile en vivo ekzercadi sin por Vervekiĝo.

10. Iam estis junulo nomata Ŝrono, kiu naskiĝis en riĉa familio, sed lia korpo estis malforta denaske. Li estis tre fervora por akiri Vervekiĝon kaj fariĝis disĉiplo de la Budho. Li klopodis tiel penege, ke fine liaj piedoj sangis, tamen li ne povis atingi Vervekiĝon.

La Budho kompatis Ŝronon kaj diris al li, "Ŝrono, vi iam lernis ludi harpon hejme, ĉu ne? Vi scias, ke se la kordoj estas streĉitaj tro forte aŭ malforte, la harpo ne muzikon. Ĝi faras muzikon, nur kiam la kordoj estas streĉitaj tute ĝuste. La trejnado por Vervekiĝo estas simila al la kordo de harpo. Se vi streĉas la kordojn de via menso tro forte aŭ malforte, vi ne povas akiri Vervekiĝon. Vi devas konsideri bone kaj agi saĝe."

Ŝrono trovis tiun ĉi instruon tre profita, kaj fine gajnis tion, kion li serĉis.

11. Iam estis princo, kiu lerte uzis kvin armilojn. Iun

tagon li estis revenanta al sia hejmo el sia praktikado kaj renkontis monstron, kies haŭto estis nevundebla.

La monstro alproksimiĝis al la princo, sed ĝi ne timigis lin. La princo pafis sagon, sed ĝi ne povis vundi ĝin. Sekve li ĵetis lancon, sed ĝi ne povis penetri la dikan haŭton de la monstro. Sekve li ĵetis bastonon kaj ĵetlancon, sed ili tute malsukcesis. Laste li uzis sian glavon, sed ĝi rompiĝis. Finfine li atakis per siaj pugnoj kaj piedoj, sed vane. Tiam la monstro kaptis lin kaj tenis lin firme. Ĉe tio la princo provis uzi siajn membrojn kaj kapon kiel batalilojn, sed vane.

La monstro diris, “Estas senutile batali kontraŭ mi. Nun mi volas manĝi vin.” La princo respondis, “Eble vi pensas, ke mi jam uzis miajn ĉiujn armilojn, sed ankoraŭ mi havas la plej fortan armilon. Se vi englutos min, mi uzos ĝin, kaj mi trarompos vin el la interno de via stomako.”

La kuraĝo de la princo maltrankviligis la monstron, kiu demandis, “Kiamaniere vi povas agi tiel?” La princo respondis, “Per la forto de Vero.” Tiam la monstro liberigis lin kaj petis de li instrui la Veron.

Tiu ĉi fablo instruas, ke disĉiploj havu kuraĝon en sia penado kaj estu sentima fronte al multe da malfavoraj aferoj.

12. Memfieraĉo kaj senhonteco difektas la homaron, sed memkritiko kaj humila menso protektas homojn. Per tiu ĉi bona menso homoj respektas siajn gepatrojn, pliaĝajn gefratojn kaj superulojn, ĉar ili estas sentemaj pri malhonoro kaj honto. Estas meritplene fari repripenson pri si mem, reteni memhonorigon, kaj senti honton rigardante fiagojn de aliaj homoj.

Se homoj posedas la spiriton de pento, ilia kulpo estingiĝos, sed se ili ne havas la spiriton de pento, ilia kulpo daŭros kaj kondamnos ilin eterne.

Tiu, kiu aŭskultas la veran instruon, multajn fojon pripensas ĝin kaj utiligas ĝin por sia praktikado, povas fari ĝin sia propra posedaĵo.

Tamen tiu, kiu nur aŭdus la veran instruon, ne povas fari ĝin sia propra posedaĵo kaj ne povas atingi Vervekiĝon.

Konfido, modesteco, humileco, pacienco kaj saĝo

estas la gravaj fontoj de forto por tiu, kiu serĉas Vervekiĝon. El ili saĝo estas la plej ĉefa, kaj la aliaj estas la sekvantoj de la saĝo. Dum la ekzercado, se vi amas vulgarajn aferojn, ĝuas sensencajn babiladojn aŭ falas en dormojn, vi nepre retiriĝos de la vojo al Vervekiĝo.

13. En sintrejnado por Vervekiĝo iuj povas progresi pli rapide ol aliaj, sed oni ne bezonas senkuraĝiĝi, vidante aliajn homojn iluminiĝintajn pli frue.

Kiam iu praktikas arkpafadon, li ne atendas sukcesi rapide, ĉar li scias, ke se li ekzercas sin pacience, li nepre fariĝos pli kaj pli lerta. Rivero komenciĝas kiel rivereto, sed gi pli kaj pli kreskas larĝa, ĝis ĝi fine enfluas en oceanon. Kiel tiuj ĉi ekzemploj montras, se oni ekzercas sin pacience kaj persiste, oni certe atingos Vervekiĝon.

Kiel jam klarigite, se oni tenas siajn okulojn larĝe malfermitaj, oni trovos la instruon ĉie ajn, kaj la ŝancoj al Vervekiĝo aperas ĉie ajn.

Iam estis viro, kiu estis bruliganta incenson. Li rimarkis, ke la bonodoro ne venas nek iras, ne aperas nek malaperas. Tio ĉi kondukis lin al Vervekiĝo.

Iam estis viro, kiu estis vundita de dorno sur sia piedo. Li sentis akran doloron kaj venis al li la penso: “Doloro estas nenio alia ol reago de menso.” De tiu ĉi akcidento sekvis pli profunda penso: “Menso foriras, se oni malsukcesas regi ĝin, dum ĝi fariĝas pura, se oni sukcesas regi ĝin”. Kaj poste Vervekiĝo venis al li.

Jen estis alia viro, kiu estis tre avida. Iun tagon li pripensis sian avidecon kaj ekkonsciis, ke brulligno de avideco povas fariĝi materialo por fajro de saĝo. Jen tio estis la komenco de lia Vervekiĝo.

Jen estas malnova instruo. “Tenu vian menson ebena. Se via menso estas ebena, la tuta mondo estas ĉiam ebena.” Konsideru tion ĉi kaj komprenu, ke distingoj en tiu ĉi mondo estas kaŭzitaj de diskriminaciaj vidpunktoj de la menso. Ankaŭ tie ĉi troviĝas la vojo al Vervekiĝo. Vere la vojo de Vervekiĝo estas tre diversaj.

III
LA VOJO DE FIDO

1. Tiuj, kiuj rifuĝas en la tri trezorojn — Budho, Darmo kaj Samgo —, estas nomataj la disĉiploj de Budho. La disĉiplo de Budho observas la kvar normojn de mensregado — preceptoj, fido, oferado kaj saĝo.

La disĉiploj de Budho praktikas la kvin preceptojn — ne mortigi, ne ŝteli, ne adulti, ne mensogi kaj ne preni ebriigaĵon.

La disĉiploj de Budho havas fidon al la Budha perfekta saĝo. Ili penas forigi avidecon kaj egoismon, kaj praktiki oferadon, Ili komprenas la leĝon de kaŭzo-rezulto, firme tenante en sia menso la efemerecon de vivo. Tiel koni la rezonadon estas saĝo de la disĉiploj.

Same kiel arbo kliniĝanta al oriento nature falas al oriento, tiel tiuj, kiuj aŭskultas la instruon de Budho kaj tenas fidon al ĝi, certe naskiĝos en la lando de Budho.

2. La disĉiploj de Budho estas tiuj, kiuj fidas la tri trezorojn: Budho, Darmo kaj Samgo.

La Budho estas tiu, kiu atingis perfektan Vervekiĝon kaj instruas sian atingon por liberigi kaj savi ĉiujn homojn. La Darmo estas la vero, la spirito de Vervekiĝo kaj la instruo, kiu klarigas ĝin. La Samgo estas perfekta frataro de fidantoj de la Budho kaj Darmo.

Ni parolas pri la Budho, la Darmo kaj la Samgo iel aparte. Sed efektive tiuj ĉi tri eroj ne estas apartaj aŭ sendependaj. Ĉar la Budho aperas en la Darmo, kaj la Darmo efektiviĝas en la Samgo, la tri faras unuecon. Tial, fidi la Darmon kaj la Samgon signifas fidi la Budhon, kaj fidi la Budhon nature kondukas al la fido al la Darmo kaj la Samgo.

Tial, homoj povas esti emancipitaj kaj iluminitaj, se ili nur konfidas sin al Budho. Budho estas perfekta Iluminiĝinto. Ĉar Ĝi amas ĉiun homon kvazaŭ Sian solan idon, iu ajn rigardante Budhon kvazaŭ sian propran patron, povas vidi Budhon antaŭ siaj okuloj kaj atingi Vervekiĝon.

Tiuj, kiuj tiel rigardas Budhon, estas subtenataj de Ĝia saĝo kaj parfumataj de Ĝia favoro.

3. En la mondo nenio portas pli grandan profiton ol konfidi sin al Budho. Se oni aŭdas la nomon de Budho, konfidas sin al ĝi kaj ĝojas pro tio eĉ nur unu fojon, la rekompenco estas nekompareble granda.

Tial, oni devas paŝi sur la vojo, eĉ se ĝi estas kovrita de granda fajro pleniganta la tutan mondon, por aŭskulti la instruon de Budho; tio certe alportos al ĉiu ajn ĝojon.

Estas malfacile renkonti instruiston, kiu povas klarigi la Darmon; estas pli malfacile renkonti Budhon; sed estas plej malfacile kompreni la instruon.

Sed vi jam renkontis la Budhon, kiu estas malfacile renkontebla, kaj vi jam povis aŭskulti la instruon, kiu estas malfacile aŭskultebla. Tial vi devas ĝoji pro tio kaj havi fidon al tiu ĉi instruo.

4. En longa vojaĝo de homa vivo fido estas la plej bona kunulo: ĝi estas la plej bona refreŝigaĵo en vojaĝo de la vivo; ĝi estas la plej granda posedaĵo.

Fido estas la mano, kiu ricevas la Darmon; ĝi estas la pura mano, kiu ricevas ĉiujn virtojn. Fido estas la fajro, kiu forbruligas ĉiujn malpuraĵojn de vulgaraj deziroj; ĝi

forigas la ŝarĝon, kaj ĝi estas la gvidanto, kiu gvidas homan vojon.

Fido forigas avidecon, timon kaj fierecon; ĝi instruas ĝentilecon kaj respekton al aliaj homoj; ĝi liberigas homojn el sklaveco de cirkonstancoj; ĝi donas al homoj kuraĝon por renkonti malfacilaĵon; ĝi donas al ili forton por venki tenton; ĝi ebligas al homoj teni sian konduton brilanta kaj pura; ĝi riĉigas la menson kun saĝo.

Fido estas la kuraĝigilo, kiam oni iras sur la vojo longa kaj laciga, kaj ĝi kondukas al Vervekiĝo.

Fido donas al ni la senton, ke ni ĉiam estas antaŭ Budho, kaj ke ni estas ĉirkaŭprenata de la manoj de Budho. Fido moligas nian malmolan egoisman menson kaj donas al ni amikecan spiriton kaj kompreneman simpation.

5. Tiuj, kiuj tenas fidon, akiras la saĝon trovi la instruon de Budho en ĉio ajn, kion ili aŭdas. Tiuj, kiuj tenas fidon, akiras la saĝon kompreni, ke ĉio estas nenio alia ol fenomeno estiĝinta de la leĝo de kaŭzo-rezulto. Tiam fido donas al ili la favoron, por ke ili povu akcepti la leĝon sen antaŭjugo, kaj la kapablon, por ke ili povu

konfirmiĝi pace al la cirkonstancaj kondiĉoj.

Fido donas al ili la saĝon rekoni la efemerecon de vivo kaj ankaŭ la kuraĝon ne surpriziĝi nek malĝoji, kio ajn okazos al ili, aŭ pro la paso de vivo. Pro fido ili konas, ke malgraŭ ŝanĝiĝo de kondiĉoj kaj cirkonstancoj la vero de vivo ĉiam restas senŝanĝa.

Fido havas la tri gravajn aspektojn: pento, ĝojo aŭ sincera respekto al la virtoj de aliaj homoj, kaj dankema akcepto de la apero de Budho.

Homoj devas kultivi tiujn ĉi aspktojn de fido; ili devas esti sentemaj pri siaj degeneroj rilate al fido; ili devas esti hontemaj kaj konfesi siajn pekojn; ili devas ĝoji pro bonaj karakteroj kaj bonaj agoj de aliaj homoj kaj laŭdi ilin por ilia bono; kaj ili devas ĉiam deziri agadi kun Budho kaj vivi kun Budho.

La menso de fido estas la menso de sincereco; ĝi estas profunda menso, kiu sincere ĝojas esti kondukata al la Pura Lando de Budho per Ĝia favoro.

Budho donas forton de fido, kiu kondukas homojn al la Pura Lando, forton, kiu purigas ilin, forton, kiu protektas ilin kontraŭ mem-trompo. Eĉ se nur momente ili

havas fidon, kiam ili aŭdas la nomon de Budho laŭdatan ĉie en la mondo, ili estos kondukitaj al Ĝia Pura Lando.

6. Fido ne estas io, kio aldoniĝas al vulgara pasio — ĝi estas manifestiĝo de la naturo de Budho en homa menso, ĉar tiu, kiu komprenas Budhon, estas Budho mem, kaj tiu, kiu havas fidon al Budho, estas Budho mem.

Sed eĉ se homoj havas la naturon de Budho en sia menso, ĝin kovras vulgaraj pasioj. Pro tio estas malfacile malkovri ĝin kaj teni konstante puran menson en la inundo de avideco, kolero kaj vulgaraj pasioj. Kiamaniere pura menso povas aperi?

Estas dirite, ke en la arbaro de venenaj Eranda-arboj ĝermas nur Eranda-arboj, kaj ne kreskas Ĉandana-abroj bonodoraj. Se Ĉandana-arboj kreskus en Eranda-arbaro, tio estas miraklo. Tiel same, se fido al Budho kreskas en homa menso, tio estas miraklo.

Tial fido al Budho estas nomata “senradika” fido. “Senradika”, ĉar homoj tute ne havas radikon, el kiu naskiĝas fido. Sed la radiko troviĝas en la kompata menso de Budho, kio ebligas fidon al homa menso.

7. Fido estas sankta kaj fruktdona, sed ĝi estas malfacile vekebla eĉ en menso de sinceraj praktikantoj de la vojo. Kvin duboj, kiuj kaŝas sin en la ombro de homa menso, senkuraĝigas praktikantojn.

La unua estas dubo pri Budha saĝo; la dua estas dubo pri Budha instruo; la tria estas dubo pri gvidantoj, kiuj klarigas Budhan instruon; la kvara estas dubo pri la vojoj kaj rimedoj, kiuj estis montritaj kiel la Nobla Vojo; la kvina estas dubo pri la sincereco de aliaj samideanoj pro la aroganteco kaj malpacienco.

Vere, nenio estas pli terura ol dubo, kiu apartigas homojn. Ĝi estas veneno, kiu disfaligas fratecojn kaj rompas afablajn interrilatojn. Ĝi estas dorno, kiu dolorigas la menson, estas glavo, kiu mortigas kolegojn.

Tial tiuj, kiuj akiris fidon, devas scii, ke fido estis origine antaŭ longe plantita de la kompato de Budho. Kiam oni havas fidon, oni devas bone koni tiun ĉi fakton kaj esti dankema al Budho pro Ĝia favoro.

Se oni vekiĝas je fido, tio estas ne pro onia propra kompato, sed pro la kompato de Budho, kiu antaŭ longe ĵetis sian puran lumon de fido al homaj mensoj kaj

dispelis la mallumon de homaj malvidoj; tion oni devas ne forgesi. Tiuj, kiuj ĝojas pro la nuna fido, jam eniris en la landon de Budho.

Eĉ pasigante oridinaran vivon, oni povas vekiĝi je fido per la longdaŭra kompato de Budho kaj naskiĝi en la Pura Lando.

Vere, estas malfacile naskiĝi kiel homo, estas malfacile aŭskulti Darmon, kaj estas pli malfacile gajni fidon. Tial ĉiuj devas provi sian plejeblon por aŭskulti la instruon de Budho.

IV
SANKTAJ AFORISMOJ

1. “Li insultis min, li batis min, li venkis min, li prirabis min” — kiuj tiel grumbladas, ties venĝemo ne ĉesas.

Ja ne per venĝemo venĝemoj iam ĉesas ĉi tie. Per malvenĝemo ili ja ĉesas.

Kiel domon malbone tegmentitan pluvo penetras, tiel menson nedisvolvitan pasio penetras.

Zorgemo estas pado al senmorto. Neglekto estas pado al morto. Zorgemuloj ne mortas. Neglektuloj similas al mortintoj.

Tremantan, ŝancelan menson, malfacilan protekti kaj bridi, rektigas saĝulo, kiel sagofaranto la stangon de la sago.

La malfacile regeblan, rapidan, erarvagantan menson bridi estas bone. Menso bridata feliĉiĝas.

Pli ol malamiko faras al malamiko aŭ venĝanto al venĝanto, malĝuste celata menso malbonon faras.

Defendi menson kontraŭ avideco, kolero kaj malsaĝo estas la vera kaj eterna paco.

2. Kiel bela floro kunkolora, senodora estas bone parolita vorto senfrukta, se senaga.

Ne florodoro iras kontraŭvente, ne santalo, tagaro aŭ jasmeno. Bonulodoro iras kontraŭvente. Ĉiujn direktojn bona homo odorigas.

Longas por maldormanto la nokto. Longas por laca homo la mejlo. Longas iluzio por nesciemuloj, kiuj ne konas la veran darmon.

Se dum irado oni ne trovas homon pli bonan aŭ egalan, sola oni firme iru. Ne estas kun nesciemulo kuneco.

Malsincera kaj malbona amiko estu timata pli ol sovaĝa besto. Sovaĝa besto eble vundas vian korpon. Malbona amiko vundas vian menson.

“Filojn mi havas, riĉaĵojn mi havas” — tiel stultulo maltrakvilas. Eĉ sin mem li ja ne havas, kiel do filojn? Kiel riĉaĵojn?

Stultulo konanta sin stulta ĝuste tial saĝas. Stultulo pro saĝo fiera vere nomindas stultulo.

Eĉ se dumvive nesciemulo saĝulon aŭskultas, li ne gustumas la darmon kiel kulero la supon.

Malbona ago farita kiel lakto ne rapide kazeiĝas. Subbrulante ĝi stultulon sekvas kiel fajro de cindro kovrita.

Famon sen merito stultulo deziras, honoron inter monaĥoj, potencon en lokoj loĝataj, respekton de aliaj familioj.

Se vi trovas trezoro-peranton, malĝustaĵotrovantan, kritikodirantan saĝulon — tian scianton vi sekvu. Por tia sekvanto pli bone estos, ne male.

3. Darmotrinkanto feliĉe vivas kun klaraj pensoj. En la darmo konigita de nobluloj ĉiam ĝojas saĝulo.

Akvon gvidas fos-farantoj. Sagfarantoj formas sagon. Lignon formas ĉarpentistoj. Sin mem regas la saĝuloj.

Kiel roko masiva de vento ne moviĝas, tiel de mallaŭdo kaj laŭdo ne skuiĝas la saĝuloj.

Se iu milon da miloj da homoj en batalo venkus, kaj alia venkus sin mem, tiu batalanton superus

Pli bone ol vivi cent jarojn sen vidi la plej bonan darmon estas unutaga vivo, vidante la plej bonan darmon.

Se vi estas kara al vi mem, vi protektu vin bone. Vekiĝu en via juneco, en viaj laboraj jaroj, en via maljuneco.

La mondo ĉiam estas brulanta, de la fajro de avideco, kolero kaj malvido. Forkuru tuj de la brulanta domo.

Kiel ŝaŭmo, kiel aranea fadeno, kiel malpura vazo, la mondo estas tiel. Vi protektu vian karan menson.

4. Eviti ĉian malbonon, serĉu ĉian bonon, kaj tenu vian menson pura; jen estas instruo de Budho.

Pacienco estas unu el la malfacilaj disciplinoj. Nur pacienca praktikanto estas ornamita de la floroj de la fina venko.

Feliĉege ni vere vivas inter maliculoj sen malico. Inter maliculoj ni restas sen malico. Feliĉege ni vere vivas inter avaruloj sen avaro. Inter avaruloj ni restas sen avaro.

Sano estas la plej alta akiro. Kotento estas la plej granda riĉo. Fidindulo estas la plej bona parenco. Nirvano estas la plej granda feliĉo.

Bongusto el evito de malbono, el trankvilo, el ĝojo pri instruo, donas al vi netimon.

Ne alkroĉiĝu al via ŝato kaj malŝato. De ŝato kaj malŝato ekestas tristo, timo, kaj kateniĝo.

5. Rusto kreskas el fero kaj detruas feron. Malbono kreskas el homo kaj detruas homon.

Sankta skribo ne legata kun sincereco baldaŭ kovriĝos de povloj. Domo rompiĝinta kaj ne riparita baldaŭ fariĝos ruino. Homo havanta korpon kaj maldiligenta baldaŭ putriĝos.

Konduto malbona malpurigas homon. Avaro malpurigas oferon. Malbono malpurigas tiel ĉi-vivon kiel post-vivon.

La makulo de malvido multe pli gravas ol ĉiuj aliaj makuloj. Forigu tiun ĉi makulon. Se ne, homo neniam povas fariĝi pura.

Nehontema, impertinenta kiel korvo, aĉulo vundas aliajn homojn sen mem-kritiko. Enfali en tian vivon estas facile.

Havi humilecon, scii respekton kaj honoron, forigi ĉian alkroĉiĝon, protekti purecon en menso kaj konduto, esti klarvida; estas malfacile tiel vivi.

Estas facile vidi eraron de aliaj homoj; estas malfacile vidi eraron de si mem. Homoj disblovas kulpon de aliaj homoj, kiel ventego forblovas polverojn; homoj volas kaŝi kulpon de si mem, kiel vetludanto kaŝas sian ĵetkubon.

La ĉielo ne restigas spuron de birdoj, nek fumon, nek ŝtormon. Tiel, erara instruo ne restigas Vervekiĝon.

Ne povas esti eterneco en ĉia fenomeno. Sed vervekiĝinto havas stabilan menson.

6. Homoj devas firme protekti internon kaj eksteron, same kiel soldatoj protektas kastelon. Ne estu pigra eĉ momenton.

Vi estas mastro de vi mem. Vi estas rifuĝejo de vi mem. Regu vin mem bone, kaj vi akiras malfacile akireblan protekton.

La unua paŝo al spirita liberiĝo el la vulgaraj katenoj estas regi vin mem, kaj introspekti vin mem anstataŭ babili senutile.

La suno faras la tagon hela. La luno faras la nokton bela. Disciplino faras soldatojn dignaj. Kvieta meditado faras serĉantoj de Vervekiĝo brilaj.

Tiuj, kiuj ne protektas siajn kvin sensojn de okuloj, oreloj, nazo, lango kaj korpo, kaj kiuj emas allogataj de la eksteraj cirkonstancoj, ne povas esti praktikantoj de Vervekiĝo. Tiuj, kiuj firme protektas siajn kvin sensojn kaj regas sian menson, estas praktikantoj de Vervekiĝo.

7. Tiuj, kiuj estas influataj de siaj amataj kaj malamataj aĵoj, ne povas ĝuste kompreni la veran esencon de cirkonstancoj. Tiuj, kiuj estas liberaj de alkroĉiĝoj, povas ĝuste kompreni ĝin; al ili ĉiuj aĵoj fariĝas novaj kaj signifaj.

Ĝojo sekvas malĝojon, kaj malĝojo sekvas ĝojon. Al tiuj, kiuj transcendas ĝojon kaj malĝojon, bonon kaj malbonon, realiĝas libereco.

Se vi estas maltrankvila pri estonteco ankoraŭ ne veninta, se vi pentas pri estinteco jam ne revenanta, vi ŝrumpas kvazaŭ fragmitoj falĉitaj.

Se vi ne pentas pri la aferoj en estinteco, nek sonĝas la aferon en estonteco, sed vivadas sincere kaj serioze nur momenton de estanteco, vi fariĝos sana en sia korpo kaj menso.

Ne postkuru estintecon. Ne deziru estontecon. Vivu nur tiun ĉi momenton kun forta decido.

Ne prokrastu ĝis morgaŭ tion, kion vi devas fari hodiaŭ. Tio estas la vojo por vivi bonan tagon.

Fido estas la plej bona amiko; saĝo estas la plej bona gvidanto. Vi strebu por eskapi de la mallumo de malvido kaj sufero; vi serĉu la lumon de Vervekiĝo.

Fido estas la plej supera riĉaĵo, sincereco estas la plej supera gusto, virto amasigita estas la plej supera tasko

en la vivo. Gajnu trankvilecon, regante korpon kaj menson laŭ la instruo.

Fido estas nutraĵo sur la vojo de vojaĝo en la homa vivo, virto estas sankta loĝejo de homo, saĝo estas lumo en la tago, prava penso estas protektilo en la nokto. La pura vero kaj pura bono neniam pereas. Venkinto de avideco estas nomata libera homo.

Forgesu vin mem por la bono de via familio, forgesu vian familion por la bono de via vilaĝo, forgesu vian vilaĝon por la bono de via nacio, kaj forgesu ĉion por Vervekiĝo.

Ĉio ŝanĝiĝas. Ĉio aperas kaj malaperas. Se vi forigas angoron de naskiĝo-kaj-morto, kvieto kaj trankvilo ekestos al vi.

LA KOMUNUMO

DISCIPLINO DE LA KOMUNUMO

I

SENHEJMA MONAĤO

1. Tiu, kiu deziras fariĝi mia disĉiplo, devas volonte forlasi ĉiujn katenojn de sia familio, la socian vivon de tiu ĉi mondo kaj dependecon de propraĵo. Tiu, kiu forlasis ĉion pro la Darmo — kaj ne havas fiksan loĝejon por sia korpo nek por sia menso, fariĝas mia disĉiplo kaj nomiĝas senhejma monaĥo (bikŝuo).

Eĉ se ies manoj tenas min je la basko kaj liaj piedoj fidele sekvas min per la spuroj, tamen se la menso perturbiĝas per avideco, tiu restas for de mi. Eĉ se iu vestas sin kiel monaĥo, tamen se tiu ne akceptas la instruon, tiu ne vidas min.

Sed se iu forigas tutan avidecon kaj la menso estas pura kaj pacplena, tiu staras tuj apud mi, eĉ se li distancas je miloj da mejloj. Se iu observas la Darmon, tiu certe vidas min en ĝi.

2. Miaj disĉiploj, la senhejmaj monaĥoj devas observi jenajn kvar regulojn kaj bazi sian vivon sur ili.

La unua: ili portu vestaĉon el uzitaj tukoj; la dua: ili nutru sin per almozpetitaj manĝaĵoj; la tria: nokte ili kuŝu aŭ sub arbo aŭ sur roko; la kvara: ili prenu nur specialan medikamenton faritan el urino konservita de la Komunumo.

Portante bovlon en la mano, almozpeti de domo al domo estas vivo de almozulo. Sed monaĥoj ne estas devigita vivi tiel, nek tentita nek trompita de aliaj homoj. Ili tute memvole faras tion, ĉar ili scias, ke nur per tia vivo ili povas eviti ĉiujn iluziojn kaj alveni al Vervekiĝo.

La vivo de senhejma monaĥo ne estas facila. Tial vi devas ne fariĝi monaĥo, se vi ne povas teni vian menson libera de avideco kaj kolero, aŭ se vi ne povas regi vian menson kaj viajn kvin sensojn.

3. Se vi pensas aŭ proklamas publike, ke vi estas senhejma monaĥo, vi devas diri jene:

"Mi nepre plenumu tion, kio ajn estas prave ŝuldanta al senhejma monaĥo. Mi estu sincera pri tio kaj per beata vivo mi rekompencu homojn por la almozo, kiun ili al mi donis. Mi efektivigu ankaŭ la celon, pro kiu mi forlasis mian hejmon."

Por esti senhejma monaĥo vi devas trejni vin laŭ multaj flankoj: — Vi devas esti delikata ĉiam por siaj hontindaj kaj malhonorindaj kondutoj. Vi devas teni vin pura en kondutoj de la tri sferoj: korpo, parolo kaj menso. Vi devas protekti la pordojn de la kvin sensoj kaj ne distriĝi en amuzaĵoj. Vi devas ne laŭdi vin mem nek riproĉi aliajn homojn. Kaj vi devas ne droni en maldiligenteco nek en dormado.

Vespere vi devas havi tempon por sid-meditado kaj paŝ-meditado antaŭ enlitiĝo. Por kvieta dormo vi devas kuŝi sur dekstra flanko kun la piedoj metitaj unu sur la alia kaj laste pripensi frumatenan vekiĝon. Ankaŭ en la frua mateno li mediti per sidado kaj paŝado.

Tutan tagon vi devas tenadi viglan menson. Sidante en kvieta loko, vi devas ĝustigi sian korpon kaj menson; purigi sian menson, rezistante ĉiujn tendencojn por avideco, kolero, malvido, dormo, frivolaĵo, bedaŭro, suspekto kaj ĉiuj vulgaraj deziroj.

Tiel, kun via koncentrita menso kulturu veran saĝecon (Praĵnon), elsarku ĉiujn vulgarajn dezirojn kaj celu nur a1 perfekta Vervekiĝo.

4. Se senhejma monaĥo, forgesinte sian pozicion, refalas en avidecon, koleron kaj ankoraŭ dorlotas rankoron, ĵaluzon, memfieron, trompon aŭ malsinceron, kvazaŭ li portus akran dutranĉan glavon en sia robo.

Iu ne estas senhejma monaĥo, nur ĉar tiu vestiĝas per monaĥa ĉifonaĵo kaj almozpetas kun bovlo. Iu ne estas senhejma monaĥo, nur ĉar tiu recitas sutrojn. Se nur la eksteraĵo similas al tiu de senhejma monaĥo, li estas simple pajla pupo kaj neniom pli.

Oridigi eksteran aperaĵon ne sufiĉas por nuligi vulgarajn pasiojn. Se bebo portas monaĥan robon, ĝi ne povas esti nomata monaĥo.

Nur tiuj, kiuj kapablas regi la menson, havas klaran saĝon, jam forigis vulgarajn pasiojn, kaj tiamaniere sincere serĉadas la veran vojon de Vervekiĝo, havas la kvalifikon esti nomata senhejma monaĥo.

Vera senhejma monaĥo devas decide celi al Vervekiĝo kaj peni laŭcele ĝis la lasta forto, eĉ se li perdus sian lastan guton da sango, eĉ se lia osto dispeciĝus. Kaj tiamaniere li alvenos al la celo kaj povos plenumi meritoplenajn farojn kiel vera senhejma monaĥo.

5. La misio de senhejma monaĥo estas disvastigi la lumon de la instruo de Budho. Li kiel apostolo devas prediki al ĉiuj homoj, veki ilin el profunda dormo, korekti malĝustajn ideojn de ili kaj diskonigi la instruon, eĉ riskante vian propran vivon.

La misio de senhejma monaĥo ne estas facila. Tial se vi aspiras prediki la evangelion de Budho, vestigu vin per Budha vesto, sidiĝi sur Budha seĝo kaj eniri en Budhan ĉambron.

Vesti sin per vesto de Budho signifas esti humila kaj ekzerci paciencon; sidiĝi sur seĝo de Budho signifas vidi sensubstantecon en ĉio kaj forĵeti persiston je ĉio; eniri en ĉambron de Budho signifas apliki ampleksan mizerikordon kaj simpation al ĉiuj homoj.

6. Se vi deziras prediki la instruon de Budho, atentu jenajn kvar punktojn: la unua, koncerne al via propra konduto; la dua, koncerne al via parolmaniero; la tria, koncerne al la motivo de predikado; la kvara, koncerne al la granda Kompato.

Unue, por esti bona predikanto de la Darmo

senhejma monaĥo devas stari firme sur la grundo de pacienco kaj esti humila kaj molkora; li devas ĉiam konsideri, ke ĉio estas sensubstanca kaj neniom meritas zorgon nek absorbiĝon. El tiu ĉi vidpunkto li devas ĝustigi sian konduton.

Due, li devas singarde alproksimiĝi al homoj en diversaj situacioj. Li devas eviti malbonulojn kaj potenculojn; li devas eviti virinojn; li devas regi sian mesnson en kvieta loko kaj ĉiam memori la leĝon, ke ĉio devenas el kombinoj de kaŭzoj kaj kondiĉoj. Sur tiu ĉi starpunkto li devas ne riproĉi aŭ ne insulti aliajn homojn, aŭ ne mencii alies misfarojn, sed trakti ilin kun kelke da respekto.

Trie, li devas konservi la menson pacplenan, konsideri Budhon kiel sian amoplenan spiritan patron, respekti aliajn monaĥojn, kiuj trejnas sin al Vervekiĝo, kiel instruistojn, kaj rigardi ĉiujn homojn kun granda Kompato. Tiamaniere li devas instrui egale ĉiujn homojn.

Kvare, same kiel Budho, li devas elmontri sian spiriton de kompato kiel plej eble. Aparte al tiuj, kiuj ne sufiĉe konas rimedon por serĉi Vervekiĝon kaj vane konsumiĝas, li devas apliki sian kompaton kaj strebi, por ke la instruoj satigu certe iliajn soifojn.

II

LA VOJO DE LAIKOJ

1. Estas jam klarigite, ke por fariĝi disĉiplo de Budho oni devas fidi la tri trezorojn: la Budho, la Darmo kaj la Samgo.

Por fariĝi laika disĉiplo oni devas havi firman fidon al la Budho kaj al la instruo, lerni kaj praktiki la preceptojn, kaj devas esti zorgema al la komunumo de disĉiploj.

Laikaj disĉiploj devas observi la kvin preceptojn: ne mortigi, ne ŝteli, ne adulti malvirte, ne mensogi aŭ trompi, kaj ne ebriiĝi.

Laikaj disĉiploj devas ne nur fidi la tri trezorojn kaj observi la kvin preceptojn memvole, sed ankaŭ laŭeble klopodi konduki aliajn homojn al la preceptoj kaj al la fido; interalie instigi siajn proprajn parencojn, amikojn kaj konatojn vekiĝi je firma fido al la Budho, la Darmo kaj la Samgo, por ke ankaŭ ili povu partopreni en la komptato de la Budho.

Laikaj disĉiploj devas ĉiam memori, ke la ununura motivo de la fido al la trezoroj kaj observado de la

preceptoj estas ebligi sin mem finfine atingi Vervekiĝon. Tial, kvankam ili loĝas en la mondo de surteraj pasioj, ili devas ne dorloti tiajn pasiojn.

Laikaj disĉiploj devas ĉiam memori, ke pli malpli frue ili devos adiaŭi siajn gepatrojn kaj familianojn, kaj ke ili fine forpasos de tiu ĉi mondo de naskiĝo-kaj-morto; tial ili devas ne alkroĉiĝi al mondaĵoj, sed direkti sian menson al Vervekiĝo, en kies mondo nenio forpasas.

2. Se laikaj disĉiploj havas firman kaj fervoran fidon al la instruoj de Budho, ne retroirante, ili konsekvence realigos en sia menso kvietan kaj neĝenatan feliĉon. En tiu ĉi stadio ili povos rekoni lumon en ĉiuj ĉirkaŭaĵoj kaj satiĝi je ĝojo.

Laikaj disĉiploj kun la menso de fido estas puraj kaj mildaj, ĉiam paciencaj kaj toleremaj, neniam disputemaj, neniam kaŭzantaj suferojn al aliaj homoj; ili ĉiam primeditas la tri trezorojn: la Budhon, la Darmon kaj la Samgon. Tial ĝojo spontane elŝprucas el ilia menso kaj la lumo pro Iluminiĝo estas trovebla ĉie ajn.

Ĉar ili restas en la sino de Budho kun la menso de fido, ili estas gardataj kontraŭ la falsa imago pri “mio” kaj

“la mia”. Tial ili bezonas timi nenion en sia vivo, nek mallaŭdon fare de aliaj homoj.

Ili ne timas morton, ĉar ili pensas, ke ili renaskiĝos en la lando de Budho. Ili povas esprimi siajn ideojn libere kaj sentime antaŭ la publiko, ĉar ili fidas verecon kaj noblecon de la instruoj.

Ĉar ili rigardas ĉion surbaze de amoplena kompato, ili egale traktos ĉiujn homojn sen distingaj sentoj de ŝato aŭ malŝato. Ĉar ilia menso estas plena de justeco kaj pureco, ili volonte strebas por ĉio bona.

Ĉu ili vivas en mizero, ĉu en prospero, tio faras nenian obstaklon, por ke ili pli firmigu sian fidon. Se ili amas humilecon, se ili respektas la instruojn de Budho, se iliaj paroloj akordas kun siaj agoj, se iliaj agoj akordas kun siaj paroloj, se ili estas gvidataj de saĝo, se ilia menso estas senmova same kiel monto, tiam ili konstante progresas sur la vojo al Vervekiĝo.

Eĉ kiam ili estas devigataj vivi en malfacilaj situacioj kaj inter homoj kun malpura menso, se ili bone konservas fidon al Budho, estante en la mondo plena de malpuraĵoj, ili povos gvidi ilin al pli bonaj faroj.

3. Tial, oni devas antaŭ ĉio havi la volon aŭskulti la instruon de Budho.

Se iu dirus al vi, “Trairu la fajron, kaj vi gajnos Vervekiĝon”, tiam vi devas havi la volon fari ĝuste tion, kion li diris.

Vi konsoliĝos kaj kontentiĝos ĝuste pro tio, ke vi aŭdos la nomon de Budho trairante la mondon plenan de fajroj.

Se vi deziras sekvi la instruon de Budho, vi devas ne esti egoisma aŭ senbrida, sed devas konservi bonvolecon egale al ĉiuj; vi devas respekti tiujn, kiuj meritas respekton; vi devas servi al tiuj, kiuj meritas servadon; vi devas trakti ĉiujn homojn kun egala bonkoreco.

Tiel estas necese, ke laikoj unue disciplinu siajn proprajn mensojn kaj ne estu delogitaj de la kondutoj de aliuloj; tiamaniere ili sekvu la instruon de Budho kaj praktiku mem, ne enviante aliulojn, ne suferante influon de aliuloj, kaj ne pripensante aliajn vojojn.

Tiamaniere laikaj disĉiploj devas aŭskulti kaj lerni la instruon. Ne ŝanceliĝu pro vortoj kaj agoj de aliaj homoj;

mem decidu, kion vi devas fari kun profunda konsidero kaj sufiĉa ekzameno. Necesas antaŭ ĉio praktikado bazita sur menso-regado.

Tiuj, kiuj ne fidas la instruon de Budho, havas mallarĝan vidkampon en sia propra intereso. Tial ili facile ŝanceliĝas, iritiĝas kaj senpacienciĝas. Sed tiuj, kiuj fidas la instruon de Budho, kredas, ke troviĝas granda saĝo kaj kompato etendiĝanta al ĉiuj viv-estaĵoj. Tial ilia vidkampo larĝiĝas kaj ne ŝanceliĝas, nek iritiĝas aŭ senpacienciĝas.

4. Tiuj, kiuj aŭskultas kaj akceptas la instruon de Budho, komprenas, ke ilia vivo estas efemera, kaj ke ilia korpo estas nur la amaso de suferoj kaj la fonto de ĉiuj malbonaĵoj. Tial ili ne alteniĝas al tia efemeraĵo.

Samtempe ili ne neglektas sufiĉe zorgi sian korpon, ne ĉar ili deziras ĝui karnajn plezuraĵojn de sia korpo, sed ĉar korpo estas necesa por atingo de saĝo kaj por ilia misio disvastigi la vojon al aliaj homoj.

Se ili ne bone zorgas sian korpon, ili ne povas vivi longe. Se ili ne vivas longe, ili ne povas praktiki la instruon persone kaj transdoni ĝin al aliaj homoj.

Kiuj deziras transiri riveron, atentas sendanĝerecon de la floso. Kiuj vojaĝas, prizorgas sian ĉevalon. Tiel same, kiuj penas atingi Vervekiĝon, tiuj devas teni sian korpon sana.

Kiuj estas disĉiploj de Budho, devas vesti sin nur por protekti sin kontraŭ varmo kaj frosto kaj por kovri siajn privatajn korpopartojn, sed ne por senutila dekoraciado.

Ili devas preni manĝaĵon nur por nutri sin, tiel ke ili povu aŭskulti kaj prediki la instruon, subtenate de bona sano, sed ne por ĝui bonguston.

Ili devas loĝi en la domo de Vervekiĝo por protekti sin kontraŭ la rabistoj de vulgaraj pasioj kaj kontraŭ la ŝtormo de falsaj instruoj. Ili devas uzi la domon por vera celo, sed ne por montri aŭ kaŝi egoismajn farojn.

Tiel, ili devas taksi kaj uzi aĵojn sole rilate al Vervekiĝo kaj la instruoj. Ili devas ne posedi aĵojn nek alkroĉiĝi al ili pro egoismaj motivoj, sed utiligi ilin por la bono de aliaj homoj

Tial, ilia menso estas ĉiam fiksita al la instruo, eĉ kiam ili vivas kun siaj familianoj. Ili devas prizorgi siajn

familianojn kun saĝo kaj kompato, serĉante diversajn metodojn por instigi ilin paŝi sur la vojo al sensufera vivo.

5. Laikaj membroj de la Samgo devas ĉiutage lerni la jenajn zorgojn: kiel servi al siaj gepatroj, kiel vivi kun siaj edzino kaj gefiloj, kiel regi sian korpon kaj menson, kaj kiel servi al Budho.

Por bone servi la gepatrojn, ili devas lerni praktikadon de bonvoleco kaj akiri longedaŭran pacon. Por vivi feliĉe kun la edzino kaj gefiloj ili devas fortranĉi katenojn de egoismaj pasioj.

Aŭskultante muzikon, ili devas ne forgesi la plidolĉan muzikon de la instruo. Restante en la domo, ili devas ofte esplori la animstaton de saĝulo, en kiu ili povas rifuĝi for de ĉiuj malpuraj tentoj de surtera vivo kaj ripozi senĝene.

Kiam laikoj donas oferojn al aliaj homoj, ili devas forlasi sian avarecon; kiam ili kunsidas kun homamaso, ilia menso devas esti en la komunumo de saĝuloj; kiam ili trafas malfeliĉon, ili devas konservi la menson trankvilan kaj liberan de obstakloj.

Kiam ili rifuĝas en la Budho, ili kune kun aliaj homoj devas ellerni la ĝustan vojon kaj venigi al si la plej superan menson.

Kiam ili rifuĝas en la Darmo, ili kune kun aliaj homoj devas ĝisfunde esplori la veran instruon kaj serĉi la senfine grandan saĝon kiel maron.

Kiam ili rifuĝas en la Samgo, ili kune kun aliaj homoj devas teni la harmonian kunvivadon kaj esti liberigita de ĉio ajn.

Kiam ili ŝirmas sin per vestoj, ili devas ne forgesi surmeti ankaŭ la veston de virto kaj humileco.

Kiam ili ekskrecias, ili devas ankaŭ forigi avidecon, koleron kaj malvidon el sia menso.

Kiam ili supreniras deklivon, ili devas rigardi ĝin kiel la plej superan vojon al Vervekiĝo, kiu transcendas la mondon de iluzio. Kiam ili malsupreniras deklivon, ili devas havi la imagon humile aliri al aliaj homoj suferantaj por gvidi ilin al la vera instruo.

Kiam ili vidas ponton, ili devas esperi konstrui la

ponton de la instruo, kiu kondukos homojn al la ĝusta bordo.

Kiam ili renkontas tristoplenan homon, ili devas lamenti pri amareco de tiu ĉi efemera mondo.

Kiam ili vidas avidan homon, ili devas aspiri liberiĝon de la iluzia vivo kaj alvenon al la vera Vervekiĝo.

Kiam ili sidas antaŭ riĉaj manĝaĵoj, ili devas alĝustigi sin sobraj; kiam ili sidas antaŭ malriĉaj manĝaĵoj, ili devas deziri forigon de pasioj pri mondaĵoj.

Dum la brulanta febro de somero, ili devas forlasi la febron de fajraj pasioj pri mondaĵoj kaj gajni la refreŝigan malvarmeton de Vervekiĝo. Dum la ekstrema frosto de vintro, ili devas pripensi la favoran varmon de la granda kompato de Budho.

Kiam ili recitas la sanktajn skribaĵojn, ili devas voti, ke ili ne forgesu kaj praktiku la instruon.

Kiam ili pripensas Budhon, ili devas deziri, ke ili havu klarvidajn okulojn kiel tiujn de Budho.

Kiam ili dormas en nokto, ili devas deziri, ke iliaj korpo, parolo kaj menso estu purigitaj kaj refreŝigitaj post ripozo; kiam ili vekiĝas matene, ili devas deziri, ke dum la tago ilia menso estu klara por kompreni ĉiujn aferojn.

6. Ĉar tiuj, kiuj sekvas la instruon de Budho, komprenas, ke ĉio estas karakterizita de sensubstanteco aŭ "Ŝunjato", ili ne facilanime traktas surteran laboron, homan vivon aŭ ĉion alian, sed ili rigardas ĉion rekte tia, kia ĉio estas, kaj penas fari ĉion konvene al Vervekiĝo.

Ili devas ne pensi, ke tiu ĉi mondo estas sensenca kaj plenigita de konfuzo, dum la mondo de Vervekiĝo estas ampleksanta signifon kaj pacon. Pli ĝuste, ili devas trovi la vojon al Vervekiĝo en ĉiuj aferoj de tiu ĉi mondo.

Se ili rigardas tiun ĉi mondon per la okuloj kovritaj de malsaĝo, ili vidas ĝin nur kiel sensencaĵon plenan de eraroj; sed se ili observas ĝin per klara saĝeco, ili povos rekoni ĝin kiel la mondon de Vervekiĝo.

Ekzistas ununura mondo, sed ne du: unu el ili estus signifoplena kaj la alia sensignifa, aŭ el ili unu estus bona kaj la alia malbona. Nur en homa iluzio ekzistas du

distingitaj mondoj.

Se ili konsideras ĉion ne per distingaj okuloj sed per la lumo de saĝo, ili povas ĝuste kompreni la unununran mondon, kie ĉio aperas signifohava kaj respektinda.

7. Tiuj, kiuj sekvas la instruon de Budho, gustumas la universalan purecon de unununra mondo, kaj kun sia menso humila kaj kompato ili servas al ĉiuj aliaj homoj.

Tial ili devas rekoni en la menso ne fierecon sed humilecon, ĝentilecon kaj servemon. Kaj la menso devas esti kiel la fekunda tero, kiu nutras ĉion sendiference, kiu servas senplende, kiu eltenas pacience, kiu estas ĉiam fervora, kaj kiu trovas la plej altan ĝojon en la semado de la instruo de Budho inter ĉiuj malriĉaj homoj.

Tiel la menso, kiu verŝas kompaton sur ĉiujn malriĉulojn kiel amema patrino, tute egalas al la menso, kiu respektas ĉiujn homojn kiel siajn gepatrojn aŭ bonajn gvidantojn.

Tial, eĉ se miloj da homoj havas malfavoron kaj malbonvolon kontraŭ la instruo de Budho, ili ne povas kotentigi la dezirojn, same kiel guto da veneno ne povas

polui la akvon de granda oceano.

8. Laikaj disĉiploj de Budho, farante al si introspekton, ĝojas pro sia feliĉo animita de Budho kaj tutkore dankas, ke ilia fido al Budho tute devenas de la favoro kaj kompato de Budho.

En la koto de negativa emocio ne troviĝas la semo de fido al Budho, sed Lia kompato tie ĝermigas kaj kreskigas al homoj la semon de fido.

Kiel jam dirite, la aromplena Ĉandana-arbo ne povas kreski en la venena Eranda-arbaro. Tiel same, la semo de fido al Budho ne povas ĝermi en la sino de iluzio.

Sed la floro de ĝojo efektive disvolviĝas tie en la sino de iluzio. El tiu ĉi fakto oni konkludas, ke la radiko estas ne tie sed aliloke, nome en la sino de Budho.

Se laikaj disĉiploj estas absorbitaj de egoo, ili malamas, ĵaluzas aŭ eĉ domaĝas aliajn homojn kaŭze de iliaj avideco, kolero kaj malvido. Sed se ili returnas sin al Budho, ili baldaŭ poste plenumos eĉ grandan laboron de Budho. Tio estas treege mirinda.

III

PRAKTIKA GVIDO POR VOJO DE VIVO

1. Estas absurde pensi, ke malfeliĉo venas de oriento aŭ de okcidento; ĝi origine estas en propra menso de homo. Tial, estas stulte gardi sin kontraŭ malfeliĉoj de la ekstera mondo kaj lasi la internan menson ne regata.

De antikva tempo homoj havas jenan kutimon: ellitiĝinte matene, ili lavas al si la vizaĝon kaj gargaras sin, kaj poste kultas la ses direktojn — orienton, okcidenton, sudon, nordon, supron kaj malsupron — dezirante, ke malfeliĉo ne trafu ilin de iu ajn direkto, kaj ke ili povus havi pacan tagon.

Sed ĉe la instruo de Budho la afero estas tute alia. Budho instruas, ke ni oferu respekton al la ses direktoj de Vero, kaj ke ni kondutu saĝe kaj virte kaj tiel preventu ĉiujn malfeliĉojn.

Por gardi la pordojn de tiuj ĉi ses direktoj, ni devas forigi la malpuron de “kvar agoj”, eviti la “kvar malbonajn mensojn”, kaj ŝtopi la “ses truojn”, kiuj kaŭzas perdon de riĉaĵo.

La malpuro de “kvar agoj” signifas mortigon, ŝtelon, adulton kaj trompon.

La “kvar malbonaj mensoj” estas avido, kolero, malvido kaj timo.

La “ses truoj”, kiuj kaŭzas perdon de riĉaĵo, estas deziro al ebriigaj trinkaĵoj por stulte konduti, maldormo ĝis malfrua nokto por ĝui muzikon aŭ teatraĵon, vetludo, intima rilato kun malbonaj amikoj, kaj neglekti siajn laborojn.

Foriginte la malpuron de kvar agoj, evitinte la kvar malbonajn mensojn, kaj ŝtopinte la ses truojn, laikaj disĉiploj de Budho oferas respekto al la ses direktoj de Vero.

Nu, kio estas tiuj ses direktoj de Vero? Oriento signifas la moralon inter gepatroj kaj gefiloj; sudo signifas la moralon inter gvidanto kaj lernanto; okcidento signifas la moralon inter edzo kaj edzino; nordo signifas la moralon inter amikoj, malsupro signifas la moralon inter mastro kaj servisto; supro signifas la moralon inter la disĉiploj de Budho.

Gefiloj devas honori siajn gepatrojn kaj fari por ili

jenajn kvin: servi al ili, helpi ilin en laborado, konservi la genealogion, protekti la familian posedaĵon, kaj havi memoran servon post ilia forpaso.

Gepatroj devas fari por siaj gefiloj jenajn kvin: evitigi agi malbone, montri ekzemplon de bonaj agoj, doni edukadon al ili, aranĝi ilian geedziĝon, kaj heredigi al ili la familian posedaĵon en taŭga tempo. Se gepatroj kaj gefiloj sekvas tiujn ĉi regulojn, la familio ĉiam vivas en paco.

Lernanto devas ekstari, kiam lia gvidanto eniras, servi lin, sekvi lian instrukcion fidele, ne neglekti oferon por li, kaj aŭskulti respektplene lian instruon.

Samtempe, gvidanto devas agi ĝuste antaŭ siaj lernantoj kaj montri bonan ekzemplon al ili; li devas korekte transdoni al ili la instruon, kiun li lernis; li devas uzi bonajn metodojn kaj laŭeble peni, ke la lernantoj ne faru malbonon. Se gvidanto kaj liaj lernantoj observas tiujn ĉi regulojn, ilia interrilato iros glate.

Edzo devas trakti sian edzinon kun respekto, ĝentilo kaj fidelo. Li devas konfidi al ŝi mastrumadon kaj kelkfoje provizi ŝin per ŝiaj bezonaĵoj inkluzive de ornamaĵoj. Samtempe, edzino devas peni mastrumadi, administri servistojn taŭge, kaj esti ĉasta, gardi la familian

bonhavaĵon, kaj administri la hejmon konvene kaj fidele. Se tiuj ĉi reguloj estas observataj, feliĉa hejmo estos tenata kaj tie okazos nenia kverelo.

La moralo inter amikoj estas reciproka simpatio; ili donacas tion, kio mankas al ilia amiko, parolas kun ĝentilaj vortoj, kaj pensas pri utiloj por sia amiko.

Oni devas protekti sian amikon kontraŭ ekfalo en malbonan vojon, gardi lian propraĵon kaj bonhavaĵon, kaj helpi lin en liaj ĉagrenoj. Se lia amiko havas malfeliĉon, li devas doni al li helpan manon, aŭ subteni lian familion, se necese. En ĉi tiu maniero ilia amikeco estas tenata kaj ili ambaŭ estas pli kaj pli feliĉaj.

Mastro, rilatante al sia servisto, devas observi la kvin aferojn: asigni laboron taŭgan por la kapablo de la servisto, doni al li ĝustan salajron, zorgi pri li, kiam li estas malsana, dividi agrablaĵon kun li, kaj doni al li necesan ripozon.

Servisto devas observi la kvin aferojn: ellitĝi matene pli frue ol la mastro kaj enlitiĝi pli malfrue ol li, esti ĉiam honesta, peni plenumi sian laboron, kaj klopodi ne difekti la honoron de sia mastro. Se tiuj ĉi reguloj estas observataj, estiĝas paco kaj nenia disputo inter mastro kaj servisto.

Disĉiploj de Budho devas atenti, ke ankaŭ iliaj familianoj observu la instruon de Budho. Ili devas respekti sian gvidanton de la instruo, prizorgi lin dece, observi liajn instruojn, kaj ĉiam oferi necesaĵojn al li.

La gvidanto de la instruo devas korekte kompreni la instruon, ekskludi malĝustan klarigon, rekomendi bonon, kaj peni konduki siajn disĉiplojn al trankvila stato. Tiamaniere familio de laikaj disĉiploj prosperas spirite, tenante la veran instruon en sia kerno

Kulti la ses direktojn, kiel ĉi supre dirite, ne signifas eviton de eksteraj malfeliĉoj. Laikaj disĉiploj devas gardi la ses direktojn per memvola prevento de internaj ĝenoj.

2. Ni devas rekoni inter siaj konatoj tiujn, kun kiuj ni devas havi amikecon, kaj tiujn, kun kiuj ni devas ne havi amikecon.

Tiuj, kun kiuj ni devas ne havi amikecon, estas avaraj, flataj kaj malŝparemaj. Tiuj, kun kiuj ni devas havi amikecon, estas helpemaj, volas dividi feliĉojn same kiel suferojn, donas bonan konsilon, kaj havas simpatian menson.

Vera amiko, kun kiu ni povas sekure intimiĝi, ĉiam instigas nin al la ĝusta vojo, zorgas kaŝe pri nia bonfarto, konsolas nin en malfeliĉo, donas al ni helpon kaj konsilon, kiam ni bezonas ĝin, kaj gardas niajn sekretojn.

Estas tre malfacile trovi tian amikon. Ĝuste tial ni mem devas klopodi tre fervore por esti tia amiko. Kiel la suno varmigas la fruktodonan teron, tiel same bona amiko brilas en socio pro siaj bonaj agoj.

3. Estas ne eble, ke gefiloj rekompencas siajn gepatrojn pri ilia favora bonkoreco, eĉ se ili provus porti siajn gepatrojn, metante sian patron sur sia dekstra ŝultro kaj sian patrinon sur sia maldekstra tiel longe dum cent jaroj.

Kaj eĉ se gefiloj banus la korpon de siaj gepatroj en bonodora akvo dum cent jaroj, servus kiel ideala filo aŭ filino, gajnus kronon por ili, kaj donus al ili ĉiom da luksaĵoj de la mondo, ili ankoraŭ ne povas rekompenci siajn gepatrojn sufiĉe por la granda ŝuldo de favoro, kiun ili ricevis.

Sed se ili kondukas siajn gepatrojn al Budho,

klarigas la instruon al ili, persvadas ilin forlasi eraran kurson kaj sekvi pravan, persvadas ilin forlasi avidecon kaj ĝui la praktikadon de ofero, tiam ili povas rekompenci ilin pli ol sufiĉe.

Favoro de Budho troviĝas en la hejmo, en kiu gepatroj estas respektataj kaj estimataj.

4. Familio estas loko, kie mensoj kunvivas unu kun la alia. Se tiuj ĉi mensoj amas reciproke, la hejmo fariĝas tiel bela kiel florĝardeno. Sed se ili foriĝas de harmonio inter si, ĝi fariĝas kvazaŭ ŝtormo, kiu detruas la ĝardenon.

Se malakordo okazas en ies familio, oni devas ne kulpigi aliajn, sed devas ekzameni sian propran menson kaj sekvi justan vojon.

5. Iam estis viro kun profunda fido al la instruo. Lia patro mortis, kiam li estis juna; li vivis feliĉa kun sia patrino, kaj li edziĝis.

En la komenco ili kune vivis feliĉaj. Tamen iom poste pro malgranda miskompreno, la edzino kaj ŝia bopatrino iĝis malamikaj. Tiu ĉi malamikiĝo kreskis finfine ĝis tiom, ke la patrino postlasis la junan paron por

vivi sola.

Post la foriro de la bopatrino, filo naskiĝis ĉe la juna paro. Atingis la bopatrinon la onidiro, ke la juna edzino diris, “Mia bopatrino ĉiam ĝenis min kaj dum la kunvivado kun ŝi, ĉe ni okazis nenio agrabla; sed tuj post ŝia foriro ni ekhavis tiun ĉi feliĉan eventon.”

Tiu onidiro kolerigis la patrinon kaj ŝi kriis, “Se patrino de edzo estas forigita de domo kaj venas feliĉa afero, tio estas renversa en ordo. Justeco jam malaperis de tiu ĉi mondo.”

Kaj ŝi ekscite kriis, “Nun ni okazigu funebraĵon de ‘justeco’.” Kiel frenezulo ŝi iris al la tombejo por okazigi funebran servon.

Iu dio aŭdinte tiun ĉi incidenton, aperis antaŭ la virinon kaj klopodis konvinki ŝin, sed vane.

La dio tiam diris al ŝi, “Se tiel, mi brulmortigu la infanon kaj ĝian patrinon. Ĉu tio kontentigas vin?”

Aŭdinte tion, ŝi konsterniĝis kaj komprenis sian eraron. Ŝi pardonpetis pri sia kolero, kaj petis de la dio savi la vivojn de la infano kaj ĝia patrino. Ĉirkaŭ la sama tempo, la juna edzino kaj ŝia edzo komprenis sian maljustecon al la maljunulino kaj iris al la tombejo por serĉi ŝin. La dio repacigis ilin kaj post tio ili vivis amike kiel feliĉaj familianoj.

Justeco estas neniam perdita, krom se oni mem ĝin forĵetas. Justeco kelkfoje povus ŝajni malaperinta, sed en

fakto, ĝi ne malaperas. Kiam ĝi ŝajnas malaperinta, tio estas, ke oni perdis justecon en sia propra menso.

Malakordo inter homaj mensoj ofte alportas katastrofon. Iometa miskompreno sekvigas grandan malfeliĉon. Tion ĉi oni devas atenti speciale en familia vivo.

6. En familia vivo, administrado de tagaj elspezoj postulas la plej atentan zorgon. Ĉiuj membroj devas labori fervore kiel diligentaj formikoj kaj laborabeloj, sed ne apogi sin sur diligenteco de aliaj nek esperi almozon.

Aliflanke, oni devas ne konsideri tion, kion li gajnis, kiel plene sian propraĵon. Iom da porcio de la gajno devas esti dividata kun aliaj, esti ŝparita por la bezono de komunumo kaj nacio, kaj esti dediĉita por la bezono de religiaj gvidantoj.

Oni devas rememori, ke nenio en la mondo povas esti strikte nomata “mia”. Ĉio, kio venas al iu persono, venas al li pro kombino de kaŭzoj kaj kondiĉoj; ĝi povas esti tenata de li nur provizore. Tial li devas ne uzi sian propraĵon egoisme aŭ por senutilaj celoj.

7. Kiam Ŝamavatio, la edzino de la reĝo Udajano, oferis al Anando kvincent vestojn, ilin Anando ricevis kun granda kontento.

La reĝo aŭdinte tion, suspektis Anandon pri lia avideco. Tial li iris al Anando kaj demandis, kiel li intencas trakti tiujn ĉi kvincent vestojn.

Anando respondis; “Ho, Via Majesto, multe da fratoj vestas sin per ĉifono; mi estas disdononta la vestojn al tiu fratoj.”

“Kiel vi traktos la malnovajn vestojn?”

“Ni faros littukojn el ili.”

“Kiel vi traktos la malnovajn littukojn?”

“Ni faros kovrilojn de kapkusenoj el ili.”

“Kiel vi traktos la malnovajn kovrilojn?”

“Ni faros plankkovrilojn el ili.”

“Kiel vi traktos la malnovajn plankkovrilojn?”

“Ni faros piedtukojn el ili.”

“Kiel vi traktos la malnovajn piedtukojn?”

“Ni faros viŝtukojn el ili.”

“Kiel vi traktos la malnovajn viŝtukojn?”

“Via Majesto, ni ŝiros ilin en pecojn , miksos ilin

kun koto, kaj uzos la koton por gipso de muro, kiam ni konstruas domon.

Ĉiujn aĵojn ni devas uzi kun bona zorgo en la utila vojo, ĉar ili ne estas "niaj", sed nur konfiditaj al ni provizore.

8. La rilato inter edzo kaj edzino ne estis formita nur por ilia oportuno. Ĝi havas pli profundan signifon ol la nura kuniĝo de du fizikaj korpoj en unu domo. Geedzoj devas preni avantaĝon de intimeco de ilia asocio por helpi reciproke en kulturado de menso en la sankta instruo.

Iu maljuna paro nomata "ideala paro" iam vizitis la Budhon kaj diris, "Majstro, ni interkonatiĝis de nia infaneco kaj geedziĝis, kaj neniom da nebulo estas en nia feliĉo. Bonvolu instrui al ni, kiel ni povos geedziĝi ree en la venonta vivo."

La Budho donis al ili jenan saĝan respondon: "Se vi ambaŭ havas ekzakte la saman kredon, se vi ambaŭ ricevis la instruon ekzakte en la sama vojo, kaj se vi havas la saman saĝon, tiam vi havos la saman menson en la venonta naskiĝo.

9. Estas nenia seks-distingo sur la vojo al Iluminiĝo.

Se virino rezolute volas serĉi Vervekiĝon, ŝi estas nomata “heroino de la Vera Vojo.

Malliko, la filino de Reĝo Prasenaĵito kaj la edzino de Reĝo Ajodjo, estis tia heroino. Ŝi havis grandan fidon en la instruo de la Budho kaj faris antaŭ Li la jenajn dek votojn:

“Mia estimata, ĝis kiam mi gajnos Vervekiĝon, mi ne atencu la sanktajn preceptojn; mi ne estu aroganta antaŭ ĉiuj, kiuj estas pliaĝaj ol mi mem; mi ne iĝu kolera al iu ajn.

Mi ne estu ĵaluza pri aliaj aŭ ne enviu iliajn posedaĵojn; mi ne estu egoisma kaj en mia menso kaj en mia posedaĵo; mi klopodu fari malriĉajn homojn feliĉaj per la aĵoj, kiujn mi ricevis, kaj ne rezervu ilin por mi mem.

Mi akceptu ĉiujn homojn ĝentile, donu al ili ĉion, kion ili bezonas, kaj parolu afable al ili, konsiderante iliajn cirkonstancojn kaj ne mian konvenon.

Por tiuj, kiuj estas en soleco aŭ en malliberejo kaj estas suferantaj de malsano aŭ de aliaj ĝenoj, mi klopodu igi ilin trankvilaj kaj feliĉaj, per klarigado pri racioj kaj reguloj.

Tiujn, kiuj kaptas animalojn vivantajn, kiuj estas kruelaj al ili, kaj kiuj atencas iun ajn moralon, mi punu, se ili estas punindaj, aŭ gvidu, se ili estas gvideblaj, kaj tiel mi korektu iliajn erarojn tiom, kiom mi kapablas.

Mi ne forgesu aŭskulti la ĝustan instruon, ĉar mi

scias, ke kiam iu neglektas la ĝustan instruon, tiu tuj falos for de la vero, kiu troviĝas ĉie ajn, kaj malsukcesos atingi la bordon de Vervekiĝo.

Krome ŝi faris la jenajn tri dezirojn savi malriĉajn homojn:

"Unue, mi penu fari ĉiujn pacplenaj. Tiu ĉi deziro, kian ajn vivon mi ricevos poste, estu la radiko de bono, kiu kreskos al la saĝo de bona instruo.

Due, post kiam mi ricevos la saĝon de bona instruo, mi senlace gvidu ĉiujn homojn.

Trie, mi protektu la veran instruon, eĉ riskante mian propran korpon, vivon kaj posedaĵon."

La vera signifo de familia vivo estas en la ebleco doni reciprokan instigon kaj helpi unu la alian en paŝado sur la vojo al Vervekiĝo. Laikaj virinoj, se ili ekigas la saman menson serĉi Vervekiĝon kaj faras la saman voton kaj deziron kiel Malliko, fariĝas grandaj disĉiploj de la Budho.

KONSTRUI LANDON DE BUDHO

I

LA HARMONIO DE LA KOMUNUMO

1. Ni imagu dezertan landon kuŝantan en absoluta mallumo kun sennombraj viv-estaĵoj, kiuj svarmas tie kaj ĉi tie.

Ili estas timemaj kaj evitas unu la aliajn pro la plena mallumo. Ili rampadas en soleco, ne rekonante la alian. Tio ĉi estas vere kompatinda aspekto.

Ni imagu sekvante la scenon, ke subite iu supera homo kun torĉo aperas antaŭ ilin kaj ĉio en la dezerto fariĝas hela kaj klara.

La viv-estaĵoj en la malluma soleco subite trovas grandan liberiĝon, ĉar ili ĉirkaŭrigardas por rekoni unu la alian kaj feliĉe komunigas sian kamaradecon.

Ĉi tie "dezerta lando" signifas la mondon de homa vivo, kaj "absoluta mallumo" signifas mankon de la lumo de saĝo. Tiuj, kiuj ne havas saĝon en sia menso, vagadas en soleco kaj timo. Ili naskiĝis solaj kaj mortas solaj; ili ne scias kiamaniere asociiĝi kun sia kamarado en plena

harmonio, kaj ili estas nature senkuraĝaj kaj timemaj.

"Supera homo kun torĉo" signifas Budhon en la homa figuro, kaj per Sia saĝo kaj kompato Li lumigas la mondon.

Per tiu ĉi lumo homoj trovas sin mem kaj ankaŭ la aliajn kaj ĝojas establi homan amikecon kaj harmoniajn rilatojn.

Eĉ se miloj da homoj loĝas en komunumo, ĝi ankoraŭ ne estas tiu kun kamaradeco, ĝis ili ekkonas unu la alian kaj ekhavas simpation inter si.

Vera komunumo havas konfidon kaj saĝon, kiuj lumigas ĝin. Ĝi estas loko, kie homoj konas kaj fidas reciproke, kaj kie troviĝas socia harmonio.

Ja harmonio estas la kerno kaj vera signifo de komunumo aŭ organizo.

2. Ekzistas tri specoj de organizoj. La unua estas tia, kia estas organizita sur la bazo de la forto, riĉaĵo aŭ aŭtoritato de grandaj gvidantoj.

La dua estas tia, kia estas organizita pro ĝia konveneco por la membroj, kaj ĝi daŭrigos sian ekziston dum la membroj restas kontentaj per siaj konvenecoj kaj ne kveleras.

La tria estas tia, kia estas organizita per ia bona instruo kiel ĝia centro kaj per harmonio kiel ĝia vera vivo.

Kompreneble la tria aŭ la lasta el ili estas la sola vera organizaĵo, ĉar en ĝi la membroj vivas en unu spirito. De tia ĉi organizo naskiĝas la unueco de spirito kaj diversaj specoj de virtoj. Tial tie regas paco, ĝojo, kontento kaj feliĉo.

Vervekiĝo estas simila a1 pluvo, kiu falas sur monton kaj amasiĝas en valojn kaj enkuras en riveretojn, kaj poste en riverojn, kiuj finfine enfluas en la oceanon.

La pluvo de la sankta instruo falas egale sur ĉiun senrigarde al iliaj kondiĉoj aŭ cirkonstancoj. Tiuj, kiuj akceptas ĝin, kolektiĝas en malgrandajn grupojn, poste organizojn aŭ komunumojn, kaj finfine trovas sin en la granda oceano de Vervekiĝo.

La mensoj de tiuj ĉi homoj miksiĝas kiel lakto kaj

akvo, kaj fine organiziĝas en harmonia komunumo.

Tiel, la vera instruo estas la fundamenta necesaĵo de perfekta organizo kaj, kiel supre menciite, ĝi estas la lumo, kiu bone ebligas homojn interkonatiĝi kaj glatigi la krudajn partojn en ilia menso.

Tiel, 1a organizo, kiu estas formita sur la perfekta instruo de Budho, povas esti nomata Komunumo (Samgo).

Ĉiuj devas observi la instruon kaj trejni sian menson laŭ ĝi. Tiel, la Samgo teorie povas inkludi ĉiujn homojn, sed efektive nur tiuj, kiuj havas saman religian fidon, estas ĝiaj membroj.

3. La Samgo havas du klasojn de membroj: tiuj, kiuj instruas la laikajn membrojn, kaj tiuj, kiuj subtenas la gvidantojn per oferado de bezonataj manĝaĵoj kaj vestoj. Ili ambaŭ devas gardi kaj disvastigi la komunumon, por ke la instruo estu heredata por eterne.

Por fari la fratecon kompleta, devas troviĝi perfekta harmonio inter la membroj. La monaĥoj instruas la laikojn kaj la laikoj akceptas kaj respektas la instruon de

la monaĥoj; tiamaniere tie estas harmonio inter ili.

Membroj de la Samgo asociiĝu kun amema simpatio, estante feliĉaj kunvivi kun kamaradaj disĉiploj, kaj serĉante unuiĝon en spirito.

4. Ekzistas ses principoj, kiuj helpas gvidi la Samgon al harmonio: la unua, paroli kun kompatemo; la dua, agadi kun kompatemo; la tria, intenci kun kompatemo; la kvara, egale dividi komunan posedaĵon; la kvina, observi la samajn purajn preceptojn; kaj la sesa, havi ĝustan vidon.

El tiuj ĉi principoj, la sesa "havi ĝustan vidon" faras la kernon, kiu kovras la aliajn kvin principojn.

Ekzistas du serioj de sep principoj observendaj, por ke la Samgo estu en prospero. La unua temas pri grupa vivo:

(1) Ĉiuj membroj kolektiĝu ofte por aŭskulti la instruon aŭ diskuti pri ĝi.

(2) Veteranaj kaj novaj membroj harmoiiĝu kaj respektu unu la alian.

(3) Ĉiuj membroj respektu la regulojn kaj ne

senbezone ŝanĝu ilin.

(4) Pliaĝaj kaj plijunaj membroj traktu unu la alian kun ĝentileco.

(5) Ĉiuj membroj tenu sian meson sincera kaj respekto-plena.

(6) Ĉiuj membroj purigu sian menson en kvieta loko, kiun tamen ili devas oferi al aliaj antaŭ ol preni por si mem.

(7) Ĉiuj membroj amu ĉiujn homojn, bonvenigu vizitantojn elkore, kaj konsolu malsanulojn afable.

La Samgo, kiu observas tiujn ĉi principojn, neniam kadukiĝos.

La dua temas pri individua vivo:

(1) teni puran spiriton kaj ne postuli tro multajn aĵojn.

(2) teni honestecon kaj forigi avidecon.

(3) esti pacienca kaj ne disputi.

(4) resti silenta kaj ne babili vane.

(5) obei la regularon kaj ne esti aroganta.

(6) teni kvietan menson kaj ne sekvi aliajn instruojn.

(7) esti ŝparema kaj sobra en ĉiutaga vivo.

Se ĝiaj membroj observas tiujn ĉi principojn, la Samgo neniam kadukiĝos.

5. Kiel menciite supre, la Samgo tenu harmonion en sia vera esenco. Societo sen harmonio ne povas esti nomata Samgo. Ĉiuj membroj estu singardaj kontraŭ la kaŭzo de malakordo. Se malakordo aperas, ĝi devas esti forigita kiel eble plej frue, ĉar malakordo tuj ruinigas ian ajn organizon.

Sangomakuloj ne povas esti forigitaj per pli da sango; rankoro ne povas esti forigita per pli da rankoro; rankoro povas esti forigita nur per forgeso de rankoro.

6. Iam estis reĝo nomata Plago, kies lando estis konkerita de najbara militema reĝo nomata Bramadatta. Reĝo Plago, kiam li sin kaŝadis kun siaj edzino kaj filo dum kelka tempo, estis kaptita. Sed feliĉe lia filo, la princo, povis eskapi la kaptiĝon.

La princo penis trovi ian rimedon por savi sian patron, sed vane. La tagon de ekzekuto de la patro, la princo kaŝe enŝteliĝis en la ekzekutejon, kie li povis fari nenion alian ol nur rigardi la fatala scenon de la ekzekuto.

La patro dume rimarkis sian filon en la svarmo kaj

murmuris kvazaŭ paroli al si mem, “Ne serĉadu dum longa tempo; ne agu haste; rankoro povas esti trankviligita nur per forgeso.”

Poste la princo serĉadis rimedon de venĝo dum longa tempo. Fine li sukcesis esti dungita kiel ĉambristo en la palaco de Bramadatta kaj gajnis favoron de la reĝo.

Iun tagon, kiam la reĝo iris ĉasi, la princo serĉis ian oportunon de venĝo. La princo povis gvidi sian mastron al soleca loko, kaj la reĝo tre laciĝinta ekdormis metante sian kapon sur la genuo de la princo, ĉar li plene konfidis la princon.

La princo eltiris sian ponardon kaj metis ĝin sur la gorĝon de la reĝo, sed tiam ekhezitis. La vortoj, kiujn lia patro esprimis en la momento de la ekzekuto, fulmis en lia menso, kaj malgraŭ sia refoja provo li ne povis mortigi la reĝon. Subite la reĝo vekiĝis kaj parolis al la princo, ke li havis malbonan sonĝon, en kiu la filo de Reĝo Plago provis mortigi lin.

La princo, svingante la ponardon en la mano, haste kaptis la reĝon, identigis sin mem kiel la filon de Reĝo Plago, kaj deklaris, ke la tempo ja fine venis al li venĝi sian patron. Tamen, li ne povis fari tiel, subite forĵetis la ponardon teren, kaj surgenuiĝis antaŭ la reĝo.

Kiam la reĝo aŭdis la rakonton de la princo kaj la lastajn vortojn de lia patro, li estis ege impresita kaj pardonpetis de la princo. Poste li redonis la prirabitan landon al la princo. La du regnoj fariĝis prosperaj en amikeco dum longa tempo.

La vortoj ĉe la morto de Reĝo Plago, "ne serĉadu dum longa tempo" signifas, ke rankoro ne estu vartita longtempe, kaj "ne agu haste" signifas, ke amikeco ne estu rompita haste.

Rankoro ne povas esti kontentigita per rankoro. Ĝi povas esti forigita nur per forgeso.

En la kamaradeco de la Samgo bazita sur la harmonio de vera instruo, ĉiu membro devas ĉiam aprezi la spiriton de tiu ĉi rakonto.

Ne nur la membroj de la Samgo sed ankaŭ ĝenerale homoj devas aprezi kaj praktiki tiun ĉi spiriton en sia ĉiutaga vivo.

II
LA LANDO DE BUDHO

1. Kiel jam menciite, se la Samgo ne forgesas sian devon disvastigi la instruon de Budho kaj vivi en harmonio, ĝi konstante kreskos kaj la instruo etendiĝos pli vaste.

Tio signifas, ke pli kaj pli multaj homoj serĉas Vervekiĝon, ke la malbonaj armeoj de avideco, kolero kaj malvido gvidataj de la diablo de malklero kaj volupto retiriĝas, kaj ke saĝo, lumo, fido kaj ĝojo dominas la regnon de homa menso.

La teritorio de diablo estas plena de avideco, mallumo, barakto, batalo, glavoj kaj sangoverŝo, kaj estas plenplena de ĵaluzo, antaŭjuĝo, malamo, prifripono, flato, sekreto kaj insulto.

Nun ni supozu, ke la lumo de saĝo brilas super la teritorio, la pluvo de kompato falas sur ĝin, fido ekhavas radikon, kaj la floroj de ĝojo vastigas sian parfumon. Tiam la teritorio de diablo turniĝos en Puran Landon de Budho.

Same kiel milda zefiro kaj floroj sur branĉo anoncas

la alvenon de printempo, tiel herboj, arboj, montoj, riveroj kaj ĉiuj aliaj aĵoj ekpulsas per nova vivo, kiam unu homo atingas Vervekiĝon.

Se ies menso fariĝas pura, la ĉirkaŭaĵoj ankaŭ fariĝas puraj.

2. En lando, kien la vera instruo penetras, ĉiuj loĝantoj havas puran kaj trankvilan menson. Vere, kompato de Budho senlace benas ĉiujn homojn kaj Lia brilanta spirito elpelas ĉiujn malpuraĵojn el ilia menso.

Pura menso samtempe fariĝas menso profunda, menso laŭiranta la Noblan Vojon, menso amanta donaci, menso observanta la preceptojn, menso tolerema, menso fervora, menso kvieta, menso saĝa, menso kompatema, menso gvidanta homojn al Vervekiĝo per lertaj rimedoj. La Lando de Budha ĉi tie konstruiĝas.

Hejmo kun edzino kaj infanoj transformiĝas al hejmo, kie Budho ĉeestas; lando, kiu suferas pro sociaj diskriminacioj same transformiĝas al socio kun parenca spirito.

Ora palaco kun sangomakulo ne povas esti la

rezidejo de Budho. Eĉ eta kabano, kie lunbrilo likas tra fendoj de la tegmento, povas transformiĝi al rezidejo de Budho, se la menso de ĝia mastro estas pura.

Kiam la Lando de Budho fondiĝas sur la pura menso de unu homo, tiu pura menso tiras aliajn homojn al si. La rondo de homoj kun pura menso etendiĝas de individuo al familio, de familio al vilaĝo, de vilaĝo al urbetoj, de urbetoj al landoj, kaj fine al la tuta mondo.

Disvastigado de la instruo de Darmo estas nenio alia ol konstruado de la Lando de Budho.

3. Certe, laŭ unu vidpunkto, la mondo kun ĉiuj ĝiaj avideco kaj maljusteco kaj sangoverŝado aperas kiel diabla mondo; sed kiam homoj fidas Vervekiĝon, sango ŝanĝiĝas al lakto kaj avideco al kompato, kaj tiam la diabla mondo fariĝas la Pura Lando de Budho.

Preskaŭ ne eblas elĉerpi oceanon per unu ĉerpilo, sed la decido fari tion, eĉ se necesas multege da renaskiĝoj, estas la menso de tiu, kiu fidas Budhon.

Budho atendas nin sur la alia bordo, kiu estas la mondo de Vervekiĝo, kaj en kiu ne troviĝas nek estiĝas

avideco, kolero, malklero, sufero, agonio, sed troviĝas nur la lumo de saĝo kaj la pluvo de kompato.

Ĝi estas paca lando, rifuĝejo por tiuj, kiuj suferas estante en malĝojo kaj agonio, kaj ripozejo por tiuj, kiuj momente paŭzas dum sia disvastigado de la instruoj de la Darmo.

En tiu ĉi Pura Lando estas senlima Lumo kaj senfina Vivo. Tiuj, kiuj atingas tiun ĉi havenon, neniel returnas sin al la iluzia mondo.

Vere, tiu ĉi Pura Lando, kie floroj parfumas la aeron per saĝo kaj birdoj kantas la sanktan Darmon, estas la finfina celo de ĉiuj homoj.

4. Kvankam tiu ĉi Pura Lando estas la loko por momenta ripozo, ĝi ne estas la loko por mallaboremo. Ĝiaj litoj de aromaj floroj ne estas por maldiligentuloj, sed estas por refreŝiĝado kaj ripozo, por ke oni regajnu energion kaj fervoron por daŭrigi la mision de Budho.

La misio de Budho estas senfina. Tiel longe, kiom homoj kaj aliaj viv-estaĵoj ekzistas, kaj kiom egoisma menso kreadas siajn proprajn mondojn kaj cirkonstancojn,

ne estas fino de Lia misio.

La infanoj de Budho, kiuj jam transiris en la Puran Landon per la granda forto de Budho Amitabo, volas returni sin al la mondo, de kie ili venis, kaj kie ili ankoraŭ havas ligojn. Tie ili partoprenos en la misio de Budho.

Kiel la lumo de malgranda kandelo disvastiĝas de unu al la alia sinsekve, tiel la lumo de kompato de Budho senlime transdoniĝas de unu al la alia senfine.

La infanoj de Budho komprenantaj Lian spiriton de kompato partoprenas en Lia tasko pri Iluminiĝo kaj Purigado. Ilia laboro daŭras generacion post generacio por glorigi la Landon de Budho por ĉiam.

III
SUBTENANTOJ DE LA LANDO DE BUDHO

1. Ŝamavatio, edzino de Reĝo Udajano, fervore rifuĝis al Budho.

Ŝi vivis en la plej interna korto de la palaco kaj ne iris eksteren. Sed ŝia servistino Utaro, ĝibulo, kiu havis bonegan memorkapablon, kutime eliris kaj ĉeestis en la prelegoj de Budho. Ŝi reveninte ripetis al la reĝino la instruojn de la Estimato, kaj tiamaniere la reĝino profundigis sian saĝon kaj fidon.

La dua edzino de la reĝo, Magandijo, ĵaluzis la unuan edzinon kaj kalumniis ŝin al la reĝo kun la intenco mortigi ŝin. Finfine li decidis mortigi Ŝamavation laŭ la agitado de la dua edzino.

Ŝamavatio stariĝis antaŭ la reĝo tiel trankvile, ke li ne ekhavis kuraĝon mortigi ŝin amoplenan. Regajninte sinregadon, li pardonpetis de ŝi pro sia feroca konduto.

La ĵaluzo de Magandijo pli severiĝis kaj ordonis al malbonuloj bruligi la internan korton de la palaco dum la foresto de la reĝo. Ŝamavatio restis trankvila, kvietigis kaj kuraĝigis la konfuzitajn servistinojn, kaj sentime mortis pacplene en la spirito, kiun ŝi lernis de la Estimato. Ankaŭ Utaro mortis kun ŝi en la fajro.

Inter la laikaj virinaj disĉiploj de Budho, tiuj ĉi du estis la plej alte honorigitaj: Ŝamavatio kiel la kompatemulo kaj Utaro kiel la bona aŭskultanto.

2. Reĝo Mahanamo de la Ŝakja klano, kuzo de Ŝakjamunio, havis grandan fidon al la instruoj de Budho kaj estis unu el Liaj fidelaj sekvantoj.

Kiam la feroca reĝo nomata Virudako de Kosalo konkeris la Ŝakja-klanon, Mahanamo iris al Virudako por peti lin savi lian popolon, sed li ne jesis. Mahanamo do proponis, ke la reĝo lasu tiel multe da kaptitoj forkuri, dum li mem restas subakva en apuda lageto. La reĝo konsentis tion, pensante, ke la tempo de lia subakva resto estus tre mallonga.

La pordo de la kastelo estis malfermita kiam Mahanamo plonĝis en la akvon kaj la kaptitoj kuregis por eskapi. Sed Mahanamo ne elakviĝis. Li ligis sian hararon al la radiko de saliko sub la akvo, kaj oferis sian vivon por savi sian popolon.

3. Utpalavarno estis monaĥino, kiu havis supernaturan forton, kaj ŝia saĝo estis komparebla kun tiu de Maŭdgaljajano, granda disĉiplo de Budho. Ŝi estis gvidanto de ĉiuj monaĥinoj kaj neniam laciĝis pro gvidado por ili.

Devadato estis malvirta kaj kruela viro. Li iam instigis Reĝon Aĵataŝatron forpeli Budhon. Sed poste Aĵataŝatro tranĉis sian rilaton al Devadato, ĉar li konvertiĝis kaj fariĝis humila disĉiplo de Budho. Devadato estis forpelita de la kastelo. Kiam li hazarde vidis Utpalavarnon elveni el la kastela pordo, li subite koleriĝis kaj forte batis ŝian kapon per sia pugno.

Ŝi revenis al sia monaĥejo kun granda doloro. Kiam la aliaj monaĥinoj penis konsoli ŝin, ŝi diris al ili, "Fratinoj, homa vivo ne estas la antaŭvidebla; ĉio estas efemera, sen-enta kaj sen-egoa. Nur la mondo de Vervekiĝo sola estas trankvila kaj pacplena. Vi devas daŭre poluri vian klerecon." Kaj ŝi forpasis kviete.

4. Angulimalo, iama terura bandito, kiu mortigis multe da homoj, estis savita de la Estimato kaj kun pento fariĝis monaĥo de la Samgo.

Iam li iris almozpeti en vilaĝo kaj suferis multe da batoj pro siaj antaŭaj malbonaj agoj. La vilaĝanoj atakis kaj batis lin severe; li revenis al la monaĥejo kun sia korpo ankoraŭ sanganta, falis ĉe la piedoj de la Estimato kaj dankis Lin pro la ŝanco por kompensi siajn antaŭajn kruelajn agojn.

Li diris, “Estimato, mi antaŭe havis la nomon “Ahimsako”, kiu signifas neperforton. Sed pro mia malsaĝo, mi rabis multajn valorajn vivojn, kaj al ĉiu mi detranĉis unu fingron por fari kolĉenon el ili, pro kio mi fariĝis nomata ‘Angulimalo’, t.e. kolektanto de fingroj.”

“Poste pere de via kompato mi, rifuĝinte al la tri trezoroj, gajnis la saĝon de Vervekiĝo. Ĝenerale oni bridas bovojn aŭ ĉevalojn per vipo kaj ŝnuro, sed Vi, Estimato, bonvolis purigi mian menson sen uzi vipon nek ŝnuron nek hokon.”

“Hodiaŭ, Estimato, mi suferis nur pro tio, kion kaŭzis mia peko. Mi ne deziras vivi nek morti. Mi nur atendas la tempon, kiu devas veni.”

5. Maŭdgaljajano, kune kun la respektinda Ŝariputro, estis unu el la du plej gravaj disĉiploj de Budho.

Kiam gvidantoj de aliaj religioj vidis, ke la pura akvo de la instruoj de Budho disvastiĝas inter homoj, kaj trovis, ke homoj avide trinkas ĝin, ili fariĝis ĵaluzaj kaj faris diversajn malhelpojn al la prediko. Sed nenio el la malhelpoj povis haltigi aŭ malebligi la disvastiĝon de la instruo. La sekvantoj de la aliaj religioj intencis mortigi

Maŭdgaljajanon.

Du fojon li eskapis, sed la trian fojon li estis ĉirkaŭita de multaj paganoj kaj falis sub iliaj batoj.

Subtenate de Vervekiĝo, li kviete ricevis iliajn batojn; kvankam lia karno estis ŝirita kaj liaj ostoj frakasitaj, li mortis pacplene.

AṄGUTTARA NIKĀYA
(La Libro de la Laŭnumera Prediko)

Ho, monaĥoj! Estas unu persono, kies naskiĝo en tiun ĉi mondon estas por la bonfarto de multaj homoj, por la feliĉo de multaj homoj, por la kompato al la mondo; tiu naskiĝis por la bonfarto kaj la feliĉo de homoj kaj dioj. Kiu estas tiu unu persono ? Tiu estas Tatagato, Arahato, aŭ Plena Vervekiĝinto. Jen estas tiu unu persono.

Ho, monaĥoj! Estas malfacile aperi unu persono en la mondo. Kiu estas tiu unu persono? Tiu estas Tatagato, Arahato, aŭ Plena Vervekiĝinto. Jen estas tiu unu persono.

Ho, monaĥoj! Estas malfacile vidi unu eksterordinaran personon aperi en la mondo. Kiu estas tiu unu persono? Tiu estas Tatagato, Arahato, aŭ Plena Vervekiĝinto. Jen estas tiu unu persono.

Ho, monaĥoj! Multe da homoj lamentas kaj malĝojas, kiam unu persono forpasas. Kiu estas tiu unu persono? Tiu estas Tatagato, Arahato, aŭ Plena Vervekiĝinto. Jen estas tiu unu persono.

Ho, monaĥoj! Estas unu persono, kies naskiĝo en tiun ĉi mondon estas ne komparebla kaj unika. Kiu estas tiu unu persono? Tiu estas Tatagato, Arahato, aŭ Plena Vervekiĝinto. Jen estas tiu unu persono.

Ho, monaĥoj! Estas unu persono, kies naskiĝo en tiun ĉi mondon estas ekapero de granda okulo, de granda brilo kaj de granda lumo. Kiu estas tiu unu persono? Tiu estas Tatagato, Arahato, aŭ Plena Vervekiĝinto. Jen estas tiu unu persono.

(*Aṅguttara Nikāya I-13*)

REFERENCITAJ ORIGINOJ

Mallongigoj : DN-Dīgha Nikāya
MN-Majjhima Nikāya
SN-Saṃyutta Nikāya
AN-Aṅguttara Nikāya

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*

BUDHO

Ĉapitro 1

1	2	1	Diversaj Sutroj
	4	19	AN 3-38, Sukhumālā-sutta
	5	10	MN 3-26, Ariyapariyesana-sutta
	5	21	Diversaj Sutroj
	6	21	MN 9-85, Bodhirājakumāra-sutta
	7	1	Diversaj Sutroj
	7	10	Sutta-nipāta 3-2, Padhāna-sutta
	7	16	Diversaj Sutroj
	8	5	Vinaya, Mahāvagga 1
	9	5	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta
2	10	13	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta
	11	9	Parinibbāna-sutta
	13	7	Parinibbāna-sutta
	13	13	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta

Ĉapitro 2

1	15	1	Amitāyur-dhyāna kaj Vimalakīrti-nirdeśa sūtras
	15	6	Śūraṃgama-sūtra

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
	15	11	Vimalakīrtinirdeśa kaj Mahā-parinirvāṇa sūtras
	16	4	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 16
	17	1	Mahāyāna-jātaka-cittabhūmi-parīkṣa-sūtra
	17	7	Mahāparinirvāna-sūtra
2	19	1	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 3
	20	1	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 4
	21	9	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 5
3	22	15	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 16

Ĉapitro 3

1	25	1	Avataṃsaka-sūtra 5
	26	3	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	26	9	Avataṃsaka-sūtra
	26	17	Suvarṅaprabhāsottamarāja-sūtra 3
2	29	8	Avataṃsaka-sūtra
	29	14	Avataṃsaka-sūtra 34, Gaṇḍa-vyūha
	29	17	Malgranda Sukhāvatīvyūha-sūtra
	30	2	Avataṃsaka-sūtra
	30	6	SN 35-5
	30	9	Mahāparinirvāṇa-sūtra
3	32	10	MN 8-77, Mahāsakulūdayi-sutta
	33	8	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	33	19	Laṅkāvatāra-sūtra
	34	6	Avataṃsaka-sūtra 32
	34	21	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 25
	34	25	Mahāparinirvāṇa-sūtra

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
	35	13	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 2
	35	19	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 3

DARMO

Ĉapitro 1

1	38	1	Vinaya, Mahāvagga 1-6 kaj SN56-11-12, Dhammacakka-pavattana-sutta
	39	14	Itivuttaka 103
	40	1	MN 2, Sabbāsava-sutta
	40	8	Sūtra Kvardek Du Ĉapitroj 18
2	41	8	Śrīmālādevīsiṃhanāda-sūtra
3	43	1	Avataṃsaka-sūtra 22, Daśa-bhūmika

Ĉapitro 2

1	46	1	MN 4-35, Cūḷasaccaka-sutta
	48	11	AN 5-49, Muṇḍarāja-vagga
	49	1	AN 4-185, Samaṅa-sutta
	49	7	AN 3-134, Uppāda-sutta
2	49	13	Laṅkāvatāra-sūtra
	49	16	Avataṃsaka-sūtra 2
	50	6	Avataṃsaka-sūtra 16
	50	16	Avataṃsaka-sūtra 22, Daśa-bhūmika
	51	4	Laṅkāvatāra-sūtra
	51	9	AN 4-186, Ummagga-sutta

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
	51	13	Dhammapada 1, 2, 17, 18
	52	2	SN 2-1-6, Kāmada-sutta
3	52	13	Avataṃsaka-sūtra 16
	53	1	Laṅkāvatāra-sūtra
	53	15	MN 3-22, Alagaddūpama-sutta
	54	1	Laṅkāvatāra-sūtra
	54	14	Laṅkāvatāra-sūtra
4	57	6	Vinaya, Mahāvagga 1-6
	57	19	Laṅkāvatāra-sūtra
	58	5	SN 35-200, Dārukkhandha-sutta
	58	13	Laṅkāvatāra-sūtra en altele
	59	5	MN 2-18, Madhupiṇḍika-sutta
	59	18	Laṅkāvatāra-sūtra
	60	11	Laṅkāvatāra-sūtra
	61	10	Vimalakīrtinirdeśa-sūtra
	63	12	Avataṃsaka-sūtra 34, Gaṇḍa-vyūha
	63	21	Laṅkāvatāra-sūtra en altele

Ĉapitro 3

1	65	1	Vinaya, Mahāvagga 1-5
	65	15	Vinaya, Cūḷavagga 5-21
	66	3	Śūraṃgama-sūtra
2	71	10	Śūraṃgama-sūtra
	73	8	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	73	15	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 7 kaj Śūraṃgama-sūtra
	74	5	Avataṃsaka-sūtra 32

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
	74	10	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	74	15	Brahmajāla-sūtra
	75	2	Mahāparinirvāṇa-sūtra
3	75	20	Mahāparinirvāṇa-sūtra

Ĉapitro 4

1	81	1	Śrīmālādevīsiṃhanāda-sūtra
	82	8	AN 2-11
	82	13	Itivuttaka 93
	82	20	Vinaya, Mahāvagga
	83	8	AN 3-68, Aññātiṭṭhika-sutta
	83	23	AN 3-34, Āḷavaka-sutta
	84	14	Vaipulya-sūtra
	84	20	Vinaya, Mahāvagga 1-6, Dhamma-cakkapravattana-sutta
	85	3	MN 2-14, Cūḷadukkhakkhandha-sutta
	85	17	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	86	18	Itivuttaka 24
2	88	13	MN 6-51, Kandaraka-suttanta
	89	7	AN 3-130
	89	15	AN 3-113
3	90	6	Itivuttaka 100
	90	16	Sūtra de Parabolo
	91	15	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	93	2	AN 3-62
	93	17	AN 3-35, Devadūta-sutta
	93	21	Therīgāthā Aṭṭhakathā

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
4	95	18	Sukhāvatīvyūha-sūtra vol.2

Ĉapitro 5

1	102	1	Sukhāvatīvyūha-sūtra vol.1
	105	18	Sukhāvatīvyūha-sūtra vol.2
	107	5	Amitāyur-dhyāna-sūtra
2	110	15	Malgranda Sukhāvatīvyūha-sūtra

LA VOJO DE PRAKTIKO

Ĉapitro 1

1	116	1	MN 2, Sabbāsava-sutta
	117	21	MN 3-26, Ariyapariyesana-sutta
	118	11	SN 35-206, Chapāna-sutta
	119	8	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 41-2
	121	18	MN 2-19, Dvedhāvitakka-sutta
	122	14	Dhammapada Aṭṭhakathā
2	123	12	AN 3-117
	124	3	MN 3-21, Kakacūpama-sutta
	127	4	MN 3-23, Vammīka-sutta
	128	14	Jātaka IV-497, Mātaṅga-Jātaka
	132	5	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 9
	132	14	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 11
	132	10	Sūtra de Kvardek Du Ĉapitroj 13
	134	8	AN 2-4, Samacitta-sutta
3	135	3	Saṃyuktaratnapiṭaka-sūtra
	140	10	Upamā-śataka-sūtra

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
	143	12	Mahāprajñāpāramitā-upadeśa-śāstra
	144	22	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	145	17	Saṃyuktaratnapiṭaka-sūtra

Ĉapitro 2

1	150	1	MN 7-63, Cūḷamālunkya-sut-tanta
	152	4	MN 3-29, Mahāsāropama-sutta
	153	20	Mahāmāyā-sūtra
	154	11	Theragāthā Aṭṭhakathā
	156	5	MN 3-28, Mahāhatthipadopa-ma-sutta
	156	19	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	157	10	Avadānaśataka-sūtra
	158	16	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	160	11	Pañcaviṃśatisāhasrikā-prajñāpāramitā-sūtra
	161	18	Avataṃsaka-sūtra 34, Gaṇḍa-vyūha
2	163	11	AN 3-88
	164	9	AN 3-81
	164	17	AN 3-82
	165	11	Parinibbāna-sutta vol.2
	166	9	MN 14-141, Saccavibhanga-sutta
	167	16	Parinibbāna-sutta vol.2
	168	11	AN 5-16, Bala-sutta
	168	16	Avataṃsaka-sūtra 6
	169	15	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	170	1	Saṃyuktaratnapiṭaka-sūtra

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
	170	15	Suvarṅaprabhāsa-sūtra 26
	171	6	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	172	6	Theragāthā Aṭṭhakathā
	172	21	Jātaka 55, Pañcāvudha-Jātaka
	174	4	Itivuttaka 39 kaj 40
	174	11	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	174	14	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	174	20	AN 5-12
	175	6	Parinibbāna-sutta
	175	15	Śūraṃgama-sūtra
3	177	3	SN 55-21 Kaj 22, Mahānāma-sutta
	177	18	AN 5-32, Cundī-sutta
	178	6	Vimalakīrtinirde´sa-sūtra
	178	19	Śūraṃgama-sūtra
	179	5	Sukhāvatīvyūha-sūtra vol.2
	179	15	SN 1-4-6
	179	18	Avataṃsaka-sūtra 33
	180	16	Avataṃsaka-sūtra 24
	181	7	Suvarṅaprabhāsa-sūtra 4
	181	16	Amitāyur-dhyāna-sūtra
	181	19	Sukhāvatīvyūha-sūtra
	182	3	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	183	1	MN 2-16, Cetokhila-sutta
	183	15	Sukhāvatīvyūha-sūtra vol. 2
4	184	13	Dhammapada
	191	20	SN 1-4-6
	192	8	AN
	192	12	Mahāparinirvāṇa-sūtra

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*

LA KOMUNUMO

Ĉapitro 1

1	194	1	Itivuttaka 100 kaj MN 1-3, Dhammadāyāda-sutta
	194	7	Itivuttaka 92
	194	16	Vinaya, Mahāvagga 1-30
	195	15	MN 4-39, Mahā-assapura-sutta
	197	1	MN 4-40, Cūḷa-assapura-sutta
	198	1	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 10
	198	6	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 10
	198	15	Saddharmapuṇḍarīka-sūtra 14
2	200	1	SN 55-37, Mahānāma-sutta
	200	11	AN 3-75
	200	18	SN 55-37, Mahānāma-sutta
	201	4	SN 55-54, Gilāyanaṃ-sutta
	201	9	Avataṃsaka-sūtra 22
	203	1	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	206	5	Avataṃsaka-sūtra 7
	209	5	Mahāmāyā-sūtra
	210	5	Avataṃsaka-sūtra 21
	211	2	Mahāparinirvāṇa-sūtra
3	212	1	DN 31, Siṅgālovāda-sutta
	217	9	AN 2-4, Samacitta-sutta
	218	7	AN 3-31
	218	14	Jātaka 417, Kaccāni-Jātaka

Sekcio	*Paĝo*	*Linio*	*Origino*
	220	7	DN 31, Siṅgālovāda-sutta
	220	16	Dhammapada Aṭṭhakathā 1
	222	6	(Birmaj Komentarioj)
	222	21	Śrīmālādevāsiṃhanāda-sūtra
Ĉapitro 2			
1	225	1	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	226	16	AN 3-118, Soceyyan-sutta
	228	13	SN
	229	5	Vinaya, Mahāvagga 10-1 Kaj 2
	229	13	DN 16, Mahāparinibbāna-sutta
	231	1	Vinaya, Mahāvagga 10-1 Kaj 2
2	234	1	SN
	234	19	Antarābhava-sūtra
	235	6	Vimalakīrtinirdeśa-sūtra
	236	11	Mahāparinirvāṇa-sūtra
	237	7	Malgranda Sukhāvatīvyūha-sūtra
	237	13	Sukhāvatīvyūha-sūtra
	238	6	Vimalakīrtinirdeśa-sūtra
3	238	15	Dhammapada Aṭṭhakathā 1
	239	7	AN 34-2
	240	1	Dhammapada Aṭṭhakathā 1
	240	16	AN 5-1
	241	1	Mūla-sarvāstivāda-vinaya San.ghabheda-vastu 10
	241	14	MN 9-86, Aṅgulimāla-sutta
	242	14	AN 26

APENDICOJ

KONCIZA HISTORIO DE BUDHISMO

– Disvastiĝo de Hindio al Japanio –

1. HINDIO

En la spirita historio de homaro oni spertis unu el la plej gravaj epokfaraj okazintaĵoj, kiam la "Lumo de Azio" estis lanĉita, brilante en la centra parto de Hindio, alivorte, kiam la fonto de Granda Saĝo kaj Kompato ŝpruciĝis kaj daŭre riĉigadis la homan menson dum multaj jarcentoj ĝis hodiaŭ.

Budho Gaŭtamo, kiu estas konata de postaj budhanoj kiel Ŝakjamunio aŭ la "Sanktulo de Ŝakja klano", forlasis sian hejmon, fariĝis ŝramano kaj direktis sian paŝon suden al Magado. La tempo, kiam Li fine atingis Vervekiĝon sub la Bodhi-arbo tie, estis supozeble en la mezo de la 5-a jarcento a.K. Li daŭris sian senlacan klopodon prediki la instruon de Saĝo kaj Kompato, dum kvardek kvin jaroj de la Vervekiĝo ĝis la "Granda morto", per kiu Li eniris en "Plenan Nirvanon". Rezulte de tio gravaj budhanoj konstante aperadis en diversaj regnoj kaj triboj en la meza Hindio.

Dum la tempo de Reĝo Aŝoko (regis 268 - 232 a.K.), la tria reĝo de la Maŭrja dinastio, la instruo de Budho Gaŭtamo disvastiĝis ne nur tra la tuta Hindio sed ankaŭ trans la landlimoj.

La Maŭrja dinastio estis la unua unuiĝinta reĝolando en Hindio. Tiu ĉi reĝolando en la tempo de la unua reĝo, Ĉandragupto (regis ĉirkaŭ 317 - 293 a.K.), jam posedis vastan teritorion etendiĝantan al la Himalajaj montoj en la nordo, al la golfo de Bengalo en la oriento, al la Hindukuŝa montaro en la okcidento, kaj trans la Vindja montaro en la sudo. Reĝo Aŝoko plie etendis sian teritorion al la Dekkana altebenaĵo, konkerinte Kalingon kaj aliajn landojn.

Laŭdire Aŝoko estis tre furioza en sia naturo, tial li estis nomata Ĉandaŝoko (la furioza Aŝoko). Sed lia karaktero montris kompletan ŝanĝiĝon, kiam li propraokule vidis la tragikajn scenojn okazigitajn de la milito, en kiu Kalingo estis venkita, kaj poste li fariĝis fervora kredanto de la instruo de Saĝo kaj Kompato. Li entreprenis multajn aferojn kiel budhano, el kiuj la sekvantaj du laboroj estas la plej notindaj.

La unua temas pri la "Ediktoj de Aŝoko", kiuj restas sur ŝtonaj kolonoj aŭ sur poluritaj rokmuroj kun gravuritaj tekstoj enhavantaj la instruon de Budho. Li konstruis ilin en multaj lokoj por disvastigi la instruon de Budho. La dua laboro estis, ke li sendis misian delegacion al la ĉirkaŭaj landoj trans la landolimo por disvastigi instruojn de Saĝo kaj Kompato. Precipe rimarkinda estas la fakto, ke kelkaj misiaj delegacioj estis senditaj al tiaj malproksimaj lokoj, kiaj Sirio, Egiptio, Cirenio, Makedonio kaj Epiro. Budhismo estis disvastigita malproksime kaj vaste al la Okcidento. Plie Mahendra (en Pali, Mahinda), sendita al Tāmraparni aŭ Cejlono, sukcesis en "konstruado de la bela instruo sur la bela Lankādvīpa (en Pali, Lankādīpa)" kaj tiel fondis la deirpunkton de la tiel nomata Suda Budhismo en la insulo.

2. LA LEVIĜO DE MAHAJANA BUDHISMO

Budhanoj de postaj jaroj ofte uzas la esprimon "Budhisma Movado al la Oriento". Sed dum pluraj jarcentoj antaŭ Kristo, la vizaĝo de Budhismo estis evidente turnita al la Okcidento. Estis ĉirkaŭ la komenco de kristana erao, ke la vizaĝo de Budhismo turniĝis al la Oriento. Tamen, antaŭ ol paroli pri tiu ĉi afero, ni devas mencii la grandan ŝanĝiĝon, kiu okazis en Budhismo. Tiu ĉi ŝanĝiĝo estas nenio alia ol la "Nova Ondo", kiu estas konata kiel

la Mahajana Budhismo, aŭ Granda Veturilo de Budhismo, kiu tenis fortan radikon kaj aperis kiel rimarkinda elemento tiutempe.

Kiam, kiel, kaj de kiu tia "Nova Ondo" ekestis? Neniu povas respondi decide kaj klare tiujn ĉi demandojn, ĉar troviĝas diversaj hipotezoj, kiuj kontraŭstaras unu la alian, kaj budhologoj ankoraŭ nun diskutadas pri tiu ĉi temo. Tamen oni povas diri, ke ĉirkaŭ la komenco de kristana erao ekzistis kelkaj Mahajanaj sutroj. Kaj kiam Nagarĝuno disvolvis eminentan ideologion surbaze de la Mahajanaj sutroj, Mahajana Budhismo okulfrape aperis sur la scenejo de la budhisma historio.

La rolo, kiun ludis Mahajana Budhismo, estas tre grava en la longa historio de Budhismo. Kiel ni en pliposta ĉapitro klarigos, kaj en Ĉinio kaj en Japanio Budhismo tra la tuta historio disvolviĝis sub la influo de la Mahajana instruo. Tio ĉi ne estas mirinda, ĉar Mahajano levis la novan idealon savi popolamason, kaj oni supozis la novan figuron, Bodisatvon, kiu efektivigas tiun ĉi idealon. Krome, por subteni la idealon Mahajanaj ideologoj naskis grandiozajn intelektajn rezultojn en metafizikaj kaj psikologiaj sferoj. Tiel ĝi unuflanke sekvis la instruon de Budho Gaŭtamo, kaj aliflanke aldonis multajn novajn ideojn al ĝi. Pro tio Budhismo fariĝis plenplena de ardo kaj energio kaj riĉigis la landojn en Oriento kvazaŭ torenta rivero.

3. LA CENTRA AZIO

Pere de la Centra Azio ĉinoj por la unua fojo akceptis Budhismon. Tial, por montri kiel ĝi disvolviĝis el Hindio al Ĉinio, estas necese paroli pri Silka Vojo. Tiu ĉi vojo pasis tra la dezertaj regionoj en la Centra Azio, ligante Okcidenton kun Oriento. Tiu ĉi

komerca vojo estis farita en la epoko de Reĝo Wu de Han-dinastio (140 - 87 a.K.). En tiu epoko la teritorio de Han disvastiĝis al la malproksima Okcidento, kaj en najbaraj landoj kiel Ferghana, Sagdiana, Tukhara kaj eĉ Parthia, la spirito de komercisto, kiu estis antaŭe instigita de Aleksandro la Granda, estis ankoraŭ forte vigla. Laŭ tiu ĉi antikva vojo, kiu pasis tra tiuj ĉi landoj, silko ludis la plej gravan rolon. Tial ĝi estis nomata Silka Vojo. De tiu ĉi epoko ĉirkaŭ la komenco de kristana erao Hindio kaj Ĉinio komencis kulturan kontakton per la komerca vojo. Tial oni povas diri, ke la vojo estis ankaŭ la vojo de Budhismo.

4. ĈINIO

La historio de Ĉina Budhismo komenciĝis, kiam ĉinoj akceptis la Budhismajn sutrojn kaj entreprenis iliajn tradukojn. Laŭdire la plej malnova traduko en la antikva epoko estas "*si-shi-er-zhang-jing*" (Sutro de kvardek du Ĉapitroj), kiun tradukis Kāśyapa Mātaṇga kaj aliaj dum la Jongping erao (58 -75 p.K.) de Reĝo Ming de la Donghan-dinastio; hodiaŭ tamen sciencistoj diras, ke tiu ĉi aserto estas dubinda kaj estas nur legendo. La plej malnovajn tradukojn faris An Shigao, kiu laboradis en Luoyang de ĉ. 148 ĝis ĉ.171 p.K. Ekde tiu ĉi tempo ĝis tiu en la Beisong-dinastio (960 - 1127) la tradukado daŭris dum proksimume mil jaroj.

Dum la fruaj jaroj tiuj, kiuj ludis ĉefan rolon en la enkonduko de la sankta skribo kaj ĝia traduko, estis plejparte monaĥoj el landoj de la Centra Azio. Ekzemple, An Shigao, supre menciita, devenis de Parthia; Saṃghavarman (ĉin-nome, Kan Sengkai), deveninta de Samarkando, alvenis al Luoyang ĉirkaŭ la tria jarcento kaj tradukis "*sukhāvatīvyūha sūtra*" (la Sutro de la

Budho de Nemezurebla Vivo); Dharmarakṣa (ĉin-nome, Zhu Fahu), tradukinto de la "saddharma puṇḍarīka sūtra" (la Sutro de la Blanka Lotuso de la Sublima Darmo), devenis de Tukhara kaj rezidis en Luoyang kaj poste en Chang'an ekde la lasta duono de la tria jarcento ĝis la komenco de la kvara jarcento. Kiam Kumārajīva, kiu devenis de Kucha, agadis en la frua parto de la kvina jarcento, la traduka laboro en Ĉinio kulminis.

Ekde tiu ĉi tempo komenciĝis aktiva laboro de la monaĥoj, kiuj vizitis Hindion el Ĉinio por lerni Sanskriton kaj rekte pristudi la instruon de Budho. La pioniro de tiaj monaĥoj estis Fa Xian (337 - 422). En 399 li iris de Chang'an al Hindio kaj revenis hejmen post dek kvin jaroj. La plej rimarkinda el tiuj ĉi monaĥoj, kiuj vizitis Hindion, estis Xuan Zang (602 - 664), kiu alvenis al Hindio en 627 kaj revenis en 645, post longa studado dum dek naŭ jaroj. Yi Ching (635 - 713) alvenis al Hindio laŭ mara vojo en 671 kaj revenis per la sama vojo post dudek kvin jaroj.

Tiuj ĉi monaĥoj vizitis Hindion de sia propra volo por lerni Sanskriton kaj alportis la sanskritan sanktan skribon de si preferitajn, kaj en sia hejmo ludis gvidan rolon en la traduka laboro de la originalaj tekstoj. Precipe la lingva kapablo de Xuan Zang estis rimarkinde elstara, kaj per lia energia laboro la tradukado de sankta skribo en Ĉinio atingis la kulminon. Dum la laboroj de fruaj pioniroj, kiuj estas reprezentataj de Kumārajīva, estas nomataj "malnovaj tradukaĵoj", la laboroj de Xuan Zang kaj pli postaj tradukaĵoj estas nomataj "novaj tradukaĵoj" de la studantoj en posta epoko.

Sur la bazo de tiuj ĉi multege da volumoj de la Budhisma sankta skribo, kiujn ili tradukis el Sanskrito, ĉinaj budhanoj pli kaj pli inklinis al la ĉineska aŭ ĉineca pensmaniero en la sfero de ideologio aŭ religio. Tie evidente aperis karaktero, postulo kaj konfido de la nacio. La monaĥoj en la frua tempo precipe turnis

sian atenton metafizikan al “Ŝunjato” kiu estas karakteriza ideo de tiel nomataj “Praĝnjaj” sutroj. Tiu ĉi tendenco estas videbla ankaŭ en la fakto, ke ili forĵetis “Hinajanon”, malgrandan veturilon, kaj turnis sian atenton ekskluzive al “Mahajano”, granda veturilo. Kaj tiu ĉi tendenco pli kaj pli fariĝis notinda en Tiantai Skolo kaj fine atingis la lastan etapon, kiam aperis Zen Skolo.

En la lasta duono de la sesa jarcento Tiantai Skolo estis kompletigita, kiam aperis Zhi Yu, Majstro Tiantai (538 - 597), la tria patriarko de la skolo. Li estis unu el la plej rimarkindaj pensuloj de Budhisma filozofio, kaj elpensis la sisteman kaj kritikan klasifikon de ĉiuj instruoj de Budho; ĝi, nomata “klasifiko laŭ kvin periodoj kaj ok doktrinoj”, havis tre fortan kaj vastan influon sur la ĉina kaj la japana Budhismoj dum longa tempo.

Multege da sanktaj skriboj venis al Ĉinio tute senorde kaj tradukiĝis sinsekve senkonsidere al historiaj detaloj. Ili enhavas diversajn enhavojn, eĉ kontraŭstarajn inter kelkaj tekstoj. Starante antaŭ multege da tekstoj, ĉinaj budhanoj nun sentis bezonon klarigi, kiel la tekstoj naskiĝis, kian valoron la tekstoj havas, kiel ili komprenas la tuton de Budhimo, kaj sur kiu instruo ili sin bazas. Jen estas la motivo de la klasifiko, kiu havas plurajn variantojn. Tiusence la klasifiko estis antaŭ ĉio entrepreno de ĉineska ideologio. Precipe tiu de Zhi Yu estis la plej sistema kaj konvinka. Sed kiam la moderna studo de Budhismo estis enkondukita, lia influo reganta dum longa tempo venis al la fino.

En la historio de Budhismo en Ĉinio “kiu venis la lasta” estis Zen Skolo. Oni diras, ke la fondinto de tiu ĉi skolo estis Bodidarmo (sanskrite, Bodhidharma) (? - ?), monaĥo el Hindio. La semo semita de li pompe ekfloris nur post la periodo de Hui Neng (638 - 713), la sesa patriarko de la skolo. Kaj post la oka jarcento, la skolo de Ĉinio naskis sinsekve talentajn pastrojn,

alportante prosperon de Zeno dum kelkaj jarcentoj.

En la Zena Budhismo oni trovis novan pensmanieron, kiu estas esprimata kiel “ĝusta heredo el la fondinto” aŭ “heredo ekster skribaĵo”. Tradicie la instruo de Budho estas nenio alia ol sutro, t.e. skribita instruo. Sed Zenaj budhanoj asertas, ke la ĝusta instruo estis transdonita ne de sutro sed de rekta sperto. Jen la pensmaniero, kiu bazas sin profunde sur karaktero de ĉinoj, kaj ĝi estas certe ĉineska budhismo. Sed la instruo de Budho Gaŭtamo kun tiu ĉi freŝa fluo, fariĝis pli granda rivero kaj riĉigas la landojn en Oriento.

5. JAPANIO

La historio de Budhismo en Japanio komenciĝis en la sesa jarcento. En 538 la reĝo de Bakje (antikva lando en korea duoninsulo) delegis sian ambasadoron por donaci statueton de Budho kaj sutrojn al la reĝa kortego de Mikado Kimmei. Tio ĉi markis la unuan enkondukon de Budhismo en tiu ĉi lando. La historio de Budhismo en Japanio havas pli ol 1400 jarojn

En la longa historio de japana Budhismo, ni povas montri la tri gravajn punktojn.

La unua estas fokusita al la Budhismo dum la 7-a kaj 8-a jarcentoj. Se montri tion ĉi materie, ni povas elekti la periodon ekde la konstruo de la templo Hōryū-ji (607) ĝis tiu de la templo Tōdai-ji (752). Retrorigardante tiun ĉi periodon, ni devas ne forgesi, ke tiam kultura tajdo sin levis eksterordinare tra la tuta Azio. Dum la civilizacio de Okcidento estis fermita en profunda mallumo, tiu de Oriento estis disvolviĝanta en brila aktiveco kaj grandioza movado. En Ĉinio, Centra Azio, Hindio kaj aliaj sudaj

maraj landoj, la agema movado en la intelekta, religia kaj arta kampoj prosperis. Partoprenante en tiu ĉi movado, la aktiva humanisma tajdo de Budhismo estis lavanta la Orientan mondon. Kaj la nova movado de la japana kulturo, kiel oni povas vidi en la konstruaĵoj de brilanta Hōryū-ji aŭ la grandioza Tōdai-ji, kaj ankaŭ en la bunte glora religia kaj arta movado koncernanta ilin, montras la spiradon en Ekstrema Oriento de kultura tajdo, kiu estis kovranta ĉiujn vastajn areojn de Azio.

La popolo de tiu ĉi lando, kiu estis en necivilizita stato dum longa tempo, nun sin banis en la fluo de granda kulturo kaj la floro de civilizacio; la floro de civilizacio subite ekfloris. Tiel estis la turniĝo al bona feliĉo, kiu favoris Japanion en tiuj jarcentoj. Kaj la protagonisto, kiu respondis al la leviĝo de tiu ĉi kulturo, estis nenio alia ol Budhismo. Tiutempe Budhanaj temploj estis la centroj de internacia brilanta kulturo, monaĥoj estis la kleruloj de la novaj scioj, kaj sutroj estis la vehikloj portantaj elstarajn ideologiojn. Tie disvolviĝis la vasta kaj granda kulturo super religio. Tia estis la aktuala stato de Budhimo transportita al tiu ĉi lando en la komenca tempo.

En la naŭa jarcento, du grandaj monaĥoj, Saichō (Dengyō Daishi, 767-822) kaj Kūkai (Kōbō Daishi, 774-835) aperis en la sceno kaj fondis du Budhismajn skolojn, kiuj kune reprezentas la tiel nomatan Heian-Budhismon. Jen estas la komenco de la japana Budhismo en vera senco. La du majstroj reprenis Budhismon en ĝia originala signifo kaj fondis la centrajn templojn sur la montoj Hiei kaj Kōya respektive, kiel la aŭtentikajn praktikejojn, dum ĝistiama Budhismo instalis templojn en grandaj urboj kaj foje emis servi al aristokrataj distraĵoj. Poste dum tri jarcentoj la du skoloj prosperis ĉefe inter aristokratoj kaj en reĝa kortego.

La dua punkto estas fokusita al la Budhismo de la 12-a ĝis la 13-a jarcento. Tiam aperis grandaj monaĥoj, kiel ekzemple

Hōnen (1133-1212), Shinran (1173-1262), Dōgen (1200-1253), Nichiren (1222-1282) k.t.p. Eĉ hodiaŭ, parolante pri Budhismo de nia lando, ni neniam povas pretespasi la nomojn de tiuj ĉi grandaj monaĥoj. Kial ĝuste en tiuj ĉi jarcentoj naskiĝis tiaj grandaj pastroj? Tio estas pro tio, ke komuna tasko en tiu ĉi tempo alfrontis tiujn ĉi majstrojn. Kio do estis la komuna tasko? Ĝi estis akcepto de Budhismo konforma al japana mensa klimato.

Eble iuj demandas, "Kial? Ĉu ne estis vere, ke Budhismo estis enkondukita en tiun ĉi landon jam antaŭ longe?" Sed estas ankaŭ vere, ke por sufiĉe digesti kaj reformi la enkondukitan religion kaj fari ĝin komplete sia propra posedaĵo, kelkaj jarcentoj estis necesaj. Alivorte, en la 7-a kaj 8-a jarcentoj la klopodoj akcepti Budhismon en tiu ĉi lando komenciĝis, kaj kiel la rezulto de la klopodoj, la religio ekfloris per la manoj de la supre menciitaj majstroj en la 12-a kaj 13-a jarcentoj.

Poste Budhismo en Japanio sur la bazo konstruita de tiuj ĉi rimarkindaj majstroj tenis sian postan honoron ĝis hodiaŭ. Post tio tamen jam ne aperis brilo en la japana Budhismo. Sed ŝajnas, ke estas ankoraŭ unu rimarkindaĵo. Ĝi estas la frukto alportita de la esplorado de la origina Budhismo en la moderna budhologio.

Ekde la komenco ĝis hodiaŭ Budhismo en Japanio preskaŭ ĉiam estis Mahajana, sub la influo de la ĉina Budhismo. Precipe post la apero de la grandaj majstroj en la 12-a kaj 13-a jarcentoj, la Mahajana instruo formis ĉefan fluon kun la sekta fondinto kiel ĝia centro, kies doktrino daŭras ĝis hodiaŭ. En la historio de Budhismo en Japanio la studo de la origina Budhismo komenciĝis nur en la mezo de Meiji-erao. La figuro de Budho Gaŭtamo freŝe reaperis antaŭ tiuj, kiuj foje estis forgesintaj la fakton, ke krom la sektaj fondintoj estas la fondinto de Budhismo. Kaj tiuj, kiuj turnis atenton nur al la Mahajana instruo, nun povis klare ekkompreni, ke ankaŭ troviĝas la sistema instruo de Budhismo ekster

Mahajano. Kvankam ĝi ankoraŭ restas en la sfero de scienca intereso kaj ne sufiĉe elvokis novan religian patoson de popolamaso, almenaŭ estas la fakto, ke scioj pri Budhismo, kiujn havas la popolo de tiu ĉi lando, estas draste ŝanĝiĝantaj. Mi, la verkinto de tiu ĉi artikolo, metante emfazon sur tiu ĉi fazo, faru ĝin la tria aŭ la lasta punkto el la tri supre menciitaj.

TRANSIGO DE BUDHISMA KANONO

Budhismo estas religio, kiu estas konstruita sur la instruo, kiun Ŝakjamunio donis dum kvardek kvin jaroj. Tial la vortoj, kiujn Li uzis en sia prediko, havas absolutan aŭtoritaton en tiu ĉi religio. Kaj kvankam troviĝas 84,000 darmaj pordoj kaj multe da skoloj, ĉiu el ili iel rilatas al Lia prediko. La kanono de Budhismo aŭ la aro de la skribitaj tekstoj, en kiuj la instruoj de Budho estas registritaj, estas nomata *Issaikyō (Issaikjoo)* aŭ *Daizōkyō (Daizookjoo)* en la japana, t.e. kompleta kolekto de la sankta skribo.

Ŝakjamunio forte akcentis la egalecon de homoj, kaj Li donis sian instruon en simplaj vortoj de ĉiutaga uzo, por ke ĉiu ajn povu sufiĉe kompreni ilin. Li daŭrigis sian predikon al multaj homoj ĝis la lasta minuto, kiam li forpasis en la aĝo de okdek jaroj.

Post la forpaso de Ŝakjamunio Liaj disĉiploj daŭrigis predikadon laŭ tio, kion ili iam aŭskultis. Tamen povis esti, ke ili iom erare aŭskultis aŭ erare memoris la enhavon de la instruo laŭ la paso de multaj jaroj. Sed la vortoj de Ŝakjamunio ĉiam devas esti heredita ekzakte kaj korekte.

Ŝanco aŭskulti la instruon devas esti garantiata al ĉiuj homoj egale. Tial multe da veteranaj monaĥoj kunsidis por ordigi kaj kombini vortojn kaj instruon per recito de tion, kion ili memoris. Ili pasigis multe da monatoj por ilia diskuto. La koncilio por la redaktado estas nomata *saṃgīti* en la sanskrito. Tio ĉi montras, kiel pie kaj sincere ili provis heredi la vortojn de la granda instruisto. Tiamaniere oridigita instruo poste estis skribita per literoj, kaj ankoraŭ pli poste al ĝi aldoniĝis komentarioj aŭ interpretoj fare de eminentaj monaĥoj. La aro de la komentarioj kaj interpretoj estas nomata Abidarmo (*Abhidharma* sanskrite, *Abhidhamma* palie). Kaj la moralaj reguloj de la Samgo estas nomata Vinajo (*Vīnaya* sanskrite kaj palie). Budhisma kanono konsistas el la tri partoj: Sutro, Vinajo kaj Abidarmo. Tial la

kanono kiel la tuto estas nomata Tripitako (*Tripiṭaka* sanskrite, *Tipiṭaka* palie), laŭlitere signifanta “tri korbojn”, japane *Sanzō*. Preskaŭ ĉiuj skoloj tenadis sian propran kanonon. Ĝis hodiaŭ postvivis tri versioj: palia kanono apartenanta al Teravada Budhismo, ĉinlingva kanono apartenana al Mahajama Budhimo, kaj tibetlingva kanono apartenana al Tibeta Budhismo. El ili la palia kanono estas la plej kompleta kaj sistema.

Tradicie oni diras, ke Budhismo estis enkondukita en Ĉinion en 67 p.K. dum la regado de Reĝo Ming de la Donghan-dinastio (25-220 p.K.) Sed efektive, se diri kun certa pruvo, en la jaro 151 dum la regado de Reĝo Huan de la Donghan-dinastio Budhisma sankta skribo estis enkondukita kaj tradukita. Ĉar Mahajana Budhismo jam estis establita en Hindio ĝis tiam, la tekstoj de pratempa kaj Mahajana Budhismoj ambaŭ estis alportitaj al Ĉinio sen distingo. Ekde tiam dum pli ol 1,700 jaroj la klopodo por traduko de la sankta skribo al la ĉina lingvo daŭris. La nombro de tradukitaj tekstoj atingis 1,440 titolojn kaj 5,586 volumojn (tiutempe tekstoj estis skribitaj en skribrulaĵo). La klopodo por konservado de tiuj ĉi tradukaĵoj en kompleta formo komenciĝis jam en la Wei-dinastio (220-265), kaj ĉirkaŭ la periodo de Beisong-dinastio (960-1127) komenciĝis ilia presado. Intertempe la verkoj de ĉinaj majstraj monaĥoj ankaŭ estis aldonitaj al la Budhisma kanono. Pro tio jam ne estas taŭge nomi tiun en la ĉina versio “Tripitako”-n en la strikta senco de la vorto. En la tempo de Sui-dinastio oni ekuzis la nomon “*Issaikyō*”, kolekto de ĉiuj sanktaj tekstoj, kaj en la tempo de Tang-dinastio (618-907) oni ekuzis ankaŭ la nomon “*Daizōkyō*”, granda kolekto de sanktaj tekstoj.

En la 7-a jarcento Budhismo estis enkondukita en Tibeton kaj dum ĉirkaŭ 150 jaroj, de la 9-a ĝis la 11-a jarcento, klopodo por la tradukado de la Budhanaj tekstoj daŭris, kaj preskaŭ ĉiuj el ili estis tradukitaj en tiu ĉi tempo.

La sanktaj tekstoj estis tradukitaj ne nur en la korean, japanan, sinhalan, kamboĝan, turkan kaj preskaŭ ĉiujn orientajn

lingvojn, sed ankaŭ en la latinon, francan, anglan, germanan kaj italan lingvojn. Vidante tiun ĉi fakton, oni povas diri, ke la beno de la instruo de Budho disvolviĝis en ĉiuj anguloj de la mondo.

Sed aliflanke, se rigaridi el la vidpunkto de kvalito de la traduko kaj la historio de la religia evoluo kaj sortoŝanĝo dum pli ol du mil jaroj kun dek mil aŭ pli multaj volumoj tradukitaj kaj eldonitaj, ŝajne estas ankoraŭ malfacile kapti la veran signifon de la vortoj eligitaj de Ŝakjamunio, eĉ kun la helpo de *Daizōkyō*. Tial estas nepre necese ĉerpi esencajn punktojn el *Daizōkyō*, kaj farigi ilin normo aŭ fundamento, sur kiu oni povas bazi sian fidon al la religio.

En Budhismo la plej supera aŭtoritato estas la vortoj de Ŝakjamunio. Tial la instruo de Budhismo devas esti la instruo, kiu estas firme kunligita al nia ĉiutaga vivo. Se ne, sankta libro, kiom ajn multe da volumoj, ne sukcesas instigi la homan menson el la profundo al fido al la instruo. En ĉi tiu senco, por ke la instruo estu nia propraĵo, estas dezirate, ke sankta libro estu klara, simpla, senpartia, sufiĉe riĉa por prezenti la tuton, preciza, kaj familiara al vortoj de nia ĉiutaga vivo.

Tiu ĉi libro estas kompilita sub la konsideroj supre menciitaj, heredante la grandan fluon de la *Daizōkyō* havanta la historion de dumil kaj kelkcent jaroj. Kompreneble ni ne povas diri, ke tiu ĉi eldono estas perfekta en sia enhavo. La vortoj de Ŝakjamunio estas senlime profundaj en sia signifo, kaj Lia virto estas tiel vasta, ke ni ne povas facile aprezi ĝin. Ni sincere deziras, ke tiu ĉi libro estu pli kaj pli bonigita, proksima al vero, kaj altvalora, plurfoje eldoniĝonte kun revizio. Por tio ni petas de vi samideanoj konsilon kaj kritikon.

HISTORIO DE
“LA INSTRUOJ DE BUDHO”

Ĉi tiu “La Instruoj de Budho” estas kompilita kaj reviziita surbaze de la originala japanlingva eldono de “Nove Tradukita Budhisma Teksto” publikigita en julio 1925, de “la Disvastiga Asocio de Nove Tradukita Budhisma Teksto” estrita de s-ro Muan Kizu. La unua japanlingva eldono estis kompilita ĉefe de d-roj Shūgaku Yamabe kaj Chizen Akanuma, kunlabore kun multaj aliaj budhismaj kleruloj en Japanio. Por publikigi ĝin ili bezonis preskaŭ 5 jarojn.

En la Shōwa-erao (1926-1989) “Populara Eldono de Nove Tradukita Budhisma Teksto” en la japana estis publikigita de la sama Disvastiga Asocio kaj vaste distribuita tra Japanio.

En julio, 1934, kiam la Konferenco de la Tut-Pacifika Budhana Junularo okazis en Japanio, “*The Teaching of Buddha*”, la angla traduko de la supre menciita “Populara Eldono de Budhisma Teksto” estis publikigita de la Tut-Japana Budhana Junulara Federacio, kun la helpo de s-ro D. Goddard, kiel unu el la memorigaj projektoj. En 1962, festante la 70-jaran datrevenon de la enkonduko de Budhismo en Usonon, s-ro Ehan Numata, prezidanto de la Mitutoyo Kompanio, publikigis la alian anglalingvan eldonon “*The Teaching of Buddha*”.

En 1965, kiam s-ro Numata fondis Budhisman Misian Asocion per sia ofermono, li celis disvastigi tra la mondo tiun ĉi “La Instruoj de Budho” kiel unu el la ĉefaj taskoj de la Asocio.

Por realigi tiun ĉi planon, revizia komitato estis establita en 1966. Ĝi konsistis el profesoroj Kazuyoshi Kino, Shūyū Kanaoka, Zennō Ishigami, Shinkō Saeki, Kōdō Matsunami, Shōjun Bandō kaj Takemi Takase. Prof. Fumio Masutani, s-roj N.A. Waddell kaj Toshisuke Shimizu ankaŭ helpis la revizian laboron. Tiamaniere la angla-japana dulingva eldono de “*The Teaching of Buddha*” estis publikigita en nova stilo.

En 1972, profesoroj Syūyū Kanaoka, Zennō Ishigami, Shōyū Hanayama, Kansei Tamura kaj Takemi Takase, korektinte tipografiajn erarojn, rekompilis la angle tradukitan tekston.

Poste, komitato konsistanta el profesoroj Ryōtatsu Shioiri, Takemi Takase, Hiroshi Tachikawa, Kansei Tamura, Shōjun Bandō, kaj Shōyū Hanayama (ĉefredaktoro) estis organizita por rekompili la japanan version de "La Instruoj de Budho", kaj tiu ĉi versio estis eldonita en 1973.

Denove, en 1974, komitato konsistanta el profesoroj Kōdō Matsunami, Shōjun Bandō, Shinkō Saeki, Dōyū Tokunaga, Kansei Tamura kaj Shōyū Hanayama (ĉefredaktoro) estis organizita por rekompili la anglan version "*The Teaching of Buddha*", kiun oni faris kunlabore kun s-ro Richard R. Steiner. Tiu ĉi estis almetita al la japana versio (eldonita en 1973), kio rezultigis la eldonon de la angla-japana dulingva versio.

En 1978 profesoroj Shigeo Kamata kaj Yasuaki Nara aliĝis al la komitato. En 2001, profesoroj Kenneth Tanaka, Shōgō Watanabe, Yoshiyasu Yonezawa, kaj Sengaku Maeda (nuna ĉefredaktoro) aliĝis al la editora komitato.

En 2013, la Societo por Promocio de Budhismo (*the Buddhist Promoting Society*) ŝanĝis sian organizan statuton de "Fondusa Jura Persono" al "Publik-Interesa Fondusa Jura Persono." Okaze de tiu ĉi ŝanĝiĝo, la editora komitato rekonstruis sian membraron kun profesoroj Sengaku Maeda (ĉefredaktoro), Zennō Ishigami, Kiyotaka Kimura, Kenneth Tanaka, Makio Takemura, Yasuaki Nara, Chizuko Yoshimizu, Yoshiyasu Yonezawa, kaj Shōgō Watanabe. Depost 2017, kun prof. Makio Takemura servanta kiel la nova ĉefredaktoro, la komitato kunvenis ĉiujare por fari "La Instruojn de Budho" efektive respondanta al la bezonoj de la nuntempa socio.

Junio, 2017

Pri Esperanta Traduko

En aŭgusto 1980, kiam la 67a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Yokohama, en la fakkunsido de Japana Budhana Ligo Esperantista (JBLE), ni decidis traduki kaj eldoni "La Instruojn de Budho" en Esperanto. Por tiu ĉi projekto, s-ro Ehan Numata, prezidanto de "Budhisma Misia Asocio" donis plenan subtenon inkluzive de la financa helpo, kaj konsentis eldoni kaj disdoni tion.

La komitato konsistis el la jenaj personoj.

prezidanto: Yosiaki Miwa
vicprezidantoj: Sanĉi Asano, Tisyô Wakizaka
komitatanoj: Shonosuke Issobe, Kenzen Minami, Ryûei Samura, Tizuko Tadaisi, Tetuo Yamasita, Tetuo Nose, David MacGill Yukiko Hayasi, Masaki Imai, Yûiti Yamasaki, Hirosi Ikeda, Tadao Yosida, Zirô Kitahara, Sidoo Ŭataru, Fuzimaru Dazai

Ni volas esprimi la plej sincerajn dankonjn al s-ro Masao Kakuo, kiu afable reviziis la tradukaĵon, kaj al s-ino Yukiko Isobe, ĉefdirektoro de Japana Esperanto-Instituto, kiu donis valorajn konsilojn kun entuziasma subteno.

Aŭg. 1981.

Pri la Dua Eldono de Esperanta Traduko

Laŭ la peto de Budhisma Misia Asocio, Japana Budhana Ligo Esperantista reviziis kelkajn partojn koresponde al la nova angla versio.

Feb. 2020

Pri la Tria Eldono de Esperanta Traduko

Tuj post la eldoniĝo de la dua eldono, Yamaguti Sin'iti entreprenis la totalan revizion de la Esperanta traduko. Yamamoto Osamu kunlaboris al tio kaj provlegis la manuskripton. Rezulte, ne nur traduka stilo sed ankaŭ terminoj ŝanĝiĝis al pli natura Esperanto.

Jan. 2022

INDEKSO DE
ĈIUTAGA VIVO

Homa Vivo	*Paĝo*	*Linio*
Signifo de vivo	5	10
Reala stato de ĉi tiu mondo	96	20
Ideala vivmaniero	235	6
Malbona vidpunkto pri vivo	44	19
Ĝusta ideo pri vivo	41	7
Antaŭjuĝo de vivo	57	6
Al homoj perdiĝintaj (Fablo)	127	4
Vivo de homo (Fablo)	90	16
Se oni sekvas vivon avaran kaj pasian (Fablo)	90	3
Instruo de maljuno, malsano kaj morto (Rakonto)	93	17
Morto neevitebla (Rakonto)	94	21
La kvin aferoj, kiujn neniu povas plenumi en ĉi tiu mondo	48	11
La kvar veroj en ĉi tiu mondo	49	1
Iluzio kaj Vervekiĝo ambaŭ devenas de menso	49	13
La dudek aferoj, kiuj estas malfacile plenumi, sed valoraj por homoj	133	10

Fido

Fido estas fajro	179	15
Fido havas tri signifojn	181	7
Fido estas revelacio	182	12
Fido aperas en sincera menso	181	16
Malfacile estas trovi veron, kiel blinduloj apenaŭ		

	Paĝo	*Linio*
priskribi precizan formon de elefanto (Fablo)	75	2
La vera instruo de la Budho montras, kie la Budha-naturo ekzistas (Fablo)	77	19
Pasio kaŝas la Budha-naturon (Fablo)	73	15
Dubo baras fidon.....	183	1
La Budho estas patro, homoj estas Liaj filoj	35	19
Saĝeco de la Budho estas tiel vasta kaj profunda kiel granda maro	34	11
Menso de Budho estas plena de granda kompato	15	1
Kompato de Budho estas eterna	16	4
Budho ne havas fizikan korpon	13	17
Budho predikis tra sia tuta vivo	23	16
Budho uzis la fikcian metodon de vivo kaj morto por persvadi homojn	23	16
Budho savis homojn el ilia sufero per la rimedo de fablo	19	8
alia fablo..... ..	20	1
La mondo de Vervekiĝo	236	19
Rifuĝo al la Budho, la Darmo kaj la Samgo	178	6
Lernado de la vojo teni moralordonon, praktiki la koncentriĝon de menso, kaj agadi saĝe	163	10
La Nobla Okera Vojo	166	14
Ses vojoj por atingi la alian bordon de Vervekiĝo	168	16
Kvar ĝustaj proceduroj	168	6
Kvar ĝustaj vidpunktoj	165	16
Kvin kapabloj por akiri Vervekiĝon	168	11
Kvar senlimaj statoj de menso	171	6
Homoj kiuj komprenas la Kvaroblan Noblan Veron	39	14
Morto de homo kaj efemereco de vivo	12	19

	Paĝo	*Linio*
Recitulo de la nomo de la Amida-Budho naskiĝas en Lia lando de Purego	113	3
Faru lumon el vi mem, konfidu al vi mem	10	15
Ekzercado de Menso		
Distingi tion, kio estas por vi la plej grava (Fablo)	150	9
Gardu vin de via unua paŝo	133	5
Neniam forgesu tion, kion vi serĉas (Fablo)	150	4
Por atingi sukceson oni devas toleri multe da malfacilaĵoj	158	16
Streĉu vin eĉ en ripetitaj malsukcesoj (Rakonto)	172	21
Ne maltrankviligu vin eĉ en mizera cirkonstanco (Rakonto)	124	3
Komprenanto kaj obeanto de la Nobla Vojo similas al homo, kiu eniras en mallumon kun lanterno	40	8
Oni trovas instruon ĉie, kie ajn li iras (Rakonto)	161	18
Homo inklinas movi en la direkto, al kiu lia menso gvidas	121	18
La plej grava punkto de la instruo estas en tio, ke oni regas sian menson	11	13
Regu vian menson antaŭ ĉio	212	1
Se vi regas vian menson	122	1
Diversaj statoj de la menso (Fablo)	118	11
Menso neniam estas la ego-personeco	46	14
Neniam permesu la menson ŝanceligi vin	10	18
Venku vian menson	154	11
Estu la mastro de via menso	11	19
Ĉiuj malbonoj venas de korpo, buŝo kaj menso	87	5
Rilato inter menso kaj vortoj	125	15

	Paĝo	*Linio*
Via korpo estas nenio alia ol pruntepreniita (Rakonto) ..	143	12
Ĉi tiu korpo estas plena de ĉiuspecaj malpuraĵoj	130	21
Ne estu avida je aĵoj	10	18
Tenu viajn korpon, buŝon kaj menson puraj	123	12
Neniam deflankiĝu, sed klopodu (Rakonto)	172	6
Homa Sufero		
Homaj suferoj devenas de alligiteco de menso	43	3
Kiel defendi sin kontraŭ suferoj	13	7
Iluzio kaj malsaĝeco estas la enirejo e Vervekiĝo	59	13
Kiel liberigi sin el suferoj	116	1
Kiam varma fajro de pasio estas estingita, tiam pura Vervekiĝo estas atingebla	142	6
Amoravido vere estas la fonto de iluzio	85	17
Amoravido estas vipuro kaŝita en floroj	85	21
Neniam havu alligitecon al brulanta domo (Fablo)	19	17
Pasio estas la fonto de eraroj (Fablo)	118	4
Ĉi tiu mondo estas en brulanta fajro	82	20
Avideco je la fameco kaj honoro bruligas homojn	119	8
Avideco je la riĉeco kaj volupto ruinigas homojn	119	14
Diferenco inter saĝulo kaj malsaĝulo	134	8
Malsaĝulo neniam sciiĝas pri sia eraro (Fablo)	141	7
Malsaĝulo envias bonan feliĉon de aliulo nur surbaze de rezulto	141	11
Agmaniero de malsaĝulo (Fablo)	147	3
Ĉiutaga Vivo		
Donu oferadon, sed forgesu via agadon.....	169	19

	Paĝo	*Linio*
La sep specoj de donado	170	1
Metodo akiri riĉecon (Rakonto)	145	17
Metodo akiri feliĉon	132	17
Neniam forgesu afablecon ricevitan (Rakonto)	139	10
Diversaj karakteroj de homoj	89	7
Malfeliĉo ĉiam sekvadas la deziron de venĝo	132	5
Metodo kvietigi la senton de indigno (Rakonto)	231	10
Neniam maltrankviliĝu pri riproĉo de aliulo (Rakonto)	122	14
Homo ne vivas por vestaĵo, manĝaĵo aŭ ŝirmilo	205	9
Manĝaĵo kaj vestaĵo ne estas por komforto nek por plezuro	117	1
Kiamaniere vi devas pensi okaze de manĝado	208	8
Kiamaniere vi devas pensi okaze de vestiĝo	207	10
Kiamaniere vi devas pensi okaze de dormado	209	1
Kiamaniere vi devas pensi kiam estas varme aŭ malvarme	208	11
Kiamaniere vi devas pensi pri via ĉiutaga vivo	206	11

Ekonomio

Ĝusta uzado de aĵoj (Rakonto)	221	1
Posedaĵo neniam restas eterne	220	11
Ne amasigu monon sole por vi mem	223	12
Metodo akiri riĉecon (Rakonto)	145	17

Familia Vivo

La familio estas la loko, kie la membroj venas

	Paĝo	*Linio*
en kontakto kun aliaj	218	7
Agoj kiuj difektas familion	213	5
Vojoj per kiuj oni rekompencas grandan ŝuldon al siaj gepatroj	217	20
Ĝusta vojo inter filoj kaj gepatroj	213	21
Ĝusta vojo inter edzo kaj edzino	214	19
Edzo kaj edzino devas havi saman kredon (Rakonto)	222	6
Vojo por Senhejmaj Monaĥoj		
Homo ne estas senhejmaj gefratoj nur pro ke li vestiĝas kiel monaĥo kaj recitas sutron	197	5
Senhejmaj gefratoj ne estas heredantoj de la templo kaj ĝia posedaĵo	194	1
Avareca homo neniam fariĝas vera monaĥo	194	7
La vera vivo, kiun senhejmaj gefratoj devas sekvi	196	1
Socia Vivo		
Signifo de komuna socio	226	11
Efektiva stato de komunumo en ĉi tiu mondo	96	20
Tri specoj de organizaĵoj	226	16
Vera komunuma vivo	227	7
La granda lumo, kiu lumigas la mallumon	225	7
Harmonio en homa rilato	227	20
Rimedo por harmonio de komunumo	229	5
La idealo de la eklezia societo	228	6
La socia idealo de la budhanoj	236	11
Tiu ruiniĝos, kiu malordigas ordon (Fablo)	140	10
Tiu ruiniĝos, kiu estas ĵaluza kaj kverelas		

	Paĝo	*Linio*
kun aliulo (Fablo)	140	10
Respektu maljunulon (Rakonto).....	135	1
Agmaniero de studanto al sia instruisto	214	10
La leĝo de amikeco	215	4
Elektado de bonaj amikoj	216	13
Rilato inter mastro kaj liaj servistoj	215	13
Konduto al krimulo	223	19
Grava punkto kiu koncernas instruanton de la Darmo	198	15

SANSKRITA GLOSARO
(laŭ Alfabeta Ordo)

ANĀTMAN (Neegoo)

Tiu ĉi termino montras unu el la plej fundamentaj doktrinoj de Budhismo: ĉiuj ekzistaĵoj kaj fenomenoj en la mondo ne havas sian substancon, kiun oni povas kapti. Ĉiuj religioj en Hindio antaŭ Budhismo asertis, ke ĉiu ekzistaĵo enhavas senŝanĝan substancon, kiu estas nomata egoo ĉe homa ekzisto. Sed Budhismo neis egoon kaj instruis, ke ĉiu ekzistaĵo ne estas konstanta. Ĉar ĉiu ekzistaĵo aŭ fenomeno ne estas eterna, ili ne havas substancon nek egoon.

ANITYA (Nekonstanteco)

Alia fundamenta doktrino de Budhismo. Ĉiuj ekzistaĵoj kaj fenomenoj en la mondo ĉiumomente ŝanĝiĝas, kaj nenio restas en la sama stato. Per tiu ĉi ideo Budhismo klare montras malsaman starpunkton ol aliaj religioj. Budhismo instruas kvar ŝtupojn: ĉio naskiĝas, daŭras, ŝanĝiĝas kaj poste estingiĝas; observante, ke ĉio estas nekontentiga, tion ni devas fari la ŝancon por nia religia introspekto. De starpunktoj de diversaj skoloj naskiĝis diversaj metafizikaj analizoj, sed ni ne devas enfali en pesimismon nek nihilismon, ĉar kreiĝo kaj disvolviĝo ankaŭ faras unu flankon de nekonstanteco.

AVIDYĀ (Malvido)

La stato, en kiu oni ne havas pravan saĝon. Tio estas malsaĝo, kiu estas la fundamento de iluzio. En ĉiu skolo analizoj kaj klarigoj estas diverse faritaj, sed ĉiu markas ĉi tion kiel la motivan forton, kiu instigas blindan pasion. Laŭ la tezo pri la dek du kaŭzo-rilatoj, kiu klarigas la rilaton inter kaŭzo kaj rezulto de ĉiu ekzistaĵo per dek du ŝtupoj, sur la unua ŝtupo situas tiu ĉi malvido. Oni povas diri, ke ĝi estas blinda volo de avido en vivado.

BODHISATTVA (Bodisatvo)

Origine tiu ĉi vorto indikis Ŝakjamunion, kiu ankoraŭ estis sin ekzercanta antaŭ sia vervekiĝo. Poste ĝi aplikiĝis ĝenerale al viv-estaĵo serĉanta Vervekiĝon. Precipe en Mahajana Budhismo tiu ĉi vorto havas pli vastan signifon kaj inkludis la tutan aron de Mahajanaj Budhanoj, t.e. tiuj, kiuj praktikadas celante Vervekiĝon, kaj tiuj, kiuj klopodas por gvidi aliajn homojn al Vervekiĝo. Plie imagitaj aŭ ne realaj sanktuloj, ekzemple Avalokiteŝvaro aŭ Ksitigarbo, kiuj havas transcendan forton, ankaŭ nomiĝas Bodisatvo. Oni kredis, ke tiuj ĉi sanktuloj, ŝarĝante parton da laboroj de Kompato kaj Saĝo de Budho, kiel vicsavantoj aperis responde al homaj ĉagrenoj.

BUDDHA (Budho)

Laŭvorte "vekiĝinto" kiel komuna substantivo.

En la komenco de la historio de Budhismo ĝi indikis Ŝakjamunion aŭ Gautama Siddhārtha, fondinton de Budhismo, ĉar Li atingis la staton de Vervekiĝo en sia aĝo de 35 jaroj antaŭ ĉ. 2500 jaroj en Hindio. La finfina celo de ĉiuj budhanoj estas, sendepende de diversaj skoloj aŭ tradicioj, fariĝi Budho. Rilate la diferenco de rimedoj por atingi tiun ĉi celon, Budhismo dividiĝis en plurajn skolojn. En Mahajana Budhismo, krom historia Budho Ŝakjamunio, multaj Budhoj, kiel ekzemple Amitābha (Amitabo), Mahāvairocana (Mahavajroĉano), Bhaiṣajyaguru, k.t.p. estas ĝenerale akceptitaj kiel simboloj de la instruo.

En Japanio influite de la koncepto de Purlanda Budhismo, kiu asertas, ke homoj fariĝas Budho, post kiam ili renaskiĝas en la Purlando, oni nomas ĉiujn forpasintojn HOTOKE (Budho en la japana lingvo).

DHARMA (Darmo)

Tiu ĉi vorto havas multajn difinojn rilate al la religiaj tradicioj de Hindio, inkluzive de Hinduismo, Budhismo, kaj Ĝajnismo Ĝi estas centra teologia aŭ filozofia koncepto de Hindiaj religioj, kiu plejofte rilatas al homaj devoj, sed ankaŭ al la instruaj normoj pri ĉi tiuj devoj kaj eĉ la rezultoj de devoplenumado.

En la malfrua Budhisma tradicio, la vorto eksignifis unue la tutan instruaron de Budho, due la devojn aŭ la farindajn praktikojn laŭ ĉi tiu instruo, kaj trie karaktereco aŭ propreco en filozofia senco. Laŭ la unua signifo, Budhismo mem estas fundamente la darmo kaj ankaŭ ĝi funkcias kiel nomo de la tradicio. En la budhisma triopo Budho-Darmo-Samgo, ekzemple, la Budho estas la instruanto, Darmo la instruo kaj Samgo la instruistaro. La darmo ĉi tie precipe estas la bazaj kaj objektiva veroj, kiujn laŭ budhismo ĉiu Budho denove eltrovas.

HETU-PRATYAYA (Kaŭzo-Kondiĉo)

Kaŭzo kaj kondiĉo. Kaŭzo estas rekta motivo, kiu naskas rezulton, kaj kondiĉoj helpas la naskiĝon el ekstero aŭ estas sekundara motivo. Ĉio aperas kaj malaperas laŭ kaŭzo kaj kondiĉoj. Por eniri en Buhismon estas necese akcepti la leĝon de kaŭzo-kondiĉo. Vidu ankaŭ “pratīya-samutpāda”.

KARMAN (Karmo)

Ĝenerala signifo de tiu ĉi vorto estas “agado”. Sed kutime ĝi estas uzata en la senco de “potenciala forto” kiel rezulto, kiun alportas antaŭa agado. Ĉar unu ago certe alportas rekompencon, bonan aŭ malbonan kaj feliĉan aŭ malfeliĉan, ĝia influa forto estas rigardata kiel karmo. Tiel karmo estas preskaŭ samsignifa kiel rekompenco de la agado en antaŭa mondo. Plie estas tri kategorioj de karmo: korpa, parola kaj mensa.

KLEŚA (Kleŝo, Pasio)

Ĉia spirita agado de homoj, kiu malhelpas efektiviĝon de Vervekiĝo. Multaj el homaj deziroj ligitaj kun homa vivo ĉagrenas, malordigas kaj ĝenas homan korpon kaj menson. Ilia fonto estas avideco kaj alkroĉiĝo, kaj bazas sin sur vivforto mem. Avido, kolero kaj malvido estas ĝiaj fundamentoj, el kiuj naskiĝas multaj aliaj pasioj. Ĉar tiuj ĉi pasioj estas malhelpaĵoj de Vervekiĝo, oni devas estingi ilin en la procezo de praktikado. Sed ankaŭ estas alia pensmaniero, kiu aprobas la pasion kiel saltilon al Vervekiĝo.

MAHĀYĀNA (Mahajano)

En la daŭro de Budhisma historio, aperis du ĉefaj tradicioj: Mahajano kaj Teravado. Mahajana tipo de Budhismo disvastiĝis en Tibeto, Ĉinio, Koreio, Japanio k.t.p. Dume Teravado disvastiĝis en Birmo, Srilanko, Tajlando k.t.p. "Mahajano" signifas "Grandan Veturilon," kiu povas akcepti suferojn de ĉiuj viv-estaĵoj en ĉi tiu mondo de naskiĝo-kaj-morto, kaj veturigas ilin sendistinge al la stato de liberiĝo.

MADHYAMĀ-PRATIPAD (Meza Vojo)

La vojo ekskludanta du ekstremojn. Tio montras la pozicion de Budhismo. Tial en ĉiuj skoloj de Budhismo la ideo de la meza vojo estas estimata kaj alte taksata. Tio signifas ne nur moderan vojon. Ĝi estas la vojo, kiu forigante alteniĝon al io penetras egale en la aktualecon. Ĝi neas du kontraŭajn ekstremojn kaj aŭfhebas ilin, ekzemple, esto / malesto, konstanteco / malkonstanteco, k.t.p. Oni povus kompreni ĝin kiel dialektikon.

MAITRĪ-KARUṆĀ (Kompato kaj Favoro)

La du konceptoj, ofte kuniĝinte, faras la fundamentan etikon de Budhismo. Kompato estas "doni feliĉon al aliaj viv-estaĵoj", kaj Favoro "forigi suferon de ili". Vervekiĝinto posedas tiun ĉi etikon kaj amas egale ĉiujn viv-estaĵojn. La Bodisatvoj Avalokiteŝvaro kaj Ksitigarbo simbolas tiun ĉi spiriton.

NIRVĀṆA (Nirvano)

Signifas laŭvorte estingon aŭ trankvilon; estingon de deziroj, avido, malamo, iluzio, kaj alkroĉiĝo. Ĝi havas du aspektojn: Nirvano kun resto kaj Nirvano sen resto. La unua estas la stato de Vervekiĝinto ĝis lia korpa morto, kaj la dua estas tiu de Vervekiĝinto postmorte. Budho Ŝakjamunio do eniris en la unuan Nirvanon de la unua aspekto, kiam li vervekiĝis en la aĝo de 35 jaroj, kaj eniris en la duan aŭ absolutan Nirvanon, kiam lia korpo neniiĝis.

PĀLI (Palio)

Lingvo uzata en Teravada Budhismo. Oni kredas, ke la plej malnova kanono estis transskribita en tiu ĉi lingvo. Ĝi estas unu el la prakritoj, parol-lingvoj aŭ popol-lingvoj en la norda Hindio, dum Sanskrito estas skriba aŭ klasika lingvo por kleruloj. Palio estas parenca al Sanskrito, sed ne estas ĝia ido. Ŝakjamunio mem siatempe uzis probable alian prakriton.

PĀRAMITĀ (Perfekteco, Paramito)

Etimologie, laŭ la sanskrita gramatiko, ĝi povas esti analizita en "pāramī" (la plej alta) kaj "-tā" (sufikso de abstrakta substantivo). Do ĝia signifo estas "perfekteco" aŭ "pleja alteco". Poste tamen en Ĉinio kaj Tibeto oni elpensis alian analizon, ke ĝi konsistas el "pāram" (tien)

kaj “ita” (irinta). Tiuokaze, oni tradukas ĝin en Esperanton kiel “atingi la alian bordon” aŭ “atingi la mondon de nirvano”.

Mahajana Budhismo emfazas praktikon el la ses eroj de “pāramītā”: donaco, observo de preceptoj, pacienco, klopodo, meditado kaj saĝo. En Japanio unusemajna periodo de printempa kaj aŭtuna ekvinoskoj estas nomata “higan” (japanlingva traduko de paramito) kaj en tiuj ĉi periodoj entuziasmaj budhanoj praktikas la ses-eran paramiton.

PARIṆĀMAṆĀ (Transdono)

Transdono de meritoj akumulitaj pere de bonaj agoj. Estas du okazoj: transdoni por sia propra vervekiĝo en estonteco, kaj por aliaj viv-estaĵoj. Reciti sutron en la okazo de funebra ceremonio estas unu tipo de tiu ĉi transdono, tiel oni kredas, ĉar mortintoj jam ne povas fari bonajn agojn kaj necesas, ke iliaj parencoj aŭ amikoj faru bonon anstataŭ mortintoj.

PRAJÑĀ (Saĝeco)

Saĝecon, intuicio, profunda kompreno. En budhismo ĝi markas intuician komprenadon de la kvar noblaj veroj kaj intuician enrigardon en la tri principojn (nekonstanteco, sufero, neegoo), kiuj kondukas al Nirvano. En Mahajana Budhismo oni uzas tiun ĉi terminon precipe por kompreno de ŝunjato. Kaj el la ses paramitoj, tiu de saĝeco faras la plej gravan kaj fundamentan, ĉar ĝi ebligas la aliajn kvin.

PRATĪYA-SAMUTPĀDA (Laŭkondiĉa Estiĝo)

Laŭkondiĉa estiĝo (aŭ dependa estiĝo) estas budhisma filozofia teorio, kiu asertas, ke ĉiuj estaĵoj ekestas depende de aliaj estaĵoj. Troviĝas la simpla formulo: kiam tio ĉi estiĝas, tio estiĝas; se tio ĉi

malestiĝas, tio malestiĝas. Ĝi estas ne spekulativa sed praktika teorio, kiu aplikiĝas al la solvo de sufero kaj al Nirvano.

PRAVRAJANA (Forhejmiĝo)

Forlasi hejman vivon kaj fariĝi monaĥo. En Hindio ĉi tia praktikado sen hejmeco estis rigardata kiel ordinara afero.

SAṂGHA (Samgo)

Komunumo de disĉiploj de Budho. En frua tempo, ĝi konsistis el monaĥoj kaj monaĥinoj. Poste, kiam la Mahajana movado ekestis, laikaj disĉiploj viraj kaj virinaj, kiuj ekzercas sin cele al iluminiĝo, ekhavis sian pozicion en la Samgo. En tiu ĉi kazo la Samgo konsistas el kvar: monaĥo, monaĥino, upasako (laika kredanto vira), upasakino (laika kredanto virina).

SAṂSĀRA (Sansaro, Metempsikozo)

"Vagado" aŭ "mondo", kun kunsenco de cirkla rondiro. Ĝi ankaŭ temas pri la teorio de renaskiĝo kaj la cikleco de ĉiuj vivoj, aferoj, ekzisto, fundamenta parto de ĉiu darmo. Oni ofte parolas pri sansaro per vortoj kiel metempsikozo, transmigrado, karma cirklo, reenkarniĝo, cirklo de sencela drivado, vagado kaj banala ekzisto. Ĝi ofte estas bilde prezentata en "rado de vivo".

SANSKRIT (Sanskrito)

Sanskrito estas eble la plej antikva hindeŭropa lingvo ankoraŭ aktive uzata; ĝi apartenas al la hindarjaj lingvoj en la hindirana lingvogrupo de la hindeŭropa lingvofamilio. Iam oni kredis Sanskriton la plej praa el ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, sed poste oni trovis ke la hitita,

ankaŭ hindeŭropa, estas eĉ pli malnova. Sanskrito, kiu signifas “pura” aŭ “gramatike ĝusta” lingvo, estas sankta lingvo de pli ol 1 miliardo da homoj (precipe hinduoj kaj mahajanaj budhanoj; aliflanke la kanonaj tekstoj de la teravada budhismo, de la ĝajnismo kaj de la sikismo estas verkitaj en pli novaj lingvoj). Oni taksis, ke hodiaŭ ĝis du milionoj da homoj ĝin parolas kiel duan lingvon, kaj nuntempe oni skribas novan sanskritan literaturon.

ŚŪNYATĀ (Ŝunjato)

Ideo, ke “ĉio, kio ekzistas en la mondo, ne havas substancon nek egoon.” Ĉar ĉio en la mondo ekzistas de kaŭzo-rilato, senŝanĝa egoo ne ekzistas en ĝi. Tial ni devas ne esti alteniĝanta al la ideo, ke egoo ekzistas aŭ neekzistas. Ĉar homoj aŭ aĵoj ekzistas relative kaj interdepende, ni devas ne esti alteniĝantaj al unu ekzistaĵo nek unu doktrino, nek devas rigardi ion kiel absolutaĵo. Ĉi tio estas la fundamenta ideo de sutroj apartenantaj al “Prajñā-pāramitā” (perfektigo de saĝeco).

SŪTRA (Sutro)

Sankta teksto, precipe pri prelego de Ŝakjamunio aŭ de liaj eminentaj disĉiploj. La vorto signifas origine “fadeno”. Unu el la tri eroj de Tripitako.

STHAVIRAVĀDA (Teravado)

“Instruo de la plejaĝuloj”, la budhisma skolo bazita sur la palia versio de la Tripitako kaj ĝiaj mezepokaj komentarioj, disvastiĝinta precipe en Suda-Azio (Srilanko, Birmo, Tajlando, Laoso kaj Kamboĝo); foje erare konfuzita kun hinajano. Komparu ankaŭ mahajano.

TRIPIṬAKA (Tripitako)

Origina signifo laŭvorte estas “tri korboj”; estas la tuto de budhisma kanona tekstaro konsistanta el la tri kategorioj: sutro, vinajo kaj komentario de hindaj monaĥoj. La versio de Teravado estas ĝenerale nomata Palia Kanono. Ankaŭ en Mahajano oni havas pluraj versiojn de Tripitako, sed malsame de la Teravada, la Mahajanaj Tripitakoj inkluzivas aliajn derivitajn tekstojn kaj komentariojn, kiuj estis verkitaj pli poste en aliaj landoj ol Hindio.

VIJÑAPTI-MĀTRATĀ (Konsciismo)

Unu el la mahajanaj skoloj, kiu asertas, ke ĉio ekzistas nur en la konscio, kaj ke ĉiuj fenomenoj estas manifestaĵoj de la ok konscioj: vido, aŭdo, .flaro, gusto, tuŝo, penso, ego-konscio, kaj la plej profunda kaj kaŝita konscio, kiu naskas aliajn sep konsciojn. Malsame ol spiritualismo, kiu asertas, ke menso estas la bazo de la mondo, budhisma konsciismo diras, ke ankaŭ menso estas efemera.

VIMUKTI / VIMOKṢA (Liberiĝo)

Liberiĝo el la iluzia mondo, nome el la mondo de metempsikozo kaj eniro en Vervekiĝon aŭ Nirvanon. Budho estas tiu, kiu liberiĝinte el tiu ĉi iluzia mondo, estante for de ĉiuj katenoj, akiris tutan liberecon.

PRI “BUDHISMA MISIA ASOCIO”

Antaŭ ol paroli pri Budhisma Misia Asocio, ni devas mencii unu japanan industriiston nomatan Ehan Numata, kiu estas la fondinto de “Mitutoyo Akcia Kompanio”, kiu produktas precizan mezurilon.

Post kiam li fondis tiun ĉi kompanion en 1934, li estis firme konvinkita, ke la sukceso de ĉiuj entreprenoj dependas tute de harmonia kuniĝo de ĉielo, tero kaj homo, kaj ke perfektigo de humaneco povas esti atingita nur pere de la bona akordiĝo de saĝeco, kompato kaj kuraĝo. Li faris ĉion, kion li povas, sub tiu ĉi konvinkiĝo, cele al la teknika plibonigo de mezurila produktado kaj al disvolviĝo de homa menso.

Estas lia kredo, ke la realigo de mondpaco estas ebla nur surbaze de perfektigo de humaneco, kaj ke Budhismo estas religio por tiu ĉi celo. Tial, dum li direktadis sian kompanion, li klopodis por disvastigo kaj modernigo de Budhismaj muzikoj, kaj por disvastigo de pentraĵoj kaj instruo de Budho.

En decembro de 1965 li fondis fonduson oferinte sian privatan havaĵon por entrepreni disvastigon de Budhismo kaj samtempe por kontribui al mondpaco. Tiel estis establita Budhisma Misia Asocio kiel publika organizaĵo.

Kiamaniere ni povas disvastigi la instruon de Budho tra la mondo, por ke ĉiuj homaj estaĵoj povu profiti de ĝi kaj ĝui Lian grandan saĝon kaj kompaton? Jen, trovi la solvon de tiu ĉi demando estas la tasko de Budhisma Misia Asocio laŭ la intenco de la fondinto.

Resume dirite, ĉiaj eblaj klopodoj celantaj la disvastigon de Budha instruo estas ĝuste la koro kaj spirito de tiu ĉi Budhisma Misia Asocio.

Kiam ni rigardas retrospekte la longan historion de Japanio, kvankam ni havas la kulturon de Budhismo kiel nian gloron, ĝis nun ni ne havis veran Sanktan Skribon de la japana maniero en la vera senco de la vorto. Tiu ĉi libro "La Instruoj de Budho" estis publikigita sur tia memkritiko.

Tiu ĉi libro servas kiel spirita "nutraĵo" por ĉiu ajn, kiu legas ĝin. Ĝi estas preparita tiel, ke oni povu meti ĝin sur sian skribtablon aŭ kunporti kun si, kaj ĉiam ajn povu legi ĝin. Tiamaniere oni povas kontaktiĝi vive kun la spirito de Budhismo.

Kvankam ĝi ne estas tiel perfekta, kiel ni esperis, la nuna versio de "La Instruoj de Budho" naskiĝis dank' al laborado kaj klopodado de multaj volontuloj por prezenti al modernuloj adekvatan, facile legeblan, kaj aŭtentikan enkondukon en Budhismon kun praktika gvido kaj ĉiutaga fonto de inspiro.

Budhisma Misia Asocio deziras, ke tiu ĉi libro eniru en multajn hejmojn, estu tenata de multaj homoj, kaj ili duŝi sin per la lumo de instruo.

Opinioj de legantoj estas bonvenaj. Bonvolu senhezite ĉiam ajn turni vin al la Asocio.